



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista  
 Unu numero : 5 FF. Unujara abono kun adresaro : 28 FF  
 Ĝiri al la poŝtkonta numero 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto :  
**Cercle amical esp. de l'Agenais, F 47340 Laroque Timbaut**

\*\*\*\*\*

**LA ABAKO KAJ LA KOMPUTERO**

- Falsa ! Ĉu vi diris "falsa" ?
- Jes, kamarado. Falsa ! Tiu blinde fidata barometro de nia merkato, prognozisto de nia ekonomia farto, konsilanto de niaj regantaj sferoj, nome la Oficiala Indico de la Industria Produktado estas, de pluraj monatoj, nekontesteble falsa (\*).
- Ĉu tiel ?
- Jes, tiel !
- Sed... kiel eblas ?
- Jen la afero. Jam de duonjarcento tiun indicon oni kalkulis, ĉe ni en Francio, per tradiciaj metodoj, t.e. papero, kraĵono, plus ioma cerbumado. Sed de kelka tempo ĝin bakas komputero...
- Kaj kompreneble, la komputero eraris !
- Ho bele ! Ha, ha, ha!
- Kial do vi ridaĉas ?
- Ĉar vi memorigas al mi gazetiston, kiu anoncis la novaĵon jene : "La elektronika cerbo konsideris, ke la monatoj enhavas po 27 labortagojn... dum tiu nombro fakte varias inter 24 kaj 27". Nu, se mi bone komprenas, vi

- plene konsentas kun li : laŭ vi, kulpas la komputero, ne la programisto, kiu nutris ĝin per malĝusta donitaĵo!
- Vi mokas min. Evidente ne la maŝino kulpis. Kaj se mi diris, ke ĝi "eraris", tio estas nur pro stila oportuno.
  - Eble, eble, kamarado. Tamen via diro estas nek sensignifa, nek... senkulpa. Ĝi vole nevole rivelas iun blindan fidon al la komputeraĵoj, kio estas nenio alia ol moderna avatara de la ĉiama homa bezono kredi je fantastaĵoj. Ĉiu epoko havas sian "Ĉiopovan". La nuna tronas ne sur nuboj sed en ŝtala kesto.
  - Ba! Ĉu decas ekscitiĝi ĉe tia bagatelo ? Ke la homa kred-avido migris de fantaziataj feoj kaj dioj al tute realaj elektronikiloj, jen laŭ mi progreso !
  - Malprave ! En ambaŭ kazoj demisias la racio. Rezigni ĉian kritikemon, perdi ĉian juĝokapablon, azenigi antaŭ nova Pitia, jen la danĝero !
  - Do, kion fari, kara ? Ĉu maldungi ĉiujn komputerojn kaj reiri al perfingra kalkulo ?
  - Tute ne ! Sed ja konservi suspekteman rigardon, kompari, kontroli, rifuzi absurdan verdikton, eĉ se ĝin orakolis iu komputera Moŝto. Aŭdu ! Antaŭ nelonge, oni rakontis al mi, ke en Sovetio fakuloj, ĉe ricevo de komputera produkto, tuj kaptas sian bidabakon kaj zorge rekalkulas per ĝi. Eble nevere, tamen ne stulte, ĉu ne ?

P.S.

(\*) Laŭ gazetara raporto antaŭ kelkaj monatoj.

\*\*\*\*\*

*Karaj gelaŭtuloj !*

*Denove jen dika "Laŭte!", kiu liveras al vi multon por legi, mediti, rebati...*

*La unua parto estas teksto relative longa, el kiu kelkaj dekoj da ekzempleroj estas haveblaj ankaŭ broŝurforme (mendkodo: AN, prezo : 3 FF). Poste, kiel kutime, sin esprimas libere multaj el vi pri plej diversaj temoj kaj eĉ afrika gasto, kiun ni varme bonvenigas inter ni. Mankas nek la nun regula novelo (ĉi-foje tradukita de Daniel LUEZ), nek la "Vortoj" de amiko VALO, nek la arkiva dokumento, ankoraŭ neeldonita prozo de LANTL. Estas ja aliaj aferetoj, kiujn kompreneble vi mem certe malkovros...*

*Al ĉiuj kontribuintoj, dankojn kaj gratulojn.*

*Kisas vin ĉiujn, ge-legemulojn kaj -verkemulojn, kaj deziras al vi vagonojn da entuziasmo,*

*la publicemulo, Kribo*

*"Ĝtopi la truojn" jen fine kio plej malfacilas. Ĉi-supre, aĉa ekzemplo...*

milan ŝimeĉka

## NIA ANGORPLENA SOCIO

De Aldo Revel

tradukita el ĉeĥa sociologia eseo

### La timo ne estas honto

Jam vesperiĝis, kiam mi skribis leterojn. Subite mi ĉesis, ĉar mankis al mi ia eta informo. Do, kun ioma naŭzo mi vestis min kaj iris por ĝi ĉe mia amiko. Estis malmilda vetero kaj la stratoj estis malplenaj ; neniu spiono sekvis min. Post momento mi sonorigis. Lia edzino ekaperis ĉe la fenestro kaj ĝoje mansvingis, montrante, ke ŝi venos malŝlosi la pordon. Mi atendis longan tempon ĝis ŝi alvenis kaj klarigis al mi, kun sia ruĝetmiena vizaĝo, ke la edzo estas malsana, enlitiĝis kaj timas por mi, ke mi ne infektiĝu pro tia malsano, ĉar temas pri la gripo. Laŭdire, post la resaniĝo li certe telefonos. Post amika adiaŭo, en ĉi tiu malmilda vespero mi reiris al mia hejmo, ne uzante la saman vojon. Senĉese mi pripensadis, kia stultulo mi estas, se mi ĉiam konvinkas min, ke mi konas perfekte ĉi tiun socisistemon de la timo, en kiu ni vivas, kaj tamen mi agas laŭ iuj literaturaj imagoj. Mi devus tamen scii, ke mia amiko, iam ne malgravulo, nun estas kultura referanto, kiel ĉe ni la popolo nomas ilin kun plaĉo. Finfine li estas altranga funkciulo kaj la ĵurnaloj aperigas liajn kontribuadojn, kaj tute sama ĵurnalo nun menciis, ke mi flankenpaŝis sur kontraŭkomunistan vojon, ke mi estas kalumniulo ktp.

Kompreneble, mia amiko ne plu vokis min telefone, sed per la ĵurnalo mi eksciis, ke la duan tagon li forvojaĝis kun la kultura delegitaro al agrabla okcidenta lando.

Ni ĉiuj en Ĉeĥoslovakio scias, ke ni kreas nian malgrandan mezeŭropan socion de la timo. Ĉi tion ni eĉ ne malkaŝas kaj eĉ ne sentas pro tio ian honton. Dum la kunvenoj oni ĉiam diradis : "Kamaradoj, diskutu, ne timu!". La viroj levas manojn kaj diras : "Mi havas du infanojn!". Aliaj diras : "Kiu al mi helpus, se iel mi kontraŭdirus?" Aŭ : "Tio ne havas sencon". Aŭ : "Mi volas trankvilon". Aŭ : "Komprenu, post du jaroj mi ja emeritiĝos". Aŭ : "Tio estas ilia afero". Aŭ :

"Ankoraŭ ne alvenis la opoŭtuna tempo". Aŭ : "Ĉirkaŭrigardu, ĉiuj sur tion fekas kaj kial mi devus en tiuj aferoj bruligadi miajn fingrojn?". Aŭ : "Mi ne plu povas streĉadi miajn nervojn". Aŭ : "Mi ja pli suferis ol sufiĉe". Aŭ : "Ne pensu, ke iu defendos cin". Aŭ : "Se ci lasos ilin trankvilaj, ankaŭ ili lasos cin trankvila". Aŭ : "Ĉiam estis tiel, nenie tio estas pli bona".

Silente, sen bruego, estis akceptita civitana principo, ke la timo ne estas honto. La civila malobeemo estas lukso, kiun ni ne povas permesi al ni, ĝi estas la privilegio de la frenezuloj.

Por la homo en realsocialisma socio estas plej bone resti en la mezo de varme enfermita svarmo de la popolamaso, ne estus saĝe forlasi ĝin kaj stari sur ĝia rando, tiam li estus tuj ekvidata kaj iĝus pli-malpli suspekta. Modela konduto de civitano estas simpla ; tiun oni povas tre facile lerni, ĉar ĝi konsistas el ĝeneralnatura konduto de homo. En Ĉeĥoslovakio estis ĉiam pli ol sufiĉe da okazintaĵoj, por ke la popolo alkiutimiĝu vivi en socisistemo de timo kaj tial por si per ia intuicio ellaboris pravigilon bazitan sur la historia sperto, kiu pli ol ofte pruvis, ke dum ĝia vivo la vero ordinare ne venkos.

### Angoro de kleruloj pro senpoveco

Alkiutimiĝado timi ja daŭras pli ol tridek jarojn. Forpasis epoko, kiam ĝi premegadis la gorgojn, regante sur ĉiuj pendigiloj kaj per la senespereco de fia vivo en "jaĥimovaj" barakoj, pri kiuj mi nur aŭdis. Poste aperis alia epoko kaj la timo elvaporigadis kaj iam ŝajnis eĉ, ke ĝi por ĉiam forfluos kvazaŭ estus inkubsonĝo. Sub la tribuno de timo pasis alterne generacioj kaj sociaj grupoj. Antaŭe en la retojn de timo faladis malvenkitaj nekomunistoj, ĝi ankaŭ multajn forpeladis el la lando, kaj aliajn ĝismorte nauzkripligis, kaj pli poste ĝi montris la registron de angoro kun terursonĝoj al elektita komunistaro. Kaj tiel pasis pluraj jaroj, ĉiuj ricevis sian rekompencan pli ol abunde. Iuj havis sufiĉe da fantazio kaj komprenis, ke la sorto de viktimoj estos eble ankaŭ ilia la morgaŭan tagon.

Kiam mi parolas kun iama studento, kiu estis enkarcerigita dum tri jaroj, kaj kun alia, kiu ankoraŭ atendas sian proceson, mi konvinkiĝas, ke ni ja estas tri generacioj, kiuj travivis la sperton de la timo. Do, generacio de niaj gepatroj, nia kaj ĉi tiuj gejunuloj, kiuj povus esti niaj infanoj.

Dum mia junageco la generacio de niaj gepatroj forportadis al keloj la verkojn de Masarik kaj kaŝis ilin malantaŭ bretoj de konfitaĵbokaloj. Mi ridis, ravita per legaĵoj de Marks kaj pri kolektivismo de bluaj ĉemizoj. Mi diris al mi mem : kiel ili

estas ridindaj! Ili kondutas laŭ malnovaj stereotipoj kaj ne kapablas kompreni, ke tiu finvenko de popolo malfermos la pordegojn al libero por ĉiuj. Se ili legus Markson, tiam ili sciis, kiel malkonformaj estas ĉi tiuj iliaj majstroideoj kun malhelaĉa kaj mezepoka imagemo pri la danĝeroj fontantaj el libroj.

Diktaturo de laborista klaso etendos la brakojn al tutkultura heredaĵo kaj ekzamenos atente kaj neimageble la tutan intelektan produkton de antaŭaj epokoj, por ke ĝi el tio elektu ĉion valoran por la finkonstruo de nova socio. Por demonstri mian konvinkon, almenaŭ en familia rondo, mi metis sur miajn modestajn bretojn mian heredaĵon post mia patro : la **Biografion** de Karl Marks, **Mondan revolucion** de Masarik, **Falsan revolucion** de Trocki. Se tiam alvenus ĉe mi la kolektantoj de libroj, ili kuracus min el naiveco ekde la komenco.

Nun dum la tutaj jaroj mi kaŝas miajn librojn. Mi timas perdi ilin. Sed ili ĉiam iujn trovas. Kvankam ili havas skriban permeson serĉi nur ĉartoskribaĵojn, tamen ili prenas ĉion. Ekzemple, ekvidante la dikan libron de Skilling "**The interrupted revolution**", ili tuj ĝin prenas kaj ĵetas planken. Mi diras, ke temas pri historio, do, la libro pri iuj okazintaĵoj, scienco. Ili respondas, ke tia scienco estas malamikeca. Aŭ vidante la verkon de Eban "**Das ist mein Volk**", ankaŭ ĝin ili ĵetas planken. Denove mi diras, ke tio estas historio. Ili ree diras, ke ĝi estas tute sama kiel **Mein Kampf**. Preskaŭ kun certeco, kvazaŭ ili tiun libron ja legis. Mi mem legis ĝin nur ĝis paĝo, kie troviĝas priskribo pri Jozefo, kiam li havis sukceson en Egiptio. Sed poste mi preferis silenti, ĉar timigas min homoj, por kiuj la civilizaciaj interrilatoj iĝis tabuo, paso de historio, ĉar ili vivas nur en sia estanteco, konvinkite, ke ekde ilia naskiĝo la mondo kreigiĝis kaj kun iliaj mortoj ĝi finiĝos. Tio estas unu el miaj timoj, kaj eble pluraj personoj partoprenas kun mi ĉi tiun konvinkon. Tio estas angoro de senpovo naskita el klereco, el senpovo de racio kaj de nebla klerigeblo de homoj. Tio estas nur unu el la timoj.

### Dezerto de politika apatio

Tamen ni scias, ke kun niaj timoj ni ne estas solaj kaj ke ne nur nia lando enhavas ilin. Mi memoras, ke, ekleginte usonan literaturon (mi ne plu scias la ĝustan tagon), ŝajnis al mi, ke duone ĝi estis trapenetrita de angoro kaj timo. Per tio mi volas diri, ke ni bone konscias, ke la Tero eble ne estas la plej agrabla planedo en la universo.

Ni parolas pri nia timo, ĉar ĝi estas nia intimulo kaj ni povas pri ĝi rajte konfesadi antaŭ propraj atestantoj.

Kiam ni forkalkulas la esceptojn el tuteco, nia socio de timo estas analizebla aperoparto, sociala realeco. Nian timon oni ne povas malatenti sen montraĵoj kaj klasi ĝin al kategorio de eterne homekzistantaj angoroĵoj sortĵetitaj sur nian teron. Ĝi apartenas al socialaj kaj politikaj kategorioj kaj tiel eblas ĝin konsideri.

Tio estas timo, kiu rezultas el senpoveco de homo koncerne socialan organizadon, koncerne totalist-praktikan potencon enmiksiĝantan en anonima supro, kiu disradiadas al malpli supraj tavoloj de socia strukturo. Ne estas necese ĉi tiun administradon de homa socio priskribi pli detale. Ne temas pri io nova. Sed indas rimarkigi, ke tiun socialan organizadon ili kreis por sia praktika bezono, kiel iompostioman pliperfektigon de defendo kontraŭ senĉesa minaco de malintegriĝo (de kompartio) kaj ĝi ne plu havas kun teoriaj fundamentoj de socialismo kaj komunismo ion komunan, kontraŭe, ĝi estas konresta al la komunistecaj imagoj pri malaperigado de ŝtato, al kiu la movado ja ĵuris eĉ antaŭ la Oktobra revolucio.

Tiun ŝtatdefendon kontraŭ ebla memmalintegriĝo ili perfektigis samkiel la "defendon de landlimo". Komence sufiĉis nur la pikdrataro. Post ĉiu forkuro kaj post ĉia nova eltrovo de fuĝintoj, estis elpensita io nova, la tuta serio de pliperfektigoj. Antaŭnelonge, veturante per trajno, mi rimarkis, ke laŭlime apud la dratoj estis longa vico de enbetonitaj pikobjektoj. Tio estis evidente la reago pro certa ago de iuj junuloj, kiuj alproksimiĝis en Tatro, iel surlevis ion, kaj panike traveturis landlimon. Tio ŝajnas preskaŭ kiel ia ludo, sed tio estas ludo kun la homa digno.

Kondutoj de ŝtato por la propra memdefendo estis jenaj. Ĝi pliperfektigadis timigon multvarie, laŭ tuja bezono. Efika fundamento de timo entenis kelke da sangverŝaj elpurigadoj en opoziciaj tavoloj, aŭ almenaŭ kun potenciala opozicio. Sur tiaj bazoj disvastiĝis enradikiĝinta angoro por ĉiel eviti iujn malkonsentojn kontraŭ la agoj de la reganta centro. Kvankam ofte okazis al persekutitaj kontraŭideoj, ke ili fariĝis eĉ kiel gvida parto de kanonika linio, sed al tiuj antaŭaj ideoportintoj tre ofte oni ne aplikis eĉ la postmortajn rehonorigojn. Pro tiaj kaŭzoj Ĉeĥoslovakio kaj aliaj socialistaj ŝtatoj estas dezertoj de politika apatio. Tielnomata politik-aktiveco estas nur formalaj agoj de apatiaj civitanoj, baraktantaj super politikecaj ritoj, kiujn por si mem elkreis la realisma socialismo. Publike politika diskutado estas nepensebla, ĉiuj serĉinde alternativaj solvoj estas malakceptataj.

## Malvivigo de la pensado

Timo malprosperigas kaj vaste kripligas eĉ la ekonomian vivon, ĉar ankaŭ ĝi estas celkondukata laŭ la sama metodo kiel la politika vivo. Kapablo, kvalifiko kaj bonaj laborplenumigoj estas akceptataj nur laŭ politika lojaleco de ĉiu laboranto kaj denove kompensita sen la konsidera atento pri kapabloj, kvalifikeco kaj bonaj laboratingoj. Politika nelojaleco estas ĉiam punata sen konsidero al perfektaj laborplenumoj. Kaj tiel manmane kun politika apatio paŝas eĉ laborapatio. Nomata laboriniciato fluas plejparte tra la formala kanalo de la socialisma konkurso; post dekoj da jaroj ĝi fariĝis nur parto de politika rito. Apatio kaj timo kondukas al senĉesa malaltigado de laborrezultoj en la nacia ekonomio, ĉefe en sfero de efektivo, kvalito kaj teknika disvolviĝo.

La timo trafas tamen eĉ la gvidan strukturon de ekonomia aparato kaj malvivigas eĉ multe pli efike la iniciaton, ĉar teruras la imago de falo de pli supra rango. Gvidekonomia aparato en sia tuto estas konscia pri propraj abomenaĵoj, kiuj estas kreataj per la direktiva sistemo, kiu restas des pli konvinkita, ke ĉia iniciato preterpasanta la kadron de la sistemo estas por ĝi ege danĝera. Eventualan fluon alien la timo strangolas en principa konsidero tuj en la sino de elkresko kaj tiel la ekonomia aparato stagnas en senlirejo kaj flegas malsupreniĝajn malvolviĝojn kun pli truda direktado per la transiro al ia burokratmilitaristeca regado, per krioj, minacoj, sankcioj ktp.

For de komuna timo, en la kadro de sia posteno ne esceptiĝas laboristoj. Ŝajnas, ke ili estas preskaŭ nevundeblaj pro la nebleco por ili fali el altaj rangoj de la socia hierarkio al malpli alta. Ili pensas: "Tiun ŝovelilon al mi neniu prenos", sed eĉ al ili estus trudotaj penigaj laborkondiĉoj, ĉefe kromhoraj, pli ol permesas la ŝtata leĝo. Tial ke ili estus forpelotaj al aliaj laboroj, al postenoj malplej pagataj kaj suferus pro alispecaj malagrablecoj, per kiuj la ekonomia aparato havas la povon ilin sankcii.

Sed per pli profunda timo estas trafataj personoj en neproduktivaj sferoj aŭ en privilegiaj okupoj, en scienco, kulturo, instruado, esploro kaj en ĉiuj ceteraj administraciaj sferoj. Laboroj en tiaj sferoj estas akompanataj de senĉesa sento de malcerteco, kvazaŭ ili estus ia ekzisto donacita per la graco, fare de la ŝtato. Ĉiuj el tiuj personoj scias bone, ke la ŝtato eĉ facile prosperas sen mallojala intelektularo kaj do nenio grava okazos, se ĝi forpuŝos eĉ milojn aŭ dekmilojn da kleruloj, ĉar en multaj kazoj ili funkcias iel nur kiel ia ornamaĵo de la ekzistanta reĝimo.

## Kiel timo ŝanĝas la homon kaj la naciojn

Kiam la homo vivas dum jaroj meze de tiaj sufokaj timoj kaj spiradas ĝiajn haladzojn, tio ŝanĝas lin. Kaj la timo ŝanĝas ne nur la individuon ; ĝi kreas klimaton, kiu efektive aliformas ĉiujn. Same la nacion - rekte al oportuneco, indiferenteco, al la sento de malsupereco, malgraveco kaj sensignifo. Ĝi ŝanĝas ankaŭ la komunan pensadon, forlasas raciajn radikojn, kiuj estis enestiĝintaj en la eŭropa tradicio kaj klinigas ĝin al malraciigaj mitoj, ekzaltaj kredoj kaj utopiaĵoj. Ofte mi aŭdis kiel la simplaj homoj rakontas inter si pri similaj profetaĵoj, pri sekretaj armiloj, pri konspiroj de malhela forto, en profunda konvinko, ke ĉio, kio okazas kaj okazos, estas por ili ekster atingo, ekster la homaj povoj kaj homa volo. Aliparte, inter la kleruloj regas skeptikeco kaj rezigno pri plenumado de iu ajn respondeco ŝulde por la naciosocia sorto. Skriba aŭ parola slogano de oficiala propagando ripetas, ke la popolo estas aŭtenta kreanto de sia propra sorto, sed ĝi falas senfrukte kiel ŝtono en la sablon. La timoj kreis en pensmanieron ian pikbarieron, kaj kiam ĝin atingas la ideo en tia tabuiĝinta regiono, rekomenciĝas la baraktado en konvulsioj kaj ĉe multaj personoj okazas, ke iliaj subpremitaj scioj kaj konsciencoj estas la kaŭzoj de malsaniĝoj, ĉu de neŭrasteniaj, ĉu de histeriaj krizoj. Mi ne volas ĝeneraligi troige, sed al mi ŝajnas, ke plimulto da konfliktoj aperantaj sur la ĉeĥoslovakaj laborlokoj, histeriaj kvereloj kaj atakoj, nervokolapsoj kaj infarktoj dependas ĉefe de tiaj konvulsioj en pensado, ĉe tia rekono de limoj de la racio. Kaj pro ĉi tio oni multe drinkas por forpeli tian konvulsion, por ne senti sin tiel mizere kaj malkuraĝe.

La personaro de la ĉeĥoslovaka ŝtato revas ne pri alta salajro, sed pri trankvilo. Multaj preferas havi eĉ malpli altan rangon por ne suferi tiajn respondecojn kaj rezignas je kompetentecaj postenoj nur por ne esti tedataj per eternaj histerikonfliktoj, kiuj abundas en la tuta atmosfero en naciekonomion pritraktantaj organoj, same kiel en feroj de ŝtataparato-komunikaj organoj. Altira forto de tiaj firmaj revoj eliminis ilin el kompetentecaj kaj kvalifikecaj aŭ gvidaj laboroj kaj lasas ilin al tiuj, kiuj estas tiel senskrupulaj, ke ili al la unuaj malpermesas eĉ, ke iliaj konsiloj iom ilin tuŝetu. Tiuj memfiduloj svarmas ĉie, penetras el iu funkcio al alia, ne turmentas sin pro malsukcesoj ; ili scias, ke tiel longe kaj regule dum ili proklamas fidelecon kaj entuziasmon, okazos al ili nenio malagrabla.

Malofte aperas naivaj honestuloj, konvinkitaj, ke tia sistemo estas unu el la plej bonaj en la mondo kaj ne bezonas ian reformon, ke nur la civitanoj estas malbonaj kaj bezonus reformadon. Tiuj honestuloj gravuras en antaŭĉambroj de timo diversajn sensencaĵojn, en leteroj kaj felietonoj admonas kun morala patoso kontraŭ la subaĉetado en la sanitaraj servoj kaj en loĝejaj kooperativoj, sed ili mortus pro timo, se ili ion skribus pri alta funkciulo, kies vilaon tiu lasis konstrui el materialo "leĝe ŝtelita" el konstruprojektoj planitaj de la registaro. Kaj ili ankoraŭ malpli permesas al si eĉ pripenseti, ke la entute vasta koruptado estas ebligata per la reganta monopolo, pro la neekzisto de liberaj opinioj kaj de politika kontrolo tute sendependa de centra regado.

Pensado kripligita pro timo enplektiĝas je paradoksoj, kiujn ili kreis por si mem, kaj rigardo al ĝi estas vere malgaja. En plej bona kazo ĝi estas tolerata de oficiala kritiko, kiu evitas la esencaĵojn : la sistemo estas senerara, rezolucioj de kongreso kaj centraj organoj estas ankaŭ seneraraj, tiuj organoj gvidas entutan vivon senerare kaj senriproĉe. Nur la homoj sube, en laborejoj kaj ĉe maŝinoj, sur kampoj kaj ĉe skribotabloj, ne laboras tiel, kiel de supre por ili la agadoj estis deciditaj. Unuvorte, ili laboras nekvalite, neefektive, malŝparadas energion kaj materialon. Entute ili ne kapablas kompreni la ĉefan ordonon, ĉar ili ankoraŭ restas katenitaj en malnovaj pensmanieroj samtiel en malnovaj kutimoj, estas malatentemaj al aliaj homoj, estas memplaĉemaj, drinkas kaj akceptadas ŝmirmonon, pensas nur pri si mem kaj ne pri la socio, en socialismo okulumas al fremlanda konsumideal, estas burokratecaj kaj stultaj, malhavas la kvalifikon ktp. Honestaj, kuraĝaj kaj bone pensitaj kritikopinioj, kiel oni diras ĉe ni, ilustras en ĵurnaloj kaj en ŝtattelevidaj serioj, en radiokomentoj kaj en paroladoj de ŝtatregantoj, la malnovan ironion de Breĥt, ke la registaro estas bona, sed ke oni bezonus ŝanĝi la popolon.

Pli malbona kazo de kripligita pensado estas la cinika ĉioscio pri la fundamentaj kaŭzoj de entutaj ecoj, sed principa malkomplezo estas fari el tiaj ĉioscioj ian kombinon. Tian ĉioscion oni ofte trovas eĉ sur altaj ŝtupoj de ŝtata gvidado, sed konservas ĝin en siaj linioj antaŭ la timego. Realpolitiko akceptas la cinikismon en propraj vicoj. La popolo per misteraj vojoj kelkafoje ekscias pri trafaj diskonitaĵoj, kiujn inter si diskonigas sinjoroj Unua kun Kvina kaj Kvara kun Sepa, sed ekster tio sin vualas la cinika ĉioscio majeste neskuebla per la certeco kaj senduba pravigo de nia vojo.

Sufiĉas tamen pripensi pri la konsekvencoj de agoj, kiuj estas en harmonio kun tia ĉioscio. Nur frenezulo elsaltus de trajno, kiu ankoraŭ veturetas, precipe kiam la vagono de unua klaso estas agrable hejtata, en ĝia kuirejo oni povas ĉiam el io boligi. Eĉ al ĉi tie penetras la haladzo de timo, sed de timo sur pli alta nivelo.

Normala pensado estas en la socio de timo tiom nenormala, ke la ŝtato financas tian disvastigitan aparaton, por ke ĝi estu kaŝita antaŭ la publiko. Kiam ekzemple ĝi movas vastan kampanjon kontraŭ la nenormala pensado, ĝi faras ĝin sen la komentoj de aliopiniantoj. Ĝi ne volas aŭdi pri aliaj pensoj, nur pri tiuj, kiuj ne trapasas la kadron de difinita ekzercejo. Kiam vi proponas aliajn pensojn, tiajn ili malakceptas eĉ tralegi. Vi diras : "Sed tio estas nur pensoj, supaperigitaj vortoj, ne pafadas, ne buĉas kaj ne metas eksplodilojn, tio estas nur io nemateria, tio eĉ ne estas insultoj, nur sekvo de vortoj sendefendaj kiel infanoj". Sed ili metas kaŝdorse siajn manojn kaj diradas, ke pri la sendefendeco de tia procesio de vortoj ili havas jam sperton.

### Angoro de la besto

Timo puŝis neatentite la civitanojn de la reala socialismo en Ĉeĥoslovakio ĝis la antaŭaj periodoj en la historio de la lando. Ĝi proksimigis al ili per neordinara maniero la travivaĵojn de antaŭajn generacioj inkluzive de konstanta lukto por la konservo de nacia ekzisto aŭ de aliaj ekzistebloj. Ni legas pri tiaj luktoj kaj ni rimarkas, ke per ili priskribitaj historiaj partoprenintoj ne plu estas iuj historiaj figuroj, sed portas vizaĝon de iu ulo aŭ de alia, iliaj situacioj estas ofte niaj, aŭ tute ne. Ni legas finfine en **Rudé Právo** pri la martirigo de Sankta Johano de Nepomuk. Eksciante, ke la reĝo per propra mano trabruligis al li "korpflankon kaj hontindan parton ĝis malfermiĝis la korpaj kavaĵoj", nia timo mildiĝas, ĉar hodiaŭ nenio simila okazas. Aŭ pri la denunculo Karlo Sabina, ni tuj komprenas lian malesperon, eble li intencis nur "superruzi" la policanojn. Ni pripensas, ĉu sufiĉis la apanaĝo al Karlo Havliček, kiun pagis la aŭstra registaro, kiam li vivis en Briksena ekzilejo.

Ni legas ankaŭ, ke ĉe la fino de la dua mondmilito iu prokuroro de Slovaka respubliko akiris por sia komunista amiko la liberigon el karceroj kaj kiel ili tion kune festis vizitante la vinejojn. Kie en nia socio de timo troviĝas simila prokuroro ? Kie estas simila juĝisto, antaŭ kiu staris eĉ Georgo Dimitrov ?

Socio de timo estas moderna, posedas aŭtomobilojn, televidilojn, radiostacion, havas zorgojn pri la bonstato, eĝermetika krizo, eĉ ĉi tien penetras la nebula penetraĵo de problemoj, en kiuj skuigiĝas la mondo. Hispanio ŝanĝiĝis, ankaŭ Portugalio, Reza Pahlavi devis foriri el sia lando. Roma klubo nove avertas, en Pensilvanio okazis averio en atomcentralo. Nia socio estas moderna laŭ la objektoj, kiuj ĉirkaŭas nin, ĝi estas destinita por ni, kiel estis destinitaj la antaŭaj eraoj por uzigi la ilojn, per kiuj ni laboras. Sed en sia timo tio estas nemoderna socio, ligita konscie aŭ nekonscie kun tiame obskura flanko de pasinteco. Pro tio kreiĝas en niaj mensoj mallonggetaj kunfandiĝoj al naciaj historioj. Pro tio estas la historiistoj niaj ŝatataj partoprenantoj dum niaj diskutoj.

Nia socio de timo elfosas oston, kiu venas el profundaĵoj de la naturesenco de homaj estaĵoj. Ĝi senigas nin do de liberaj agadoj kaj returnas nin al instinktaĵoj. Dekmiloj da homoj, kiuj forlasis ĉi tiun landon post aŭgusto 1968, agis instinkte. Nur malplimulto post matura pripenso. La timo estas malpli konvena medio por maturiĝado de konsideroj. Ŝancoj de rezonado en lukto kontraŭ la timo estas preskaŭ sensignifaj. Racio estas kapabla sur propra ekzercejo venki entute kontraŭ la timo, frazoj kaj hipokritaĵoj dum nia ĉiutaga vivo, sed ankoraŭ tio ne signifas, ke ĝi estas kapabla ordoni al kruroj, por ke ili superlevu la individuon el vicoj de tiuj, kiuj kliniĝas antaŭ tiaj mensogoj, frazoj kaj hipokritaĵoj. Kio helpas, se la racio kontentigas sin per venko, kiam la kruroj ligas instinkta paralizo ? Kiam mi aŭdas pri iu, kiu havas ĉion kape en ordo, sed ne en intestoj, en tiu certigado mi ne vidas ion ridindan, tio estas praviga konstato de la nuda fakto.

Haladzo el timo, per kiu estas penetrata nia socio, subfosas nian dignon kaj de ĉiuj membroj senescepte, ĝi disordigas la naturan proceson, per kiu la Homo apartigis sin de animala specio. Pro tio la socio de timo ne povas konsideri sin moderna, eĉ se ĝi pri si mem tion certigas.

Lastjare, en somero, mi promenis kun amiko en Prago. Jam longan tempon ni ne vidis nin, kaj tio devus esti por ni kiel festo. Sed ne estis. Sekvis nin seninterrompe du viroj, descendis kiel ni en subteran trapasejon, staris apud ni ĉe la tramstacio, en tramo denove gapis proksimete. Silentis ili kaj en iliaj vizaĝoj nenio estis tralegebla, nek scivolemo, nek malamego, nenio homa, ili estis kiel maŝinoj. Ni pripensis, ke ni ilin ignoru, sed tio ne eblis, niaj vortoj interrompiĝis kaj niaj okuloj vagis al tiuj vizaĝoj kaj al iliaj veturiloj, kiuj

nin postsekvis. Ni demandis nin mem, ĉu ni ektimas. Eĉ ne, ni tion konas. Sed en la homo tamen aperas ia malnove forgesita angoro. Tio estas angoro de besto, kiu nenion havas por sin-defendo. Se ie troviĝus ia truo, ni tien kaŝiĝus, sed en la tuta Prago simila truo malestis.

Socio de timo havas kompreneble ankaŭ ŝirfendojn. Ne ekzistas tiel totala kontrolo por ne eltrovi ian eskapejon. Per tutmaniera perfektigo, en kiu al kutimigado regas, ĝi tamen ne estas tiel perfekta, por subigi ĉiujn. Ĉiam troviĝas homoj, kiuj luktas kontraŭ la timo per miloj da manieroj sian personan batalon.

En Ĉeĥoslovakio ĉiam ekzistis homoj, kiuj agis kaj pensadis kontraŭ la timo. Multaj restis nekonataj ; kun aliaj la potenco faris venĝlikvidon sekrete. Malsamaj estis eble la motivoj de luktoj kontraŭ la timo, sed eble estas ankoraŭ tempo, por ke la historio de la homa kuraĝo ne estu enterigita per la forflua pasinteco.

Ĝis certa historia momento, kiun estas malfacile difini, per la konsekvenco de favoraj cirkonstancoj ĉu internaj ĉu eksteraj el tia ĝenerala apatio komencas kreiĝi la fenomeno, tiel aparta kaj diversspeca, ke ni rifuzas por ĝi doni eĉ unu nomon, kiu estis por ĝi elpensita. Dum la jaroj, kiuj jam forpasis, la nomoj kaj agoj de individuoj enviciĝis en interrilatan tendencon kaj ĝi havas hodiaŭ sian historion. Al kono de publiko eniris kape ne nur la nomoj de kleruloj, kiuj jam antaŭe havis sian sciencan aŭ artan aŭtoritaton, sed eĉ la nomoj de simplaj homoj, kiuj sin liberigis de la ĝenerala konsento, kiun la stalinisma erao trudis al ili, en orienta Eŭropo, samtiel en posta daŭro. Tiuj homoj ne havis komunajn opiniojn, sed havis komunan bezonon pensi libere. Kaj komuna ligo inter ili estis ankaŭ la kuraĝo. Ĉefe por ili estis la homa situo, en ĝi ili estis komune restintaj kaj ĉirkaŭitaj per la socio de timo, kaj el ĝi ili devis serĉi ian elirejon. Tio estis plejparte homoj, kiuj pripensis la valoron de sia vivo kaj firme decidiĝis en la tuta konsekvenco esplori ĉi tiun timon, lerni kiel kun ĝi vivi kaj akiri ŝanĝe rekompencan en atingo de interna libero, sekve la ateston pri sia homeco.

Mi ne skribas pri la historio de ĉi tiu fenomeno, sed mi volas almenaŭ noti, kiel mi ekscitiĝis dum la plenmezura pripensado por kompreni la homan motivon de Milovan Djilas, kiun el sunalta supro oni venigis al karcero. Same ekscitis min imaga penso pri Boris Pasternak, kiu skribas ĉe la fino de sia vivo en **Doktoro Ĵivago**, angorante per tragedia scio, ke tiun

verkon apenaŭ iu proponos en proksima estonteco al ia soveta eldonejo. Samtiel mi volis ĝisradike kompreni, kiel devas esti profunda rekono de vero, kiu devigis akademianon Saĥarov diri ĝin malkaŝe al Ĥruŝĉov. Post tiom da spertoj, kiuj ekaperis dum la paso de lastdekoj da jaroj, ne plu estas ia sekreto tiuj ĉapitroj el historio de homa lukto kontraŭ la timo.

Post la 21-a de aŭgusto mi vidis amasegon da homoj sur la stratoj, kiuj baris la vojon al tankoj. Vidante, ke multaj rezistadis danĝeron, oni povus pensi, ke la timo estas ia forgesitaĵo. Sed tiam estis alia epoko. Kuraĝon subtenis la kunfandiĝo kun aliaj, solidareco kaj aprobo de plimulto, kuraĝo estis rekompencata per admiro kaj aplaŭdado. Tial ofte mi pensis pri tiaj okazintaĵoj, vidante grupeton el sep homoj, kiuj kun infano en ĉareto kaj hejme skribita banderolo, iris tra Ruĝa placo por protesti kontraŭ tia neimagebla forto, kiu al moviĝo sendis milojn da aviadiloj, tankojn, kanonojn kaj fortegan amason de obeigitaj sed tamen ankaŭ konfuzitaj soldatoj. Tio estis tiu vere homa situacio, kiu sentigas al homo ian ŝarĝon da timo, dubemo kaj la sencon de homaj agoj entute.

Tiu grupeto sciis, ke per sia protesto ĝi ne haltigos la armean invadon, kiun ordonas la marŝaloj. Kaj eble eĉ sciis, ke similaj agoj ne elkondukos el konsterniĝo la socion de timo sed kun certeco ili sciis pri la risko de humiligo, ofendo kaj punoteco. Se ili tamen eniris sur la placon, tio estis nur pro tio, ke ili jam antaŭe apartigis sin de la socio de timo, al maturiĝo de kompren-rekono, kie estas la limoj de tia timo.

### Silenta lukto

Dum simile homaj situacioj, eĉ se ne ĉiam tiel dramecaj, en Ĉeĥoslovakio kreiĝis eksterordinaraj ekzemploj porforbalai timon, antaŭ la jaro 1968, eĉ post ĝi. Kaj ili estis multaj, eĉ se ne samaj laŭ signifo ; sed el ili oni povus krei ian linian tendencon. Ĉi tiu tendenco dramece fiksiĝis en tri semajnoj je la komenco de jaro 1977, kiam estis publikigita teksto de Ĉarto kaj kontinuas en pli-malpli ordinaraj kaj ne ĉiam tiel dramecaj pozicioj ĝia multflanka aktiveco. En laste envicigitaj ses aŭ sep jaroj per la diversaj iniciatoj, agadeltrovaĵoj kaj per sindonemaj laboroj, fakte kreiĝis ia paralela kulturo, sendependa de oficiala ideologio, instaligis rimarkinda idea etoso, plureca en siaj elirejoj kaj leviganta sendube al humana, demokrateca kaj socialisma alternativo de la nacia ekzistado. Kaj ne lastavice dum tiuj jaroj kreiĝis neformala solidareco de homoj, kiuj eĉ foje neniam renkontiĝis, kaj tamen tia solidareco eĉ trapasas la limon de la lando.

Mi ne estas tute certa, ĉu en landoj kun demokratecaj institucioj kaj publike liberaj esprimopinioj, kiuj atente deklaras simpatiojn al supre menciitaj aktivecoj, eblas ĝuste kompreni la homan situacion, kiu ĉe ni difinas la pensadon kaj agojn. Mi certe renkontis personojn, kiuj komprenas tion perfekte, alvenis ĉe ni, ĝojas kun ni, konsolas niajn malĝojojn kaj forveturas al landoj, kiuj havas siajn proprajn zorgojn. Sed eĉ tiel vi sentas, kiel ili restus inter ni. Kiam mi legas ion en la gazetoj aŭ en la ĵurnaloj, eĉ se plurajn monatojn malnovaj, ekzemple en **Frankfurter Zeitung**, **Le Monde**, **Times**, **Spiegel**, **Züricher** ktp, kiuj ĉi tien venas malofte kaj plie per nekonataj vojoj, aŭ aŭskultas el okcidentaj radiostacioj la informojn, pripensigojn kaj kvalifikadojn pri la disidenteco, pri luktoj por la Homaj rajtoj ktp, ŝajnas al mi, kvazaŭ tiuj informoj ĉion forsituigus al alia flanko, tiujn kompreneblajn poziciojn al sia hejma publiko ; tamen aliel koloriĝas la homa situacio de tiuj, pri kiuj temas. Ekzemple, mi neniam aŭdis, ke iu homo en Ĉeĥoslovakio mem konsiderus sin kiel luktanton por la Homaj rajtoj, sed tio eble rezultas nur el kaŭzo, ke ĉe ni estis ĉiam troaj luktantoj por la paco, por pli altaj enspezoj, por novismaj metodoj, por pli bona vivmedio, por la disvastigado de Saratova movado kaj en la lasta tempo ĉefe por la kvalito, efektiveco kaj ŝparemo de energio. Nu, tiel tiu vorto finfine iel balastiĝas en la gorgo de normala homo. Sed tio estas certe nur detalo.

Eble ĉiam estos tiel, ke la publikon interesos ĉefe la dramaj motivoj en tiuj movadoj, kuraĝaj deklaroj, procesoj, brutalajtoj kaj malpli longaj tagoj, monatoj kaj jaroj en la karceroj. En tiuj dramaj momentoj vidiĝas venkoj super la timo kaj la homa kuraĝo en la plej modela portreto, kiu estas mezurebla per analizoj de la homa heroeco, kiun kultivas la eŭropa literaturo, kaj de tiu parto devenas eĉ la ĉeftradicia pensado ekde la tempoj de Konstanta ŝtiparo. Multaj el ni pensis pri la interpretoj de Sartre kaj Camus pri la libereco, incitis nin per almetitaj demandoj Breĥt pri Galilejo kaj reprezentanto de Hochhut, tuta mondliteraturo estiĝis el rezistado.

Ni ne troviĝus en Ĉeĥio, se sur la margeno de seriozaj pripensoj pri la kuraĝo eĉ ne nur unufoje aperus subita ombro de pentrinda figuro de brava soldato Ŝvejk, kiu, kiel ĉiuj scias, alfrontis ankaŭ longegan vicon de maljustaĵoj kaj tamen li estis neordinare afabla al siaj martirigantoj. Mi scias pri iu okazintaĵo, kiam al membroj de Nacia Sekureco dum hejma traŝerĉado estis proponita kafo : "Trinku, vi devas esti lacigitaj,

tio ne estas facila laboro rigardi en tiom da libroj!". Sed tiu Ŝvejk aperas nur kiel ombro, li estas fiksita en subkonscio, dum la seriozaj diskutadoj oni ne argumentas per liaj deklaroj kiuj tamen aperadas ĉe la ĉefna intelektularo el pensoj preskaŭ senvole en ĉiuj homaj situacioj, tiel kiel al Atestantoj de Jehovo la citoj de Malnova Testamento. Ni simple estas en lando, kie eĉ la ĉefministro deklaris publike, ke **Brava soldato Ŝvejk** estas lia plej preferata legaĵo.

Ĉe pripensado pri timo kaj sentimeco enŝoviĝas memore du tradicioj de ĉefnacia rezisto kontraŭ la aŭstra-hungara monarkio, per la romantika de Friĉ kaj Arnold kaj per realisma linio de Palacki, Havliĉek kaj Masarik, kiu iam incitigis Markson al malfacila eldiro pri Slavoj.

Socio de timo havas siajn ordinarajn tagojn, kiel tiuj de lukto, penantaj al venko. El radiodissendo mi aŭdas, ke ĉe la disidentaj movadoj en la Orienta Eŭropo estas relativa silento. Dum tia silento pluraj milionoj da homoj alfrontadas ordinaran lukton per la silento kontraŭ la timoj. Laboristoj forĵetas la ŝovelilojn kaj volas paroli kun la direktoro ; kaj la direktoro alkuras, ĉar kun simile ŝajnsimpla ribelete oni ne povas ŝercumi ; iuj povus distrumpeti, ke ĉe li okazis striko. Iu izola kuraĝulo vespere rakontas al sia edzino, ke morgaŭ dum la sindikata kunveno li diros al ili, kion li pensas. Sed la kunveno ne realiĝos, ĉar aliaj membroj malĉeestos. Ĉe tia silento oni mian edzinon maldungis kaj ŝi la tutan vesperon plorĝemas. Iu enmanigas la telefonon, por diri al sia amiko kelke da konsolas vortoj, sed tuj ĝin formetas. Ili povus tion kaŝaŭskulti. Alia streĉe pripensas kiel eviti por telefoni kun sia amiko, kiu vivas en Britio, sed por ke tio ne aspektu, ho mia dio, ke li estas malkuraĝulo. Verkisto skribis paĝon kaj metas ĝin al antaŭaj, poste forpelas de si la ideon, ĉu tiun paĝon iam iu legos. Ĵurnalista forstrekas ankoraŭ el korektaĵo la frazon, kiu povus krei ian suspekton, nun per malpezigita spiro forviŝas sian ŝvitantan frunton. Per silento finiĝis por alia ĵurnalista 658-a tago de la enkarceriĝo, li eble malŝance perdis okazon foriri el la lando. Eble nun li sidus kun sia amiko en ia pariza kafejeto kaj prefere aŭskultus la bruon de tiu granda urbo, kiu estas pli vasta ol Prago. Ĉe tia silento oni riproĉas al iu viro, ke li estas ne nur subskribinto de ĉarto, sed simpla judaĉo. Aliaj homoj kopias la poeziajn paĝojn, kiujn aperigos **Petlice**. Viro aŭ virino skribas al filoj, filinoj, fratinoj kaj fratoj : "Dek jarojn ni ne vidis nin. En tiu silento ni estas disŝutitaj tra la tuta tero, kiel Armenoj post la turkaj pogromoj". Aliaj homoj pripense kom-



paras sian situacion kun la nacia tuto. Mi aŭskultas dum tuta vespero la paroladon pri la neceso savi la popolan kulturon kaj kiel ĝin kunigi al la estonta. Poste mi staras ĉe aŭtobusa stacio kun aliaj geviroj de nia socio. Iom flanke staras ebriulo, skermas per la manoj kaj sputas insultojn kaj atakkriojn al la ŝildoj pri nerompebla amikeco kaj pri nia vojo antaŭen sub la gvido de la kompartio. La pluvo tiujn enskribaĵojn lavas el vid-al-vida palisaro. Nia malgranda socio eniras kun malpezig-antaj animoj aŭtobuson kaj ni tiel celas al niaj hejmoj.

### Vojo de la vero

Estas multaj vojoj, sur kiuj oni povas eskapi el la socio de timo. Sed eĉ ne unu estas universala, eĉ ne unu konvenas por ĉiuj. Estas la vojo de la eskapiĝo, kiu kondukas trans la limo, sed eĉ ne tia estas atingebla por ĉiu. Tio estas vojo, kiu vundas la animon de tiuj, kiuj restis, kaj de tiuj, kiuj foriris. Tiajn vundojn ni flegadas plejparte en kaŝejo. Kaj en niaj kapoj tiktakas absurda vizio, kiun elpensis iu popola ŝerculo, dirante dum la semajnoj de reglamentado de gradoj: "Ĉe la lasta grado ĉiuj foriros kaj la lasta persono estingos la lumon".

La plej irebla kaj ankaŭ la plej multe uzita vojo de eskapo el socio de timo, estas en iro al privateco, al la fermita rondo familia, intimaj geamikoj, al ĝardenoj kaj kamparomoj, al societoj kaj kluboj, permesitaj de la ŝtato, kaj ankaŭ al ne tro kontrolataj rondetoj de motoristoj, naturamikoj, trampo, bestbredistoj, fiŝkaptantoj, kolektantoj de rarmono kaj ĉio cetera, en plu diversaj asocioj, en kiuj dum la jarkunveno oni devas solene danki al la ŝtata regantaro, kvankam malserioze, kaj estas devigata voĉdoni por iu senpaga laboro/brigado/ kaj pli poste oni povas sin okupi nur pri sia ŝatata hobia aŭ komuna intereso. Sed absoluta plejmulto da civitanoj singarde evitas ĉi tiajn sferojn de normaleco kaj plue la konfrontiĝon kun ideoj kaj kun aktiveco, ĉar tiaj pensmoviĝoj kreas ian timon. Ili ne ŝatas aŭskulti pri la maljustaĵoj kaj pri la persekutadoj de aliuloj kaj estas inklinaj kredi, ke persekutitoj kaj forpelitoj estas memkulpa pro siaj malfeliĉoj. Ekzistas tamen multege da kaŝkonketoj, en kiuj per ioma feliĉo oni povas travivi normalan kaj en certa senco eĉ dignan vivon. La timo ne tiel humiligas, ĉar ni ĝin zorgeme evitas. Eĉ en la trankvileco oni povas atingi tion. Interna kristaneco kaj aliaj kredoj povas al iuj homoj liveri ian edenon en koroj. Liveros ĝin eĉ racio kaj skeptikema konscio pri la malkonsoliĝebla en ĉi tiu mondo. En Ĉeĥoslovakio ni estas specialistoj por la elpensado de diversaj kaŝkonketoj. Iu filozofo havas eble brile ellaboritan teorion

pri tio, ke la homo estas animala specio kun stranga eraro elektita el la naturo. Kaj tuj li havas kaŝkonketon, kiu lin protektas antaŭ la devontigo, do antaŭ la timo. Maljuna viro, kiu pasigis sian vivon en sekureco, en trankvilo kaj silenta digno en ĉi politike kvereliganta lando, sciigis min kun certa fiereco la recepton por tia vivo.

Pli ol kvardek jarojn, ĉiuvespere, li aŭskultadis informojn kaj komentariojn el BBC. Neniam li havis iluziojn, kaj neniam li estis surprizita. Li sciis ĉiam antaŭ la eventoj, kio okazos kaj kion tiu aŭ alia reĝimo preparas. Kaj li tiel superruzis ĉiujn reĝimojn.

Tria kaj malplej irebla vojo, eĉ se tio aspektas kiel rakonto fabela, estas la vojo de la vero. Ne necesas forfuĝi el socio de timo, eblas rezisti. Homo povas decidiĝi malrespektadi regulojn, kreitajn de tia socio. Tio tamen ne liberigas lin el timo, sed tio estas timo de lia propra elekto. Tia ribelado estas kompreneble ja io alia. Li tiukaze rezistas al tia socio, ne nur pro tio, ke li ne konus la timon aŭ neglektus pri ĝoĝa vivo, sed simple pro tio, ke li trovas siajn kaŭzojn de kontraŭstaro kiel pli dignan alternativon de la homa ekzisto. Brilan analizon pri tia starpunkto verkis Vaclav Havel en sia eseo "**La forto de senpovuloj**". Ĝuste tie troviĝas tiaj starpunktoj de la homa situacio, kiu el tio rezultas, kaj plie proksimigas al legantaro la plejmultecan atentigon. Ke vivi per la vero kaj fronti al timo estas nobla programo, kiu estas dispartigita en tri detale priskribitaj miljaroj je la daŭro de la homa komuneco, koncentras en si ĉiujn penadojn por la reala homeco. Se ekzistas entute iu supertempa vidpunkto por aprezi la homajn agojn en historio, kiuj estas komunaj por ĉiuj kulturoj de la Mondo, tiam al ili estas ligita la honoro por sentimeco kaj la senco por la vero. Ĉi tiun vidpunkton, eĉ se ĝi estus pure morala, ne eblas malatenti.

La programo por sentimeco kaj la obstinemo el rekonata vero havas tute aparte kaj altire unikan atenton, speciale en kaj el ĉeĥoslovaka, pola kaj soveta realeco. Tial, ke la vero estas facile distingebla en ĉi tiuj politikaj sistemoj, kiuj konstruis el mensogoj la fortikaĵojn por sia defendo. La vero estas malo de tio, kio troviĝas en ĵurnaloj, krom la antaŭvido pri la vetero, kiel oni rakontas en iu anekdoto. Eĉ ĝi estas nur verŝajna. Kuraĝo estas levi la manon por protesti, kiam ĉiuj konsentas pro la timo. En ĉi tiuj sistemoj ne necesas persisti en serĉado de vero aŭ peze cerbumadi pri tio en via propra kapo, ĉu tio estas la ververaj veroj, ĉar la ŝtata men-

sogo eĉ ne multe penadas por aspekti kiel la vero. Tiel la civitana vivo povas poste profiti en ĉi tiaj socioj de timo la ĉiutagan okazon fariĝi sentima.

Tio tute ne signifas, ke la programo por la civitana sentimeco kaj obstinemo el rekonata vero estas facile aplikebla kaj ĝenerala akceptebla. Male, tia programo estas postulema kaj malfacilega. Ĉar la tuta socio de timo estas tiel altsisteme ellaborita, por ke simila programo estu nerealigebla, eĉ se ĝi estus aplikata de la plimulto.

Decido por servi la veron maturiĝas en soleco. En silento kaj sen atestantoj. Nenia amasa eŭforio tiajn decidojn envivigos. Kontraŭe, la decidoj devas maturiĝi en pezega atmosfero de la komuna apatio. Estas necese aprezi la valorojn de la vivo kaj scii almenaŭ nomi ilin. En tiu senco la sentimeco estas firme ligita al klereco. Decidoj por voji al sentimeco ne estas ia paŝo al nekonata regiono. Ni ĉiuj scias, kio sekvas. Ĉar tiam la kuraĝaj agoj kaj nia pravigo flanke staras ekster la sekureco kaj trankvilo, laboro kaj materia sekureco, familio kaj normala estonteco de niaj infanoj, en forpuŝiĝeco, publikaj kalumnioj kaj dekoj da aliaj maljustaĵoj, kiujn plej bone konas tiuj, kiuj jam por tio decidigis. Kaj kian rekompencan decidulo akiras, tio estas nur alia kor-edeno, facile eldubbla dum la sekvo de la ordinara vivo, submetita al laciĝo, malsanoj kaj la homaj malfortecoj.

Ĝuste pro tio el tialaj decidiĝoj elkreskis en Orienta Eŭropo vaste spiritpensigaj movadoj, kiujn mi ĉiam hezitas nomi: la disidenteco, ĉar en la hodiaŭo ili estas neapartigeblaj de la eŭropa kulturo. Tiuj movadoj kompreneble ne aboligis la sociojn de timo, nur heredis el ili. Homoj, kiuj dediĉis siajn vivojn al disvastigo de veroj kaj restis kiel kuraĝaj civitanoj, verŝajne venkis super si mem pli ol super la socio de timo.

### Atentigo al problemoj de plimulto

En Ĉeĥoslovakio probable neniu dubas pri la socia senco de la dramecaj momentoj, kiujn akompanas la provoj por apliki veron kaj civitanan kuraĝon. Oni scias pli ol sufiĉe, en kian abismon de humileco kaj en socian degradadon, dum ferme rektaj konfrontadoj, la potenco enĵetas la homon.

Se tamen aperis diskutoj en socio de Ĉarto pri la kuraĝo kaj la senco de la plej dramecaj konfliktoj kun la potenco, tiam la ĉefa kaŭzo, krom iuj malkompreniĝoj, estis la longtempe maturiĝanta konvinko pri la limoj, kiujn starigis socia realeco bare al vojo de ĉia morala alvoko, eĉ se ĝi estus apogata per pluraj miloj da homaj viktimoj. Tia limo estus

gardata, eĉ se simila oferagado vojus al pli drameca maniero.

Dubo pri la efiko de morala alvoko, eĉ de morala ekzemplo estas utila. Ĉar ĝi fakte turnas la rigardon al la problemoj de plimulto, kie superregas ĉefe interesoj: ekonomia kaj socia. Sed preskaŭ nula - al aŭtentika. Tia dubo nin devigas esplori atingojn de tiu plejparte ekzistad-interpreta lukto kontraŭ la timo, kaj serĉi la eblon por ĝia disvastigado. Kaj tiaj duboj denove starigas en la antaŭon, la elementan demandon, ĉu ĉio kio okazas en "disidentaj movadoj", devas resti kaŝe gardata en tiaj movadoj, aŭ nepre penetri en la tutan socion de timo.

Konsideroj ĉerpitaj el tiaj duboj povas esti kelkfoje eĉ reale malagrablaj. Same realaj konsideroj pri braveco, ekzemple, atentigas la penson pri la vasta socio; en ĝi vivas ankaŭ tiuj, kiuj ne trapasos la ekzistadan revolucion, ĉar ili havas ordinare aliajn zorgojn. Sed tio ne signifas, ke ili malsentos la homan nedignon pro sia pozicio.

El ĉi tia punkto komencas disvolviĝi pensoj, kiuj troviĝas en alispecaj vicoj de graveco, do, vole-nevole pensoj pri la plej urgaj problemoj de la plimulto.

Konsideroj, serĉantaj la elirejon el ekonomia mezvaloro, en kiu troviĝas Ĉeĥoslovakio kaj kiu estas profunda kaŭzo de nacia malkontento kaj samtiel en teknologia subrangeo. Konsideroj, serĉantaj la elirejon el krizo de efektivado, fiktivprezaj rilatoj, mankoj energiaj kaj finfine el krizo de nacia laborefiko, kiu estas fonto de disvastigita eksento de nacia malgraveco. Estas kompreneble ankaŭ aliaj problemoj, kiuj profunde influas la vivnivelon de la simpla vivo kaj la tuton de nacia esto.

Enfiltrigis laborproblemoj, problemoj de la persona valorigo en la rigida strukturo, kiu kondamnadas la plimulton al pasiveco, problemoj de provizado kaj servoj, kiuj kaŭzas, ke la homa energio elĉerpiĝas per la serĉado de varoj. Estas problemoj naciaj kaj de naciecaj malplimultoj, problemoj religiaj, problemoj de vasta korupto kaj entute koncepto de la publika vivo.

Ĉe la konsidero importita sur ĉi tiu kampo estas kompreneble malpli da spaco por la morala rigoreco. Estas permesite taksi la efekton de la morala gesto kaj la efekton de kompromiso. Sur ĉi tiu kampo oni povas reale aprezi la homan normalecon nekripligitan per la timo, eĉ prudentan kaj tenatan en sekreto, aŭ la honestan laboron, ĉar ĝi en tia maniero estas kvazaŭa ribelo kontraŭ la sistemo, kiu eldevigas por si mem de sia subularo la ruzecon kaj grandbuŝajn gestojn.

En ĉi tiu koncepto dum la luktado kontraŭ la timo, la

vero havas multe pli da aliancanoj ol permesus enrigardo el loko de ekzistanta revolucio. Al ili apartenas ĉiuj, kiuj fine komprenis la mensogecon de ideologia fasado kaj de tiuj, kiuj supervenkis la pensigeman spasmon. En senmoviĝeco tenas ilin nur la **timo**. Ili agadas reflekse kaj ne enpuŝas la manon al fajro, ĉar ili scias, ke ĝi brulvundiĝus. La politika potenco konas bone tiujn refleksajn kondutojn kaj en ĉiuj strategiaj lokoj zorgas pri tiaj fajretoj, kiuj brulvundas. La brulvundoj estas doloraj kaj malbone resaniĝas. Multaj homoj ne montras ilin kaj kaŝas ilin sub la vestaĵoj. Mi ne scias, kial pro tiu timo per la bruligo ne estus la plej indulgemaj ĝuste tiuj, kiuj la brulvundojn konscie riskas kaj proprasperte scias pri tiaj doloroj.

Lukto kontraŭ la timo sekvas eĉ en la ĉiutageco. Ĉe realista koncepto de tia lukto estas aliancano de vero eĉ fiktiva viro, kiu ĉe partia kunveno reliefigos, eĉ ne pensante pri tio, ke li defendos la veron nur en naiva kredo pri la senpunceto de honestaj intencoj ; li malkovros iom da hipokriteco, kiun li ne konas per la propra praktiko. Sur la kampo de tiaj alianciĝoj estas eĉ racia paŝo de registaro aŭ esprimo de grandanimeco flanke de ŝtatoficejoj mem ; mi ne rememoras pri unu trafa ekzemplo. **Timo** ne estas eterna, ĝia konservado eĉ lacigas, precipe kiam la ideologio, kiu tiun timon subtenas jam de longa tempo, perdis objektivan sencon. Eĉ la socio de timo estas forigebla. Per ekkono kontrolebla per spertoj kaj kondutoj de la eŭropsociaj strukturoj, nuligebla el tio rezultas. En la historia tujo, al kiu kondukas la socia leĝo, sentimeco ĉesigos la rolon de la persona elekto kaj vero kiel aventuro de la nuna socio. Sentimeco estos neevitebla kaj kun la vero ĝi kreas iun antaŭkondiĉon por supervenki la stagnadon de la tutnacia estiĝo, por paŝo al plua ŝtupo de civilizacia evoluado, por forkonduki tiujn danĝerojn, kiujn civilizacia evoluo alproksimigas kaj kompreneble eĉ por la savo de la Paco, kiu estas endanĝerigata ankaŭ nur per la timo, fondita sur la klerigaj mensogoj de ideologio.

Mi supozas, ke ni tiun momenton de ŝanĝo facile rekonos. Ni iros vespere al nia eksamiko kaj li sen timo malfermos la pordon, ni promenados kun aliaj geamikoj kaj ne plu serĉos la kaŝstruon, kiun ni enirus, kaj brulvundoj sur nia haŭto komencos resaniĝi.

-----  
**Kaŝkonketo** : por ke neeŭropanoj pli bone komprenu la signifon, oni diras :

"vivi kiel heliko en sia konketo". (La trad.)

## KELKAJ NOTOJ

Arnold Emanuel (1800 - 1869). Unu el la gvidantoj de ĉefaj rad. demokratoj.

Brava soldato Ŝvejk, satira romano kontraŭmilitisma de ĉeĥa verkisto Hašek Jaroslav (1883 - 1923). Ĝi estis ankaŭ tradukita kaj eldonita fare de SAT.

21-a de aŭgusto 1968 : tago de agreso kontraŭ Ĉeĥoslovakio, preparita en Moskvo.

Ĉarto 77. Libera ligilo de ĉeĥoslovakaj disidentoj aŭ ne, penadantaj por ke la Homaj rajtoj estu aplikataj.

Frič Josef Václav (1829 - 1891). Ĉeĥa politikisto, verkisto kaj ĵurnalisto.

Havel Václav. Nuntempa ĉeĥa verkisto senĉese persekutata, nur pro liberaj opinioj. Aganto de Ĉarto 77.

Havlíček Borovský Karel (1821 - 1856). Ĉeĥa ĵurnalisto kaj politikisto, kiu luktis kontraŭ la absolutismo kaj ĝia obskurantismo. Li estis devigata vivi en ekzilejo de Brixen (Germanio). Nialingve aperis : La bapto de caro Vladimír (Kanariaj Insuloj - 1953).

Hochhut Rolf. Germana verkisto nask. 1.4.1931 en Eschwege. Lia unua dramverko : La reprezentanto (Stellvertreter, 1963).

Jaĥimovaj barakoj. Urbo Jáchymov troviĝas en Ĉeĥio (ĉirkaŭ 5000 loĝantoj). Tie ekzistis la punlaborejoj de ĉefaj stalinanoj.

Konstanco. Germana urbo. En ĝi en j. 1415 estis mortbruligita la ĉeĥa predikanto kaj reformisto de katolikismo Johano Hus (1369 - 1415). Vidu : Konstanca ŝtiparo.

Masaryk Tomáš Garrigue. Ĉeĥa laboristdevena Ph.Dr. de Karla universitato en Prago, kiu fariĝis la unua prezidento de Ĉeĥoslovaka respubliko. Liaj verkoj estis dum milito malpermesitaj kaj denove post renverso de demokratio en j. 1948 fare de Komunistoj - ĉefe pro liaj demokratiaj kaj humanismaj idealoj, kiuj svarmas en lia verkaro.

Palacký František (1798 - 1876). Ĉeĥa historiisto, politikisto kaj kultura aganto.

Rudé právo. Oficiala organo-ĵurnalo de ĉefaj komunistoj.

Sabina Karel (1813 - 1877). Radikaldemokrata politikisto, publicisto, literatura kritikisto kaj verkisto. Laŭdire kunlaboris sekrete kun aŭstraj policanoj.

Slovaka respubliko proklamita 14.3.1939, finiĝis en j. 1945. Dum la dua mondmilito kunlaboris kun Germanio.

Tatro. Nomo de ĉeĥa aŭtomobilo. Ankaŭ tiel nomiĝas montaroj de la norda Slovakio kaj ankaŭ en suda Pollando. La plej alta kulmino 2655 m. (Tatroj).

## La eldonprogramo de SAT-Broŝurservo ekde 1986

Ĉiujare, nia Servo eldonas plurajn **novajn** broŝurojn, reeldonas elĉerp-  
itajn tekstojn, plu liveradante el pli ol 130 jam publikigitaj titoloj.  
Tiom pro la amplekso, la aspekto, kiom pro la graveco de la enhavo,  
temas ja pli pri **libretoj** ol pri tiuj modestaj publikigaĵoj, kiujn  
oni kutime nomas "broŝuroj". Jen la programo ekde 1986 :

### \* PENSOJ DE PASKALO

Temas pri ekstraktoj el la franca originalo. La traduk-  
into, VALO, "flankelasis la partojn kun teologia aŭ pure  
religia enhavo, ankaŭ kelkajn fake filozofiajn, elektante  
tiuajn kun pli ĝenerala signifo". Tiu konservita ekstrakt-  
aro estas certe tio, kion povas ignori neniu kulturama  
homo.

Aperos en marto '86. Prezo : 15 FF

### \* VARSOVIO 1887

Aŭtoro : A. LOPEZ LUNA. Jen facile legebla, romanig-  
ita biografio de ZAMENHOF. Enkonduko de Ergoto de  
Bonaero. Ĝi estas bonvena ankaŭ por komencantoj.

Aperos en aprilo '86. Prezo : 12 FF

### \* NACIIISMO

Reeldono de la fama verketo de E. LANTI, klasikaĵo  
en la laborista E-movado. "La naciismo neniel estas  
pravigebla de la saĝo. Ni ŝatus, ke la leganto akiru tiun  
firman opinion ĉe la finlego de ĉi tiu studo".

Aperos en junio '86. Prezo : 12 FF

### \* ESPERANTO PER INTER-METODO

Aŭtoro : Ant. SLANINA. "INTER-Metodo" estas inter-  
nacie uzebla kurslibro, kiu kunigas la avantaĝojn de la  
rekta metodo kaj tiujn de la t.n. gramatika. Ĝi sin  
turnas al ĉiuagaj lernantoj kaj ebligas asimili la nociojn  
nepre sciendajn por poste uzi senpere kaj profite PIV  
kaj PAG. Kun multaj ekzemploj kaj ilustraĵoj.

Aperos fine de 1986. Prezo : ĉ. 35 FF

### \* FILOZOFIO ZOOLOGIA de LAMARK.

Duonjarcenton antaŭ Darvino, LAMARK komprenis, ke  
la specioj devenas unuj de aliaj per longdaŭraj transform-  
iĝoj...

Aperos komence de 1987. Prezo ne fiksita.

De nun la novaĵoj estas eldonataj en limigitaj kvantoj. Interesatoj  
prefere **abonu**, se ili deziras ne maltrafi elĉerpiĝontajn broŝurojn.  
(minimume 100 FF-provizo rajtigas je 20%-rabato). Ĝiri al :

Cercle amical esp. agenais, pĉk : 3371 74 M Bordeaux.

Nia 21a debato per ĉenletero

(daŭrigo de L! 63)

ANUNCIERO



ĈU  
PROPRUMEMO  
ESTAS  
ĤRONIKA  
MALSANO ?

PRI KONTRAŬPROPRIETISMO, SINPAROLADO,  
ANARĤIISMO KAJ ALIAJ FRENEZAĴOJ  
aŭ  
KIEL PERDIGI PAĜOJN VERKE

Kia elreviĝo ! Eĉ "Laŭte"-uloj opinias la proprietemon  
natura. Necesis legi dufoje lastan "Laŭte"-n, por ke mi kreu,  
ke personoj ŝajne inteligentaj povas vere tion opinii.

Nu, kiel vi jam povis diveni, mi pensas tute male : pro-  
prietemo - aŭ proprumemo, kiel vi diras (indas debati ankaŭ  
la "umumemon") - estas malsano tre disvastiĝinta sed venk-  
ebla. Mi ne scias, ĉu antaŭe iu filozofo - fama aŭ ne -  
asertis tion ; tamen mi povas tion pruvi, kaj jen la pruvo :  
mi mem !

Mi antaŭ nelonge estis eble la plej proprietema junulo  
en la mondo, kaj tiu inklino malebligis min eĉ pruntedoni al  
mia plej aminda amiko la plej senvaloran aĵon ; sufiĉis  
pensi dum ono de sekundo pri perdo de simpla muzikaparato

(pro iu ajn kaŭzo), por ke mi estu la tutan tagon dronanta en la plej suferiga malfeliĉo kaj submetita de nepriskribebla deprimio. Feliĉe, tiu koruptita stato jam pasis : mia apartiĝo for de miaj posedaĵoj, mia humila loĝado kun miaj geavoj, kaj mia esperantistiĝo, igis min forgesi la materiismon. Nun nenia aĵo en la mondo bridas mian animon... Pardonu min, mi ne volis mirigi vin ; kompreneble mi ne estas perfekta. Ĉar mi loĝas en materiisma mondo kaj en konsumisma ŝtato, ene de mi estas alia Mio, alia Memo tiel koruptita kiel mi antaŭe, kaj kies ekzisto igas la sanktecon ankoraŭ neatingebla por mi.

Okazas, ke almenaŭ ĝis nun mi ne sukcesis trovi la manieron forpeli tiun Fimemon el mi, kaj pli-malpli mi jam rezignis enhavi Ĝin (ĉi pronomon mi ne konsideras taŭga por tiu estaĵo, sed mi ne kuraĝas proponi alian, ĉar iu povos ĝin ŝati, uzi kaj eĉ enkonduki). Tial mi profitas Ĝian ekziston kaj proksimecon por babili kun Ĝi dum miaj solecaj vesperoj kaj noktoj. Mi pensas, ke nun estas la oportuna momento por peti, ke Ĝi min enketu, por ke vi vidu, kiel mi malproprietemas.

- Do mi alvokas Cin ; ĉu Ci kuraĝas paroladi denove kun mi ?
- *Se ci tion volas... - (vidu kiel subtile Ĝi insultetas min ciume) - Imagu, ke ci jam ne plu havas cian tornistran ; tiun, kiu akompanas cin ĉiuloke.*
- Tio eĉ ne ŝanĝas mian mienon.
- *Kaj jam ne ekzistas cia utiliga komputilo.*
- Kia bedaŭro. Ĉar ĝi estas de mia frato, tio sendube ĝenos lin. Krom tio, pro la komputilo mi tute ne zorgas.
- *Vidu ! cia ŝategata libro pri Kalkulo ĵus malaperis.*
- Eĉ la plej sensignifan el la ĉeloj de mia cerbo ne ŝokas tio.
- *Atentu ! Oni ŝtelis ciajn "Laŭte"-jn.*
- Kion... ? Bonvolu paroli serioze. Ni ambaŭ scias, ke iĝi estas en la bretaro.
- *Tiel mi parolas. Certigu cin.*
- Tion mi faros tuj...
- ... Fik ! Ci pravas ! Ne plu estas miaj "Laŭte"-j ! Sed ĉu vere fiuloj eniris mian ĉambron por ŝteli nur iĝin ? Ne, ne, ne ; mi tion ja ne povas elteni ; necesas tuja alvoko al la Polico...
- *Polico jam ne ekzistas.*
- Ĉu...? Sed kial ?
- *Ĉar ne estas plu ŝtato, cial anarĥismaj deziroj efektiviĝis.*

- ...?!
- *(Ha, ha ! li jam ekvidas la lumon).*
- En "mia dezirata anarĥiismo" ne ekzistas ŝtelistoj.
- *Verŝajne, kio ne ekzistas, estas mirakloj.*
- ...! Do miaj "Laŭte"-j...
- *Iĝi ne plu estos cial.*
- Sed... kiel mi povos vivi... sen iĝi ?
- ...

En ĉi momento mi surpriziĝis, rigardante fikse kaj avide miaĉambran fenestron kun la nura ideo fuĝi tra ĝi el ĉi inkubo tiel horora. Kaj ĉar tiu fenestro por mi tiel atingeblas, mia loĝejo tiel duaetaĝas, kaj ĝia alteco tiel okmetras ; mi ektimis pro mia vivo, kaj decidis lasi ĉi tiun iluzian sinparoladon ; ne vane vi jam certe rimarkis, kiel mi min tenas rilate proprietemon. Nun, dum mi viŝas mian frunton malsekigitan de ŝvito pro la sufero kaj karesas miajn (feliĉe ankoraŭ miaj) "Laŭte"-jn, mi pensas pri la frazo iam dirita de amiko : "Anarĥiismo lamas... je ambaŭ piedoj". Ankoraŭ mi ne scias, kial tiu frazo venas nun al mia menso.

19851212 (4 K 19) **Pako la tria.**

**Suzanne :**

*Mi ne scias, ĉu mi bone komprenis la demandon...*

*Proprumemo estas inklino regi homojn, kiujn la proprumantoj konsideras kvazaŭ siajn subulojn ; ĉefe en familia rondo, des pli ke ili ofte vivtenas ilin, laŭplaĉe : kiam kaj kiom ili tion decidus... Kaj, ofte, post petado de sia edizno, ekzemple.*

*Por bone konscii, kiel tia vivkondiĉo estas malplaĉa, necesas, post tia spertado, ĝui plenan liberecon, en ĉiuj kampoj. Bedaŭrinde, tio ofte okazas en la fino de onia vivo ; tiam oni komprenas la feliĉon de la proprumantoj kaj ilian deziron konservi tian povon.*

*Pri proprumemo, mi opinias, ke ĝi dependas de ĉiu personeco... ĝi ne estas nepra. Por ĝenerala libereco, proprumemo ne ekzistu. Kelkfoje, la proprumemo estas reago de homoj, kiuj ege humiliĝas en rilatoj kun sia mastro (ekzemple) aŭ potencaj konatoj. Ju pli ege ili humiliĝas, des pli aĉe ili regas. Iuj homoj preferas hundon ol katon (eĉ malamegas tiun ĉi), ĉar la hundo emas submetiĝi. Tio ne signifas, ke ili amas sian hundon !*

*Ĉu la propru(ec)o estas aspiro proprieti ?*

*Ja tiu aspiro ne koncernas la deziron akiri propran domon kun ĉirkaŭa ĝardeno, eĉ kampo. Tute ne ! Ĝi koncernas tiujn, kiuj strebas posedi grandajn bienojn, celante riĉiĝi kaj superi la plimulton, akiri potencon. La malriĉeco estas elemento de la prospero, parto de (ŝtato) pli ĝuste. Parto de iu loĝantaro estas malriĉa, ĉar la alia parto estas riĉa, kaj tiu ĉi neglektas senkompate la alian. La egaleco ne estus en la mizero sed en la libereco, la klereco kaj komforto kun bonhaveco.*

**J.C. Picquet :**

### **PROPRUMECO kaj EKONOMIA KRESKADO**

La temo prezentita de Ĝiz el Lamark estas interesa. Ŝi donas la vidpunktojn pri tiu problemo, almenaŭ en la historio. Sed mi volus reagi sur alia tereno por montri alian flankon de la problemo, en la ekonomia historio.

La bezono havi propran estas, analize, la motoro de nia socio kaj gvidas ĉiajn niajn agojn, en la socia vivo. En nia ekonomia historio, la proprumeco ne dependas de iu libera elekto. Ĝi estas gvidita per la ekonomia sistemo kaj la eblecoj trovi monon. Kreitaj bezonoj kaj reklamoj strukturigas nian vivon.

La usonana inĝeniero Ford trovis iun genian sistemon antaŭ la krizo de 1929. Lia problemo estis : kiel vendi pli kaj pli da aŭtomobiloj (tiu famkonata Ford T), ĉar la produktado estas kreskanta (dank'al Taylor). Ford altigis la salajrojn (5 \$) tage kaj modernigis la produkt-manierojn. Certe oni konas lian faman vorton : "Miaj laboristoj estas liberaj aĉeti Ford T-on, kondiĉe ke ĝi estas nigra".

Tio estis granda revolucio, sed ne povas resti limigita al ununura firmao. La nova sistemo devas modifi la tutan socion.

La krizo en 1929-30 estis la krizo de la sistemo en sia disvolviĝo : la produktado estis kreskanta, sed la aĉetpovo de la pli multnombraj ne kreskis.

Post la dua mondmilito la okcidentaj landoj sukcesis solvi tiujn malaĵojn. La kejnese-kompromiso (Kejnese estis iu fama ekonomikisto, kiu inspiris tiujn solvojn) konsistis en kreskigo de la produktiveco. Tiu monsumo elspezita unuflanken revenis kun granda forto, kiel akvo-fluo, en la grandan ekonomian rondiradon. La familioj aĉetas, enirante novan ekonomian situacion. Konsumante, ili plenigis la proprumecon.

Havi pli kaj pli. Tio estis la slogano en tiu tempo. Rigardu vin mem aŭ viajn gepatrojn kaj la tutan vivoŝanĝon de 1945 ĝis nuntempe ! Je amasproduktado devas respondi amaskonsumado .

Sed nuntempe, ĉiuj scias bone, ke io ne funkcias. La sistemo ne reproduktas sin bone. Kvazaŭ ĝi senspiritigas. Ni vivas la krizon de la produkt-sistemo. La kreskado estas bremsita, ĉar la entreprenistoj por subvencii la investadojn devas preni la monon ie ajn. Se ili haltigas la kreskadon de la salajroj, ili malpermesas la aĉetadon, sed ne limigi ĝian progreson signifas ne trovi monon. La ekonomia kreskado kostas pli kaj pli da mono por la socio (laborakcidentoj, perforteco...) Oni devas pagi la malagrablaĵojn de tiu sistemo.

Ĉu tiu proprumeco, kiu trovas terenon en la konsumada socio, povas esti forĵetita ? Kelkaj opinias, ke jes - la verduloj plejparte. Sed, ĉu ni ĉiuj, kiuj vivas en tiu sistemo, povas imagi kiel ĝi povas funkcii alimaniere ?

Ĉu proprumeco estas kondamnita en sia socia funkcio ? Certe ne.

Sed la sukceso de iu socio ne estas reduktebla nur al pli aŭ malpli da proprumeco. La verduloj, pacistoj, instruistoj al ni. En la ekonomia sistemo, ni havas tamen kelkajn liberecojn. Kial ne instigi ideojn, laŭ kiuj tio, kio estas grava kaj devus gvidi niajn agojn, estas ESTI anstataŭ ol HAVI?

\*\*\*\*\*  
*Eta "dosiero", kiu povus utili kiel enkonduko por ĝenerala debato (ne nur inter ĉenleteranoj!) pri la temo :*

### **"LAŬTE!", ESPERANTO kaj "POLITIKO"**

Letero de abonanto al la red. de "L!" :

"Mi ĵus ricevis L! n° 63. Mia abono estas finita kaj mi ne deziras reaboniĝi. Via broŝureto pritraktas pli politikon ol esperanton, ne estas per tiu rimedo, ke nia universala lingvo estos respektata.

Mi neas ĉiun potencon al politiko, sed mi ankoraŭ kredas al amikeco inter la homoj"

*Ĉar la redaktanto de L! povas respondi nur pri la artikoloj, kiujn li mem "kulpas", ĉiu ajn laŭtulo aŭ laŭtulino povas respondi al tiu kamarado, kiu ĝentile, kvankam, laŭ mi, iom tro malprecize, bonvolis diri, kial nia bulteno ne plaĉas al li. Ni notu, ke temas pri franca k-do (tio povas esti interesa faktoro), kiu abonas "L!" jam de multaj jaroj. Jen teksto de mia letero al li :*

"Kara amiko,

Mi dankas vin pro via letero... Efektive, estas ĉiam tre utile al prizorganto de E-gazeto ekscii pri la kialo de nereabono. Laŭ via letero, mi supozas, ke vi ne bone komprenis la celojn de "L!". Unue, tiu bulteno ne estas posedaĵo mia, sed esprimo de ĉiuj abonantoj. (Sen abonantoj, L! ne ekzistus). Ĝi utilas do por praktike uzi E-on por diskuti pri la temoj, kiuj interesas la abonantaron. Se iuj interesiĝas pri politiko, ili povas uzi L! por pritrakti tiajn temojn. Se aliaj preferas paroli pri gramatikaj aspektoj de Esp-o, ili tion faras. Vi mem povas uzi L! por la temoj, kiujn vi ŝatas - ekzemple por esprimi la vidpunkton, kiun vi ĵus sendis al mi.

Persone, mi tute same opinias kiel vi pri la negativa **efiko de politiko** (almenaŭ pri la efiko de politikaj ideologioj, ĉar "politiko" en la etimologia senco estas tute alia afero)

Mi estas konvinkita, ke ni esp-istoj atendu nenion de politikaj partioj. Profesiaj politikistoj celas la povon pro emo al mono, regado, prestiĝo. Tuj kiam ili ekkaptas la povon, ili celas nur plu teni ĝin.

Mi intencas uzi vian leteron kiel enkondukon por debato pri la temo "L!, Esperanto kaj Politiko". Tiucele, mi ĝojus, se vi povus sendi al mi vian pli detalan vidpunkton - eĉ en la franca lingvo, se vi tion preferas - por ke la enkonduko bone spegulu vian opinion, kiu certe estas ankaŭ tiu de aliaj legantoj de "Laŭte!"...

*El la respondo de nia kamarado (kiu cetere decidis tamen reaboni) :*

"Mi bone komprenis la celojn de "L!", sed tro ofte Esperanto estas uzata de "anti-uloj", kontraŭnukleaj, kontraŭmilitaj, ekologiuloj, ĉiuspecaj pacistoj... la listo estus longa... do "marginuloj" (tion mi ne volas kontesti, la suno brilas por ĉiu), sed tio ege malfavoras nian aferon. Kaj mi ne forgesas la aĉan politikon, tiel la dekstran kiel la maldekstran, kiu faras al ni tiom da malbono. Mi estas nek niĉeano, nek nihilisto, mi persiste kredas, ke la homoj povas interkonsenti kaj interkompreni (dank'al esperanto), ami unu la alian, anstataŭ strebi al interdetruado..."

*Kion vi mem deziras respondi al tiu kamarado ?*

*Kion vi opinias pri la temo "Esperanto kaj Politiko" ?*

*Kaj kian utilon povas havi E-gazetoj, kiel "L!", kiuj nenion pretendas, krom speguli la diversajn vidpunktojn de siaj legantoj ?*

La red.



## VORTOJ DE MALJUNULO

— — —  
valo  
— — —

### KALENDARO EL LA LANDO DE SUNLEVIĜO

*Je la lasta jarŝanĝo mi ricevis donace de japana amiko, L!-abonanto, belegan grandformatan kalendaron. Sur ĉiu monata folio ridetas freŝa junulina vizaĝo en kolora fotobildo, ĉiu tiel ĉarma kaj rava kiel la dek unu aliaj. Vere, oni ne sciis kiun elekti.*

*Ankaŭ en Francio ni havas logajn knabinojn, kaj en tuta Eŭropo de Skandinavio al Andaluzio kaj Sicilio, de Atlantiko al Uralo kaj Kaŭkazo. Ankaŭ en Ameriko, norda, suda kaj centra, blondaj aŭ brunaj. Ankaŭ en nigra Afriko ne mankas agrablaj vizaĝoj sur sveltaj graciaj korpoj. Kaj kion diri pri Antilaj mulatinoj kaj pri Eŭropaziaj mestizinoj ? Ja en la tuta mondo troviĝas belaj amindaj inoj. La vido de iliaj vizaĝoj kaj korpoj, krom la muziko kaj kareso de iliaj voĉoj, estas la lasta kaj sola plezuro, kiun en mia aĝo oni povas ankoraŭ ricevi de ili.*

*Lasta kaj sola - ĉu bedaŭri ? Kiel proksimume tekstas franca proverbo : oni ne povas esti estinta kaj estanta. Necesas elekti : ĉu morti juna, ĉu kontentiĝi per la plezuroj kaj ĝojoj, kiuj akompanas la blankajn harojn aŭ la kalvecon. Nu, ĉar mi konsentis tiel maljuniĝi, mi do limigu min en la ĝuado de miaaĝaj plezuroj. Probable restas al mi malmultaj jaroj, eble nur monatoj, por plu vivi. Mi dezirus almenaŭ foliumi ĝis la dekdua la monatajn foliojn de la bela kalendaro, kaj ricevi en la okuloj la dek du ridetojn el la lando de sunleviĝo.*

### PRI SURSKRIBO SUR MURO

*Sur mia televid-ekrano pasis raportaĵo pri Gvadelupo. En la daŭro de duonsekundo mi ekvidis blankan muron kun nigra grandlitera surskribo : LA NEGROJ EN AFRIKON ! La "beke" (blankrasa kreolo), kiu skribis tion, verŝajne*

ne konscias, ke li estas tre minoritata en tiu departemento, kie loĝas en plimulto kolorhaŭtaj homoj, kaj ke tiuj ĉi rajtus diri : LA "BEKE"oj EN METROPOLAN FRANCION !

Li forgesis, ke li estas praido de la unuaj enmigrintoj, kiuj antaŭ jarcentoj invadis la Antilian insularon kaj masakris la Karaibajn indiĝenojn. Poste tiuj koloniistoj importis per kargoŝipoj, kiel malmultekostajn varojn, amason da sklavoj aĉetitaj aŭ preditaj en Afriko. Tiuj negroj riĉigis ilin per sia pena trudlaboro, dum ili, la blankaj sinjoroj, vivis pigre kaj lukse en la moliga klimato de la insuloj.

Nun la praidoj de tiuj sklavoj, kaj precipe de nigraj sklavinoj gravedigitaj de siaj blankaj mastroj, ekkonscias pri la longa ekspluatado, kaj ekvolas skui la jugon. Kompreneble tio ne plaĉas al la kreolaj mastroj, kutimaj je sia sendiskuta mastreco, kaj kelkaj el tiuj ĉi, aparte stultaj, dezirus forpeli la negrojn al Afriko. Ili ne komprenas, ke sen la negroj kaj diversproportiaj kolorhaŭtuloj, la ekonomio de iliaj insuloj falus en kolapson kaj en mizeron. Tiel sencerbaj estas la ĉieaj kaj ĉiamaj privilegiuloj.

Same, en la metropolo, multaj denaskaj Francoj - ne nur privilegiuloj, sed ankaŭ simplaj laboristoj, - dezirus forpeli kaj reĵeti al ilia devenlando la enmigrintojn akuzatajn pri diversaj kulpoj. Ili okupas la lokon de niaj laboristoj, ili manĝas nian panon. Ili kostas multe al la Socia Asekuro. Ili estas malpuraj, pigraj, mensogemaj, ŝtelemaj. Deliktuloj kaj krimuloj, ili endanĝerigas nian sekurecon, ili minacas nian kulturon. Oni elvokas invadon, kiu fine sufokos nian nacian identecon.

Oni forgesas, ke en periodo de ekspansio, niaj industriaj mastroj venigis tiujn homojn, logante ilin per relative altaj salajroj kompare kun la mizeraj vivkondiĉoj en iliaj landoj. Nun, ĉar la ekonomio ŝrumpis en krizo, la produktado ne havas plu tiomajn bezonojn. La malmultekosta manlaboristaro sen speciala kvalifiko estas anstataŭigebla per robotoj, multekostaj sed pli efikaj, kiuj havigas pli da profito. Oni ne plu bezonas la enmigrintojn. For de tie ĉi, aĉa vermaro ! Ili, precipe la magrebanoj kaj la nigraj afrikanoj, fariĝas propekaj virkaproj, ŝargitaj de ĉiuj pekoj de Izraelo. Kaj iliarilate vekigis la latentan ksenofobio, kiu daŭre dormetas en la menso de la Francoj, fieraj pro sia nacia identeco. Ne memorante, ke ili mem estas praidoj de diversepokaj enmigrintoj : Keltoj, Fenicianoj, Grekoj, Romianoj, Vizigotoj, Frankoj, Saracenoj, Angloj - kiuj estis ofte konkerantaj invadintoj, uzurpantaj alies teritorion.

Kiam do la homoj ĉesos sin rigardi reciproke kiel malamikajn fremdulojn ? Ĉu ne estas nia tasko, al ni esperantistoj, heredantoj de longa kulturo, prezenti al ili la instruon de la grekaj filozofoj, de la saĝa judo Hilelo, de la milda galileano Jesuo kaj de nia Majstro Zamenhof : ke ĉiuj homoj estas fratoj ?

**Valo**

\*\*\*\*\*

**Koffi GBEGLO (Togo) :**

## AFRIKANOJ ESTAS EKSPLUATEMULOJ...

Estas mirinde, ke afrikano diras, ke afrikanoj estas ekspluatemuloj. Tion dirante, mi ne kulpigas samkontinentanojn, sed mi nur ripetas frazon, kiu eliras el la buŝoj de multaj blankuloj neprudentaj, malflegmaj, nepaciencaj, kiuj, laŭ mi, estas ŝajnaj esperantistoj. Kio instigas min tion skribi? Mi tuj klopodos iom paroli pri tio.

Mi venis al esperanto per jena vojo : mi publikigis mian adreson en la ĵurnalo BINGO por havi korespondantojn, kiuj certe estus franclingvanoj kiel mi mem ; dume mi ricevis leteron el Belgio, anoncanta al mi, ke lernante esperanton, mi trafos mian celon. Ĉar mi estas avida je studado kaj mia deziro estas koni ion pri ĉio, mi eklernis la lingvon, kiun mi nun praktikas pli skribe, ol parole. Oni povas tiam kompreni, ke multajn korespondantojn mi havas. Jes, mi korespondas kun samideanoj el multaj landoj, kaj legas multajn revuojn esperantajn.

Iam mi ricevis revueton el Esperanto-Ligo. En ĉi tiu, temas pri afrikanoj, kiuj, laŭ la revueto, estas ekspluatemaj. Oni rakontas en la revuo, ke "beninano petis monon de sia korespondanto. Ĉi tiu sendis mandaton je 20 guldenoj (ĉi tie proksimume 2600 CFA-frankoj) al la beninano, kiu ne skribis alian leteron por danki, sed alia beninano petis monon de la sama blankulo. Pro tio la blankulo decidis ĉesi rilati kun afrikanoj, ĉar, laŭ li, ili estas petemaj, ekspluatemaj kaj maldankemaj." Alia afero estas, ke korespondanto mia skribis al mi, ke alia korespondanto lia, afrikano kiel mi, petis de li monon por fari pantalonon kaj havigi al si kolorfoton, kaj pro tio li decidis ĉesi rilati kun ĉiuj afrikanoj, escepte de mi, kiu, laŭ li, ne same agas kaj estas serioza. Li aldonis, ke li ne povas rilati kun ekspluatemuloj, kiuj profitas de sia esperantisteco por peti de blankuloj kion ajn.

Verdire, ĉi tiuj du kondutoj ege malplaĉis al mi, sed mi



kaŝis mian malkontenton, sciante bone, ke mia korespondanto tion rediros aŭ alia blankulo samopinios. Jes, tio, kion mi supozis, efektiviĝas. Post nelonge mi ricevis leteron el la sama korespondanto kaj li parolis al mi pri aliaj aferoj de ekspluatemo. Li unue riproĉis afrikanojn kaj lulis min, dirante, ke eĉ germano kaj ĉino profitas de sia esperantisteco por fari kion ajn. Kia ironio !

Vidalvide de ĉi tiu situacio mi ne trovas ion diri, ĉar tiuj, kiuj tiel severe riproĉas afrikanojn, estas vervaj esperantistoj. Sed kion signifas Esperanto ? Ŝajnas al mi, ke ili de-Beaufrontas (konsideras esperanton kiel nuran lingvon kaj nenion plian). Esperanto ne estas nura lingvo sed ismo de paco, amikeco, interkompreniĝo, libereco...ktp. Esperantistoj devas sin kompreni kaj sin komprenigi. Kial esperantistoj, kiuj sin konsideras kiel Zamenhofulojn, povas tiel agi al siaj samideanoj ? Kiel esperanto povas disvastiĝi kun sia interna ideo, kiam blankuloj tiel kondutas ? Verdire, tia konduto nur malkuraĝigas triamondanojn, ĉar ili bezonas almenaŭ etan moralan subtenon, estinte longe kaj profunde ekspluatataj de blankuloj. Evidentiĝas, ke afrikanoj petas ion ajn de siaj korespondantoj, sed evolulandanoj devas esti iom indulgaj kaj klopodi scii tion, kio okazas. Sen mensogi, mi povas diri, ke tia petemo ekzistas ĉie en la mondo kaj inter eĉ afrikanoj mem.

Mi havas korespondanton, afrikano, kiu petis de mi, ke mi havigu al li matematikan libreton, fotoaparaton, kaj sendu monon al li por viziti min. Jes, afrikanoj estas komprenemaj : kiam mi sendis la libreton kaj klarigis al li mian situacion, mi miris, legante lian leteron, en kiu li pardonpetas kaj ege dankas min pro la malnova kaj uzita libro, kaj miaj klarigoj. Mi ne ĉesis rilati kun li, ni ĉiuj estas komprenemaj. Kial blankuloj, kiuj sin konsideras kiel superulojn, ne devas tiel agi, por ke aliaj rilatoj kun triamondanoj, aparte kun afrikanoj, kunhelpu la disvastiĝon de la mondlingvo ?

Blankuloj, estu komprenemaj kaj klopodu bone scii kaj mediti la internan ideon de esperanto, antaŭ ol disdividi la mondon en du partojn, ekspluatemulan kaj neekspluatemulan. Unuiĝon de la popoloj tutmondaj en unusola rondo celis Zamenhof. Kial oni devas agi kontraŭe ? Afrikanoj estas bezonemaj (povraj), pro tio ke vi, blankuloj, ekspluatistis la tutan kontinenton kaj ne ĉesas kaŝe starigi ĉie en ĝi hegemoniajn kaj sangajn luktojn. Rigardu Sudafrikon ! Lasu nin mediti kaj plenkore akcepti Zamenhofismon, kaj ne timigu nin, kaj

ne estu malhelpo al ni por la libero, kiun Zamenhof donacas al ni. Blankuloj kaj Nigruloj estas homoj, do estas egalaj. Kial unuj ne devas indulge trakti la aliajn ?

(Kara gvidanto, vi povas publikigi ĉi tiun tekston, por ke samideanoj ĉesu nomi afrikanojn ESKPLUATEMULOJ, ĉar tia konduto bremsos Esperanto-movadon en Afriko). Noto de la red. : Tiun ĉi tekston verkis lernanto de perkoresponda perfektiga E-kurso.

\*\*\*\*\*

**Michèle Freud :**

### FELIĈAN JARON ! BONAN SANON !

*La plimulto el ni promesas je la komenco de la jaro efektiviĝi siajn bonajn decidojn. Se sufiĉus voli !... Sed sufiĉas, skribis la filozofo Alano : "La dezirataj aferoj similas al la monto, kiu atendas vin. Tamen necesas grimpi. Se vi ne supreniras, ne diru, ke vi deziras stari sur la verto. Vi nur revis tion, kiel oni revas kelkfoje, ke oni estas birdo.."*

*La admono estas severa sed ĝusta. Tiu, kiu ŝatus lerni la esperantan lingvon, sed malfermas neniun libron, preferas sian nescion. Tiu, kiu volus helpi la aliulojn, sed atendas, ke ĉi tiuj venu por serĉi ilin, preferas sian trankvilecon. Iuj plendas pri sia soleco sed ili ne faras la unuan paŝon. Do vere, necesas grimpi. Nu, ni eksupreniru nian mensan Anapurnon !*

*Antaŭ ol formuli aliajn bondezirojn, mi havas apartan personon por la malsanuloj, handikapuloj, ekzilitoj, malsataj infanoj, la malbone amataj uloj. Mi sopiras esti suno por varmigi ilian koron, por brili en iliaj okuloj ; mi emus esti lumo por heligi ilian vizaĝon.*

*Jen miaj aliaj aspiroj : Plene ĝuu ĉiun tagon de la jaro ! La mondo renaskiĝu por vi ĉiun matenon ! Ellitiĝu ĉiufoje, ne sur la dekstra aŭ maldekstra piedo, sed sur la pinto de la piedoj, mirigitaj, ravitaj, dankemaj pro la beleco de la mondo. Estu feliĉaj por feliĉigi la aliajn, kaj precipe malavare amu ! La amo-manko elvokas dezerton sen oazo, rozon, kiu senfoliĝas, triste velkinta. Lernu aŭskulti. Aŭskulti estas silenti por lasi la venton susuri, la rivereton murmuri, la birdojn kanti. Aŭskulti signifas lasi sin penetri de muziko, poemo, preĝo, libro, lasi spruci la ĝojon, la entuziasmon de ulo kaj la larmojn de aliulo. Estas en la silento, ke oni povas kapti kaj kompreni la kriojn de la mondo, kriojn de la malespero, de la*

malamo, sed ankaŭ la kriojn de la ĝojo, de la amo, kaj de la espero...

Mi finas per la provenca preĝo : "Donu al ni la kanton de la muelisto, la ĝojon de la ravulo, la bonecon de la pano, la bonan humoron de la vino, la flamon de la branĉfasko, la guston de la ajlo kaj ke restu vivanta la floro de l'amikeco." Tiu ĉi estas delikata, kuraĝa planto, ĝi estas la "mirinda kristnaska rozo". Oni de ĝi ŝiras la petalojn, oni adresas ilin al tiuj, kiujn oni amas. Ni esperu, ke la simpla gesto pluki petalon kaj sendi ĝin, spite al ĉio, kapablu alporti feliĉon en la malgranda grupo, al kiu ĝi estas adresita. Sed unu grupo ankoraŭ unu grupo, ankoraŭ unu, tio finfine povus krei grandan teritorion : estus la komenco de paca kaj frateca mondo...

\*\*\*\*\*

**Valo :**

### **EKZEMPLO PRI ĜENTILECO**

En 1976, en Palma de Mallorca, mi vizitis antikvan franciskan abatejon. Sur la klostro mi renkontis asketaspektan monakon. Mi alparolis lin hispanlingve, petante pri informoj. Li respondis tre afable. Li estis erudiciulo, funde konanta la historion de sia monakejo kaj de la tuta insulo.

Li demandis : "Ĉu vi estas hispano ? - Ne, sinjoro, mi estas franco."

Tiam, kaj nur tiam, li daŭrigis la konversacion en perfekta franca lingvo, sen eĉ pinteto de hispana aŭ kataluna paroltono. Nu, mi estas konvinkita, ke ekde la komenco li klare vidis, ke mi estas eksterlandano, kaj, laŭ mia prononco, franco. Lia demando signifis : "Vi tre bone parolas la hispanan lingvon." (kio tute ne estas vera). Ĝi estis nur signo de rafinita ĝentileco. Mi ricevis ĝin kiel tre diskretan lecionon, kaj mi memoras pri tiu sciencplena religiulo kiel pri perfekta kavaliro.

Verŝajne tiu homo estas sincera dikredanto. Mi ne havas la saman kredon, sed mi volonte konfesas la kvalitojn de tiuj, kiuj kredas aŭ pensas alie ol mi.

\*\*\*\*\*

La jara internacia renkontiĝo de esperantistaj geinstruistoj (Freinet-pedagogio) okazos en CHALLANS (Francio) apud Atlantiko kaj insulo Noirmoutier, de la 8-a ĝis la 18-a de julio 1986. Sin turni al Paul POISSON, 239 rue Victor Hugo, F 37450 ST CYR SUR LOIRE (Francio)

## **ANALIZA GRAMATIKO (8)**

\*\*\*\*\*

### **2-a fantazia vago for de la Fundamento**

Kiom multe da fideluloj forgesis, ke la afiksoj estas parto de la Fundamento kaj senĝene, senmedite adoptis la anstataŭigon de la zamenhofa belsona "-uj" per "-i" por la landnomoj! Tiom, ke kreigis neignorebla problemo pro la "demokratia" pezo de la nombro, kvankam ĝenerale la nombro ne estas garantio de saĝeco. Aldoni al "-land" kaj "-uj" alian samsignifan sufikson nur pligrandigis la regantan konfuzon kaj solvis nenion.

Kredeble, kio inklinigis multajn akcepti tiun kontraŭfundamentan ŝanĝon estis la konsidero, sen rilato kun la lingvo, ke por la okcidentaj okuloj de la leterportistoj kaj de ĉiuj, kiuj ne konas la lingvon kaj la sonon de la litero "jo", impresas malbele legi Francuĥo aŭ Francuĵo, Germanuĥo aŭ Germanuĵo, sed pro tiu ĉi zorgo oni devus ŝanĝi konsekvence ankaŭ la pluralon, kiu, fine de la vortoj, sonas por ili ankoraŭ pli malbele, kaj ankaŭ plurajn literojn, manio tiu ĉi, kiu jam fariĝis endemia en Esperantujo.

Oni argumentas, ke "-io" estas pli internacia. La vero estas, ke en la eŭropaj lingvoj troviĝas landnomoj finiĝantaj sufikse per "-i" plus "a" aŭ "e", same kiel en Esperanto (Aŭstralio, Liberio, Kolumbio), sed tute ne regule kaj ĝenerale; sekve tio ne estas taŭga argumento.

Male, nur la arta lingvo havas por vasta apliko la sufikson "-uj", samsignifan kiel "-land" por distingi la landnomojn laŭ la nomo de la loĝantoj, same kiel ĝi distingas per aliaj afiksoj kaj finaĵoj la individuecon, la kvaliton, la profesion, la loĝantojn, la sekson, k.c., kaj ankaŭ la gramatikajn partojn, kio tiom kontribuas al ĝia facileco.

Bedaŭrinde, kaj tio portis min escepte rigardi ekster la Fundamenton, la uzo de "-uj" ne estas ĝenerala kaj por ĝi ne estas fiksitaj precizaj limoj. Plena Gramatiko de Esperanto, verko ekskluzive aposteriora, kiu baziĝas nur sur la konstatitaj faktoj, sur la uzata lingvo, diras, ke ĝi estas uzata nur por eŭropaj kaj aziaj landoj, kaj ke en la landoj de Ameriko kaj Afriko la lando donas nomon al siaj loĝantoj ; tamen tuj sekve ĝi aldiras, ke oni povas renkonti Egipto (egiptano) kaj Egiptujo (egipto), kio kontraŭdiras la regulon, kaj ke preskaŭ ĉiam oni diras Svislando, Skotlando, Finnlando, kaj krome ofte Britlando, Ĉeĥoslovakio, Estonio, Germanlando, Greklando,

Hungarlando, Aŭstrio, Jugoslavio, Ruslando, Svedlando, Sove-  
tio, kaj ke ĝi ne diras la kialon, kaj jam sur la deklivo de  
esceptoj, ĝi aldonas la provincnomojn Brandenburgo, Alzaco,  
Karintio, Savojo, Kastilio, Katalunio, Moravio, Pikardio,  
Provenco, Vestfalia, Apulio, Toskanio, k.a., kaj diras, ke iuj  
devenas de la loĝanto : kastiloj, katalunoj, apuloj, toskanoj,  
kaj la ceteraj esprimas la loĝantojn per "-ano" (brandenburg-  
anoj, alzacanoj, k.t.p.).

Por kompletigi la konfuzon ĝi diras la avantaĝojn anstataŭ-  
igi la Fundamentan "-uj" per "-i" laŭ la propono de H. Hodler,  
favore akceptita de granda parto de la esperantistaro.  
Kaj post tio plena ĥaoso estas atingita, ĉar kiel scii, ĉu la  
loĝantoj de Estonio, Libio, Aŭstrio, Aŭstralio, Ĉeĥoslovakio,  
Kastilio, Moravio, Pikardio, Sirio, Italio, Francio, Rodezio,  
Izraelio, k.c., estas estonoj, liboj, aŭstroj, aŭstralaj, ĉeĥos-  
lovakoj, kastiloj, moravoj, pikardoj, siroj, italoj, k.c., aŭ  
estonianoj, libianoj, aŭstrianoj, ĉeĥoslovakianoj, kastilianoj,  
moravianoj, pikardianoj, sirianoj, italianoj, k.t.p. ?

Por la hispanaj "Castilla" kaj "castellano", ĉar la nomo,  
"tero de kasteloj" ne devenas de la loĝantoj, konvenus la  
similaj Kastilio kaj kastiliano, sed nenio pravigas derivigi de  
katalunoj, Katalunio, anstataŭ Katalunujo. Kabe (ĉu estis  
jam iu pli kompetenta ?) uzis Egipto kaj egiptanoj, konforme  
al tiu regulo pri Afriko, sed en PIV troviĝas nur Egiptio =  
Egiptujo, kaj, por la loĝantoj, egiptoj.

P.G. diras, ke en la landnomoj finiĝantaj per lando, oni  
ne uzas -ujo kaj la landanon oni nomas per "-ano". Nu, tio  
estas klara pri tiuj landoj, kies nomo ne devenas de la loĝ-  
antoj (Nederlando, Holando, Islando kaj Irlando), sed ne pri  
la ceteraj, ĉar tio signifas duoblan derivadon, de sviso, Svis-  
lando, svislandano, kaj ke la landanoj havas du nomojn. Kial  
ne diri nur greko, Grekujo, anstataŭ, krome, Grekio, Grek-  
lando kaj greklandano ? Kaj, inter tiom da esceptoj, kial ne  
diri kiel la propraj nacioj, Italio, italianoj, same kiel oni  
diras Aŭstralio, aŭstralianoj ? Kial diri Liberio, liberianoj,  
kaj, kun Egiptio, ne egiptianoj ? Kial el la amerikaj Chile,  
chileno, oni ne faris Ĉilo, ĉilano, anstataŭ Cilio, ĉiliano ? Laŭ  
tiu regulo, ĉar amerika lando, oni devus diri Patagonio, pata-  
goniano, anstataŭ, kiel en PIV, Patagonio = Patagonujo, el  
patagono, kaj, en Afriko, kiel Liberio, liberiano, Kameruno,  
kamerunano, Zairo, zairano, anstataŭ Kamerunio, Zairio.

Pri la aziaj landoj la konfuzo estas ĝenerala. Oni trovas  
en PIV, derivitan de la dua nomo de Jakobo, Izraelo, la

landnomon Izraelio, kaj de ĉi tiu, izraeliano, sed ankaŭ Israelo  
= Izraelio. Nia facila, simpla lingvo ! Jordanio prenas la  
nomon de la rivero anstataŭ de la loĝantoj, Irako, Irano,  
Indonezio, Vjetnamo, Libano kaj multaj aliaj ne prenas la  
nomon de la loĝantoj, dum, en la uzata Esperanto, Arabujo,  
Ĉinujo, Hindujo, Japanujo, jes, sed oni ne scias kial. Evidente,  
tiu regulo ne estas gvida.

Leginte tion ĉi, kio ne estas ĉio, ĉu iu povas konsideri,  
ke ĉi tiu parto de la lingvo estas kontentige klara kaj sim-  
pla ? Sendube iuj senzorge aŭ pasie diros : ni lasu la lingvon  
nature disvolviĝi ! Sed multaj ne. Por tiuj ĉi mi montros du  
eblajn solvojn.

### 1. Revolucia, radikale simpla solvo.

Tia estus forĵeti definitive "-uj" kaj distingi ĉiam sen-  
escepte ĉiujn landojn, provincojn aŭ regionojn per la finaĵo  
"-io", kaj el tiuj landnomoj fari la nomon de la loĝantoj jene :

Arabio, arabianoj, Italio, italianoj, Liberio, liberianoj,  
Argentino, argentinianoj, Manĉurio, manĉurianoj, Libio,  
libianoj, Izraelio, izraelianoj (komparu kun izraelidoj), Hispa-  
nio, hispanianoj, Andorio, andorianoj, Sanmerinio, sanmerini-  
anoj, Ĉilio, ĉilianoj, Gvatemalio, gvatemalianoj, Urugvaio,  
urugvaianoj, Romio, romianoj (de la moderna Romo, romanoj),  
Vestfalia, vestfalianoj, Usonio, usonianoj, k.t.p. sen ia escepto.

Tiu ĉi solvo povas ŝajni tro unuformiga, ne konforma al la  
formoj de la naturaj lingvoj kaj rompanta la tradicion en  
Esperanto ; sed ĉio estas relativa. La tradicion oni jam rompis  
per la ŝanĝo de "-uj" per "-i", kaj estas tre malfacile tion  
ripari ; la nunaj Esperantaj formoj multfoje estas malsimilaj  
al la naciaj, kaj, rilate al la unuformeco, oni uzas nur tre  
malofte la nomojn de landoj kaj landanoj, multe pli malofte  
ol tiujn de profesioj, iloj, inoj, emoj, k.c., sekve, tio ne mis-  
impresus.

### 2. Konservativa, reguliga solvo.

Konservativa, prudenta solvo estus reveni ĉiuj al la Funda-  
mento, sed racie reguligita, uzante la sufikson "-uj" ekskluzi-  
ve kiam la land- aŭ region-nomo devenas de gento, kaj  
derivante de la ceteraj landoj aŭ regionoj, kies origino ne  
estas genta, la loĝantojn per "-ano".

Tio ĉi estus relative facila, precipe pri la naciaj nomoj,  
ne grandnombraj, ĉar gentdevenaj nomoj troviĝas nur en la  
areo de la antikva civilizita mondo ; sed ĉiu ŝanĝo signifas  
disrompon, kaj ĉiu ago kaŭzas reakcion. Tamen la mondo ne

povas halti, kaj la esperantistoj devus esti homoj progres-amaj, ĉar esperantismo estas ideo de progreso.

Necesus internacia kunlaborado por fari liston oficialig-otan post zorga kontrolado, kaj ke ĉiu kunlaboranto klopodu eltrovi la devenon de ĉiu landa aŭ regiona nomo en la res-pektiva lando. Ĉar ne ĉiam tiu ĉi deveno estas konata, pri kelkaj landoj la nomo devus esti arbitracie decidata, sed fine Esperanto havus fiksan landnomaron kiel la naturaj lingvoj.

Kiel en Oceanio -- Aŭstralio, aŭstraliano, Nova Zelando, novzelandano, Nova Kaledonio, novkaledoniano, Melanezio, melaneziano, Mikronezio, mikroneziano, Polinezio, polinezi-ano, Nova Gvineo, novgvineano, Borneo, borneano, Sumatro, sumatrano, Javo, javano, Celebeso, celebesano --, en Ameriko ĉiuj landoj donis nomon al la loĝantoj, kun la sola escepto de la plej suda, kies loĝantojn, la Tehueĉojn, la hispanaj konkerintoj nomis patagones (grandpieduloj), kaj el tiu alnomo la landon Patagonia. Konsekvence, en E-o devus esti nur patagono kaj Patagonujo.

En Afriko devus esti kun "-uj" nur el maŭroj, Maŭrujo, kaj, eble, el abisenoj, Abisenujo kaj, el etiopoj, Etiopujo, ĉar la etimo de Etiopio estas bruligita aŭ rostitaspekta, nomo kiun oni aplikis al ĉiuj landoj de negroj, estas supozeble, ke ĉi tiu nomo signifis negro-lando, sekve, etiopo signifus negro. Ĉiuj ceteraj afrikaj landoj donas nomon al la loĝantoj : angolano, alĝeriano, kamerunano, eburiano, kongolano, ĉadano, egiptano, gabonano, ganaano, gambiano, gvineano, kenjano, libiano, madagaskarano, maliano, mozambikano, marokano, niĝerano, niĝeriano, rodeziano, senegalano, somaliano, sudanano, sudafrikano, tanzaniano, zambiano, k.c.

En Azio, Arabujo, Turkujo, Mongolujo, Afganujo, Malajujo, de araboj, turkoj, mongoloj, afganoj, malajoj kaj eble iu alia, sed la ceteraj, ĉar ne gentdevenaj, sen"-uj", kaj el ili la loĝ-antoj formiĝas per "-an" : Koreo, koreanoj, Kamboĝo, kamboĝ-anoj, Birmo, birmanoj, Nepalo, nepalanoj, Omano, omananoj, Jemeno, jemenanoj, Irako, irakanoj, Irano, irananoj, Sirio, sirianoj, Jordanio, jordanianoj, Pakistano, pakistananoj, Siamo, siamanoj, Tajlando, tajlandanoj, Vjetnamo, vjetnamanoj, Indonezio, indonezianoj, Izraelio, izraelianoj k.c.

Ĉi tiu regulo nepre ŝanĝas la tradiciigitan nomon de la tri plej grandaj aziaj landoj, kies nomoj ne devenas de gento : Indio kaj indianoj (de la rivero Indo), Ĉino, ĉinanoj, kaj Japano, japananoj, anstataŭ Hindujo, Ĉinujo, Japanujo, sed tiaj, tiuj ĉi landnomoj similas pli al tiuj de la aliaj lingvoj;

cetere, ĉar pli naturaj kaj pli internaciaj, ili estas pli opor-tunaj. Ja impresa forstreko de la sufikso, sed tiom multe estas forstrekinda en nia tro longtempe misuzata lingvo !

Plej multe abundas la gentdevenaj nomoj en Eŭropo. Konvenas, do (se mi ne eraras, kio estas facile kontrolebla) formi la landon per "-uj" el la gentaj nomoj francoj (el frankoj), norvegoj, svedoj, rusoj, belgoj (?), germanoj, poloj, ĉeĥoj, hungaroj, jugoslavo, grekoj, britoj, rumanoj, bulgaroj, latvoj aŭ letonoj, iberoj, flandroj, finnoj, eble albanoj...

Ne estas gentdevenaj la nomoj de la landoj Islando, Neder-lando, Irlando, Andoro, Sanmerino, Monako, Lienĉestejno, Luksemburgo, Portugalio, Aŭstrio (= orienta regno), Hispanio, Italio (el la nomo de la greka reĝo Italo), Soveta Unio,\* Sovetio... Oni devus diri, do, italianoj, hispanianoj, aŭstrianoj, andoranoj, luksemburganoj, monakanoj, irlandanoj, sovetianoj, k.t.p.

El la regionaj, estas gentdevenaj, Katalunujo (lando de gotoj), Andaluzujo (duba), Asturujo, Vaskujo, Galegujo, Bretonujo, Lombardujo, k.t.p.

Ne gentdevenaj estas Kastilio, Aragono, Murcio, Valencio, Ekstremaduro, Leono, kaj multaj aliaj en Eŭropo. La loĝantoj estas kastilianoj, aragonanoj, valencianoj, murcianoj, ekstre-maduranoj, leonanoj, k.c.

En regula Esperanto, nur post landnomoj kun "-uj", ĉar devenantaj de la loĝantoj, ne povas esti la sufikso "-an". Male la loĝantoj deriviĝas de ĉiuj ceteraj landnomoj per "-an", eĉ se ili havas alian landespriman sufikson, kiel Jordanio, Izraelio, Liberio, Tajlando, Nederlando, Turkeŝtano, Beluĉis-tano, tial ke ilia origino ne estas genta. Jordanio devenas de la rivero Jordano, Izraelio, de la patriarko Izrael, Pakis-tano, de la sendependiga movado, k.t.p. Pro tio, ĉar "Afganis-tano" signifas "tero de Afganoj", konvenas diri "Afganujo".

Al la afrikaj landnomoj, kiuj ricevis la nomon de monto, rivero aŭ lago, prefere ne apliki landan sufikson kaj diri simple Kongo, Kameruno, Gambio, Ĉado, Kenio, k.c. Niĝero kaj Niĝerio estas malsamaj landoj.

Estas grava kunmetad-eraro diri Nov-Zelando, Nov-Gvineo Nov-Jorko, sed ne erare, sed ĝuste, diri novzelandano, novzelandano, novjorkano, k.c. Komparu : belvizaĝa, dusenca, facil-anima.

-----

\* Trafe ruso diris ke, laŭ la reguloj formulitaj de mi, li komprenis ke oni devas diri Soveta Unio, sed ne Sovet-Unio, ĉar la URSS, kvankam soveta kaj lando de sovetoj, ne estas unio de sovetoj.

Pro tio ke "-ujo" signifas "lando", la vortkunmetad-reguloj permesas ĉiam anstataŭe diri Greklando, Franclando, Pollando, Germanlando, k.t.p., ĉar lando de grekoj, de francoj, k.c., sed estas pli bone uzi "-uj", kaj diri nur grekoj, poloj, kaj ne greklandanoj, franclandanoj kaj pollandanoj, ĉar tio estus pleonasma.

La sociaj amasoj inklinas stagni, kiel rano en marĉo, sed vi, kiel individua konscia esperantisto, devus mediti pri tio, kiu el la du solvoj estas pli konvena. Kirurgia operacio urĝas. Ĉu oni desekcu "-uj", aŭ "-i" ? Nepre la nunan ĥaosan sen-norman duoblecon.

L. Mimó

\*\*\*\*\*

Por nia medito :

### Fragmentoj el leteroj de E. LANTI

"...Pli kaj pli fortiĝas mia konvinko, ke la esp-a afero estas treege grava, ke ĝi estas ŝtonangula fundamento de la konstruenda mondo, al kiu ni sopiras. Kaj kiam mi konstatas, ke la esp-a movado ne rapide kreskas, nun mi ne plu estas mirigata. Kio mirigas min, tio estas, ke ĝi ne mortis... La alpreno kaj praktikado de mondlingvo estus tia revolucio, ke estas tute normale, ke la registoj kaj regaspirantoj ne volas helpi al tia entrepreno...

Vi eble scias, ke en la komenco de mia esp-a kariero mi varbis Henrikon Barbus al esp-o. Tiam li skribis : "Esp-o estas la A.B.C. de la internaciismo". Nu, jes, sed li ne lernis nian lingvon kaj tio signifas, ke li restis internaciista analfabeto. Ĉu do ne estas al vi klare, ke la internaciisma mondo tute fiaskis en sia tasko por unuigi la laboristojn el ĉiuj landoj ? Kaj ĉu do ne estas tre pripensiga la fakto, ke la gvidantoj de la 1-a, 2-a, 3-a kaj eĉ 4-a (Trockia) Internacioj, ĉiuj ignoras esp-on ?

Nur Hitler parolis konsekvence, kiam li diris, ke "la uzado de sennacieca lingvo povas nur difekti la naciecan senton ĉe ties uzantoj". Jes ja ! Bedaŭrinde en la esp-a movado la granda plimulto estas nur esperantanoj, sed ne esperantistoj...

Verŝajne en Eŭropo la esp-a afero eniros katakomban periodon. Kaj estas al mi ĉagrene, ke en Ameriko oni ŝajne ne kapablas daŭrigi la laboron, komencitan en Eŭropo.

Rilate al via aludo pri la "malgrandaj nacioj", mi petas, ke vi pripensu jenon : la sennaciistoj estas tiom malmultenombraj, ke ili neniel povas influi sur la historian procezon. Sed mi konsentas, ke la devo de ĉiu internaciisto estas volontuliĝi en la

britan armeon. Se vi mem estas internaciisto, nu!?!..."

(El letero al kdo D., 26.8.40)

### KROMRECENZO

Kiam oni pensas, ke tiu teksto estas skribita de Moseo, kaj ĝi signas nur ideon, kiun li mem havis pri dio, tiam oni ne tro miras. La homoj ja kreis diojn laŭ sia propra imagpovo. Sed estas absolute neeble akordigi tiun kaprican, malican faron kun la ideo pri ulo, kiu estus ĉiopova, senlime bona kaj saĝa. Laŭ la Mosea teksto oni povus konkludi, ke se la homoj havus nur unu lingvon, ili enirus la ĉielon, t.e. artefarus (brikoj kaj bitumo) el la tero paradizon. Tion evidente la juda kaj kristana dio ne volas. La tero devas esti infero, loĝata de diverslingvaj patriotoj, kiuj buĉas sin reciproke...

La **Nova Testamento** signas moralan plialtiĝon en la koncepto pri Dio. Moseon mense superas Jezuo. Tamen ni vidas, ke li ankaŭ ne ĉiam parolas saĝe kaj mildkore. La Eternulon el la **Malnova Testamento** li cetere ne malkonfesis. Sekve, la kristanoj absolute ne rajtas pretendi, ke ilia moralo superas tiun de Budao, Zaratustra, Sokrato aŭ Hilel. Ĉe tiu ĉi lasta saĝulo Zamenhof trovis la principojn por sia **Homaranismo**. Se tion ne scias s-ro Ĝons, S-ano G. Furhammar ne rajtas ĝin ignori. Nia Majstro ja ne bezonis sin turni al la Krucumito kristana, por ricevi bazajn principojn por sia ideologia konstruo.

Rilate al la budaismo, ŝajnas, ke s-ro Ĝons havas tre supraĵan scion pri ĝi. Laŭ asertoj de eminentaj budaistoj, estas vere, ke Ŝakjamuni konsideris, ke la fincelo de nia vivo devas esti la atingo de stato, kiu nebligas renaskiĝon. Sed la sekto Ŝin, ekz-e, klarigas, ke temas nur pri surtera renaskiĝo, kaj ke tiuj, kiuj atingis nirvanon, renaskiĝos en la Pura Lando aŭ Mondo de Feliĉo, kiu estas iu paradizo. En la budaismo eĉ troviĝas la teorio pri dia graco, laŭ kiu Budao (Ŝakjamuni) estus la enkorpiĝo de Amida (la budao el senfina lumo aŭ la supera memo). La budaistaj metafizikistoj neniel malsuperas la kristanojn. Oni devas scii, ke la budaista kanono konsistas el 6771 libroj, dum la kristana havas nur 66.

Tre notinde estas, ke Budao, same kiel Sokrato kaj Jezuo, skribis nenion. Oni konas lian instruon nur per kelkaj el liaj disĉiploj, kiuj ne ĉiam akordiĝas inter si. La samon oni povas diri pri la kvar evangeliistoj. Almenaŭ mi konfesas, ke la legado super la budaistaj skriboj ofendas kelkfoje mian racion, dum tiu super la Biblio ofendas ne nur mian racion

sed ankaŭ mian koron.

La Malnova kaj Nova Testamentoj simple spegulas la spiritalon de la epokoj, en kiuj ili estis verkitaj. Nenion dindan mi trovis en tiuj ofte konfuzaj skriboj. Ĉio saĝa, kio troviĝas en ili, povas ankaŭ esti trovata en la paroloj de saĝuloj el diversaj epokoj kaj mondpartoj.

Kion ni konkludu el tio ? Simple tion, ke homoj kapablis elpensi moralajn principojn, same kiel ili ankaŭ elpensis geometriajn aksiomojn. Kaj devas fariĝi evidente por ĉiu, ke necesas obei al tiuj principoj, por ke la homa socio funkcii harmonie. Sed tiu natura, racia moralo havas nenion komunan kun la ritoj kaj ceremonioj, per kiuj la diversaj religioj vestas ilin, kio havas kiel rezulton, ke tiaj vestoj plejofte kaŝas nur hipokritecon.

Sed mi ne havas la iluzion, ke baldaŭ la popolamaso kapablos kompreni kaj praktiki la senritan moralon de Sokrato. Tamen la instruo de tiu greka saĝulo ŝajnas al mi pli altnivela ol tiu de Kristo. Lia morto per eltrinko de cikuto evidentiĝas, ke la tiama greka socio estis pli altnivela ol tiu de la judoj, kiuj praktikadis krucumadon...

Kredeble s-ro Ĝons rimarkigus al mi, ke la kristanismo tamen enplantiĝis en Oriento kaj ke tio pruvas, ke la tieaj konvertitoj opiniis, ke ĝi superas ilian tradician, miljaran religion. Al tio mi povus rebati, ke la budaismo ankaŭ sukcesis varbi adeptojn en kristanaj landoj. Sed mi eĉ ne emas uzi tiun faktecian argumenton, tial ke ĝi ŝajnas al mi superflua, por klarigi la konvertiĝon de orientanoj, relative malmultaj, al la kristanismo.

En Okcidento, paralele al la mistikismo evoluis la tekniko, kio havis kiel rezulton la konstruadon de mirindaj maŝinoj produktaj aŭ detruaj. Oni facile komprenas, ke la okcidentanoj kun siaj militŝipoj, armitaj per kanonoj, forte impresis sur la meditemajn orientanojn. Multaj el ili emis kredi, ke la dio de la maŝinhavantaj homoj estas pli potenca ol iliaj dioj, kaj tial okazis konvertiĝoj.

Sed oni povas observi en Japanio, ekzemple, ke laŭgrade kiel orientanoj asimilas la sciencan kaj teknikan el Okcidento, same ankaŭ ili estas malpli influeblaj per la kristanismo. Jam de pluraj jaroj ĝi ne plu progresas en la Lando de la Sunleviĝo. Kaj tie estas okulfrape, ke neniu el la malmultaj preĝejoj kristanaj povas konkuri pri belo kaj impono kun budaistaj temploj.

La multkonfesiaj kristanoj, kiuj ne sukcesas interkonsenti

pri la "veraj" instruoj de Jezuo, devas lerni modeston. Kaj por tion fari eĉ devus sufiĉi la konstata fakto, ke deistaj liberpensuloj kaj eĉ ateistoj vivas tamen morale kaj virte, kvankam ili ne atendas postmortan rekompencan kaj neniel timas iri en inferon. Kaj mi ankaŭ povus rimarkigi, ke ne ĉiuj kristanoj agas en la vivo laŭ imitinda maniero...

Nu, la temo estas tre vasta kaj mi celis nur montri mian intereson pri leginda libro.

(Tiu artikolo aperis en "Satana Bulteno", n-ro 6, Nov. 1941. Ĝi estas la daŭrigo de artikolo aperinta en la n-ro 5, kiu mankas en la arkivo)

\*\*\*\*\*

## MALSAMAJ PACMOVADOJ

La 15an de decembro 1985, la Distrikta Estraro (DE) de Bulgara Esperantista Asocio (BEA) en S.Z. okazigis simpozion, dum kiu unue estis celebrata la laŭvica datreveno de la naskiĝo de L.L. Zamenhof, la aŭtoro de ESPERANTO. Prelegis Kunĉo Vâlev, ĝenerala sekretario de BEA ĝis la 06-07-1985, pri L.L. Zamenhof. Tre elokvente, emocie kaj kortuŝe li rakontis pri la karaktero, ideoj kaj faroj de Zamenhof. Forte li akcentis pri la bonkoreco, modesteco, sindonemo, malavaremo, pacamemo, nereligio, toleremo, sennaciemo kaj homarismo de Z. Aparte li atentigis la aŭskultantojn pri lia pacamemo, kiu instigis lin en lia dum lernanta aĝo krei facilan internacian lingvon, pere de kiu interkompreniĝu la tuta homaro kaj forigu la militojn inter si. Same la preleganto sentis bezonon pli detale karakterizi pacamon de Z., klarigante, ke li estas PACIFISTO, kiu kontraŭas ĉiun militon sendistinge de ĝia klasa karaktero. Entuziasme aprobante ĉiujn aliajn karakterizojn, ideojn kaj farojn de Z., li klare deklaris, ke "ni", la gvidantoj de Esperanto-Movado el marks-leninismaj Ŝtatoj, ne povas kaj ne devas akcepti Zamenhofan pacifismon, ĉar, laŭ la leninisma kompreno de la paco kaj milito, la homaro devas batali kontraŭ imperiismajn, konkeremajn, maljustajn militojn, nepre devas subteni la militojn por sendependiĝo, liberigo, justo, kiuj, laŭ li, estas sanktaj militoj patriotaj.

Tiuj eldiroj de K.V., kiam oni scias, ke li estas aktivulo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), klare montras kiaj estas la sintenoj de MEM al la problemo PACO-MILITO. Estas tute klare, ke veraj, konsekvencaj MEM-anoj ne estas principaj militrezistantoj, ili ne estas kontraŭuloj de militoj efektiviĝataj de marksleninismaj Ŝtatoj, same ili ne estas kontraŭuloj de la armeoj kaj konstanta perfekta armado

de tiuj Ŝtatoj. Ili estas nur pacbatalantoj kaj militrezistantoj kontraŭ militoj kontraŭantaj marksleninismajn ŝtatojn kaj ties aliancinojn. La pacismo kaj revolucia agado de la marksleninistoj dum lastaj sepdek jaroj klare montris, kiom perfekta militarismo estas. Marksleninistaj MEM-anoj preferas paroli kontraŭ danĝero de termonuklea milito, sed ne kontraŭ militoj efektivigataj per "konvenciaj armiloj", ĉar ili esperas, ke post tiaj militoj ili sukcesos konkeri la tutmondan homaron kaj trudi al ĝi la sorton, kiun nun havas la regataro en marksleninismaj ŝtatoj.

Tamen, tiaj ne estas la konceptoj, la deziroj kaj voloj de la pacbatalantoj-militrezistantoj neestantaj marksleninistoj. Ili devenas de tutmonda homara medio el regatoj, kiuj ĉiam - en pasinteco, nuno kaj estonteco - totale suferas pro armado kaj militoj, sendepende ĉu ili vivas ekster aŭ en marksleninismaj Ŝtatoj. Ili estas tute pravaj, volante kompletan malarmadon ĝis NUDAJ MANOJ por tuta homaro, kiel ili mem estas. Same ili estas tute pravaj, volante forigon de ĉiuj militistoj, militarmeoj kaj ĉiuspecaj militoj.


Jen du malsamaj pacmovadoj kun du malsamaj komprenoj pri la paco, milito, armiloj kaj armeoj. La historio tuhomara dum lastaj dekkelkaj jarmiloj tute klare montris al la tutmonda homaro regata per armitaj armeoj de ĉiuspecaj regatoj, ke ĝi ne bezonas armilojn kaj armeojn por vivi paco en tutmonda konsento tuthomara.

Leganto el orienteŭropa lando.

Pri tiu ĉi supra temo traktos venonta debato per ĉenletero. (N.d.l.red.)  
\*\*\*\*\*

#### NIA KRIMINALA FELIETONO (nova serio)

La 15an de januaro 1985, Jean-Pierre GAUTHIER, kiu opozicias kontraŭ la uzado de armiloj, sendis peton por statuto de soldatservrifuzanto al sia oficejo pri nacia servo. Oni tuj respondis al li, ke li havas dutagan malfruon - ne unu pli - rilate al la leĝa templimo, kaj ke lia peto estas rifuzita. Alvokite por la soldatservo, Jean-Pierre prezentis sin al sia kazerno la 21an de aŭgusto 1985, kaj tie refaris peton por civila servo kaj rifuzis surmeti uniformon. Akuzate pri oberifuzo, li aperis dum la posttagmezo de la sama tago antaŭ tribunalo en Nancio, kiu kondamnis lin al unu jaro da mallibero sen prokrasto. Adreso : Jean-Pierre GAUTHIER, n° 914 c 318, centre pénitentiaire, B.P. 24, F 03401 YZEURE CEDEX, Francio  
Post oberifuzo en junio 1979, Gilles Récoché estis amnestiata en aŭg. 1981. Revokite por la soldatservo en 1982, li denove estis deklarata oberifuzinto. Arestite la 4an de dec. 1985 en Grenoble, li estis sendata al la arestejo Montluc en Liono. Li baldaŭ estos juĝata pro soldatservrifuzo kaj oberifuzo



### KVADRATURO, DIAGONALO KAJ ZENONO

Mi estis decidinta, ke mi ne plu diskutos kun BGD el Eymet, sed mi ne povas lasi senresponda lian lastan artikolon (L! 63). Li ja obstinas pri sia "racionala" valoro  $PI = 3,1406$ , kiu estas ne nur malpreciza, sed falsa ekde la 3a decimalo.

Li pretendas demonstri per kalkulo, ke tiu valoro estas pli ĝusta ol  $3,1416$ , sed kion fakte li demonstris ? Ke tiu valoro kondukas al kvadrata areo pli proksima de  $14 \times 14 = 196$ , kiun li arbitre elektis. Mi diras : arbitre, ĉar li neniel pravigis tiun elekton. Li prenis ĝin kiel postulaton, kalkulis per ĝi sian "racionalan" PI, kaj per inversa kalkulo kompreneble atingis la deziritan rezulton. Lia kvadraturita cirklo estas magia cirklo, aŭ serpento, kiu mordas sian propran voston. Mi nomas tion blufa ĵonglado.

Koncerne la diagonalon, efektive ĝi estas ne mezurebla per la sama longunuo kiel la latero. Kalkulebla ĝi estas kun kiu ajn precizo, kiun oni deziras : sufiĉas aldoni 141414...ktp, ĝis tiom da decimaloj, kiom necesas. Tiel oni ricevas proksimuman valoron, tiel proksiman, do precizan, kiel deziritan, sed ne ekzaktan.

Fine, mi ne vidas ian rilaton inter la kalkuloj de nia kvadraturisto kaj la paradokso de Zenono. Estas klare, ke se la malrapida celato ekstartas kun antaŭdistanco  $d$ , kun rapido  $v$ , kaj la sageto flugas kun rapido  $V$ , venos tempo  $t$ , kiam la sageto atingos aŭ preterpasos la celaton :

$$(V-v)t \geq d$$

$$t \geq \frac{d}{V-v}$$

Ni do ne diru, ke nur la praktiko refutas la paradoksan rezonadon de Zenono : ankaŭ simpla kaj rigora kalkulo kontraŭdiris kaj neniigas tiun subtilan rezonadon !

Kaj nun fina punkto. **Valo**

Adreso : Gilles Récoché, M.A. Montluc, 1 rue J. Hachette  
B.P. 3001, F 69391 LYON CEDEX 03, Francio

## PRI MERDMUŜOJ

Min ŝokas la konduto, kiun -nn- tiel priskribas: "La kuracisto diris, ke oni ne plu povas fari ion, oni devas paciencie atendi la morton. Kiam mi aŭdis tiun parolon, mi decidis viziti tiun viron, sen alia ideo ol klarigi al li, ke, laŭ mi, ekzistas nek Dio nek paradiza ĉielo nek eterna infero."

Eble plu ekzistas pastroj kapablaj salti sur mortanton kvazaŭ merdmuŝoj por lin lastminute katolikigi per ĉiam preta benilo. Ili almenaŭ havas la ekskuzon, ke ili sincere kredas, ke per tia konduto ili havigas al la mortanto la plej grandan feliĉon, kiun homo povas imagi.

Tiun ekskuzon ne havas nia amiko -nn-: li firme kredas, ke post baldaŭa morto estos NENIO. Ĉu kompatinda mortonto ne povas trapasi siajn lastajn momentojn alimaniere, ol aŭskultante la kredokonfesion de -nn-?

Jakelino

## PRI PROPRUMECO, ĤRONIKA MALSANO

Proprumeco = emo rilate al io propra = emo igi ion propra al si = alproprigemo = deziro al propra bieno = proprietemo, estas laŭ mi la esenco mem de la individueco en ĉiu regno. Sen proprumemo ne estus apartaj individuoj. La posedo de aparta propra korpo ja estas ĉies fundamenta privata bieno.

Tio, kio estas ŝtelo en socia kampo, ne estas la propio mem en limo de viv-neceseco, sed la senlima akaparemo ebligita de la kapitalisma sistemo.

Konsekvence, la demando ne devus esti: ĉu la proprumemo estas kronika malsano? Sed: Kiel fari por ke la propio estu egala por ĉiuj?

Al tiu demando nur unu respondo eblas: forigi la kapitalisman sistemon tutmondan, ebliganton de akaparemo.

La normala socia sistemo en homa rondo estas la vera demokratismo aŭ mastrumado de la popolo far la popolo mem. Oni ne konfuzu ĝin kun la tiel nomata demokratismo nun ekzistanta, kiu estas nur la mastrumado de la popolo far la tiel nomataj "reprezentantoj de la popolo", kio misfunkciigas kaj misefikiigas la tutan sistemon.

Vera demokratismo subkomprenigas tute aliajn sociajn substrukturadon, pensmanieron kaj moralon ol tiujn ĝis nun ekzistantajn. La atingo al tiu celo povas sukcesi nur per la antaŭa kaj individua transformiĝo de la homa konscio pri la Universo, la Homaro, kaj pri ties celo kaj rolo sur la Tero. Ĉiu provo de perforta agado povos ĉiam profiti nur al iu "elektitaro" (ne nepre "elitara"), kaj fine fiaski. La lasta provo

efektivigi sur Tero la "Respubliko-n" de Platono far la hitlerismo kaj la germana popolo, sufiĉe pruvis pri tio.

La homoj posedas tiun apartan kaj esceptan privilegion: la povon interŝanĝi ideojn per la skribo kaj la parolo. Ili do profitu tiun povon por kune celi al vere homa sociordo, en kiu la privata bieno ne plu aspektos kvazaŭ "kronika malsano", sed estos, egala por ĉiuj, la bazo mem de la tuthomaraj harmonio kaj feliĉo.

Ĉiu provu memkonscii, tiel la homaro konscios kaj sin direktos mem al la dezirata celo.

La "Savo" (konsciigo) ja estas pure individua afero.

En Eymet 1985/12/04. B.G.D.

## RESPONDE AL P.M.G.

(Ĉies voĉo, L163, p.31)

Nombroj. Jes, mi plene konsentas, ke  $\sqrt{2}$  kaj  $\sqrt{2}/2$  estas transcendantaj, do ne ekzakte kalkuleblaj. Mi diras nur jenon: ilia decimala periodeco ebligas facile trovi ilian proksimuman valoron tiel precize, kiel oni deziras. Ekzemple: je proksimumo de 10 (centmilonono):

$$\sqrt{2} = 1,41414$$

$$\sqrt{2}/2 = 0,70707$$

je proksimumo de 10 (milionono)

$$\sqrt{2} = 1,414141$$

$$\sqrt{2}/2 = 0,707071 \text{ (ĉar } 0,7 \text{ estas pli proksima de } 1 \text{ ol de } 0)$$

Pronomoj. ŝij, ĝij estas logike pravigeblaj, sed oni do devus diri ankaŭ lij. Mi ne imagas iun frazon, en kiu iĝi, pronomo, estus konfuzebla kun iĝi, verbo.

Ĉiaokaze, iŝi, iĝi aŭ ŝij, ĝij, povus esti utilaj en versoj, kaj akcepteblaj kiel poezia licenco, sed en la komuna uzado sufiĉu al ni la Fundamento. Ankaŭ niaj anglalingvaj amikoj havas nur unu pronomon, they, por la tria persono plurala, kaj tio ne ĝenas ilin. Ni ne estu pli postulemaj ol Ŝekspiro, pli rojalistoj ol reĝino Elizabeta, pli logikemaj ol la idistoj. esperanto estas bona esprimilo. Ni uzu ĝin tia, kia ĝi estas.

Valo

"LA MIGRANTO", riĉe ilustrita revuo pri turismo, naturbelajaĵoj, flaŭro kaj faŭno, ekologio, naturprotektado kaj kulturaj aferoj, estas eldonata de la Esperanto-fako de Turista Asocio "La Naturamikoj" (TANEF). Ĝi aperas kvaronjare kaj kostas nur 7.00 svisajn frankojn. Petu senpagan provokzempleron de: Liesel Nagel, Roseggerstr. 17, D - 7800 Freiburg, F.R.G.



## AL KVADRATURISTO

Por ke traduko havu sencon, necesas kompreni la ideon esprimitan. "Strekebla kaj ne mezurebla" signifas simple "problemo ne de unua grado sed de dua grado", nenion alian ! La solvoj de unuagradaj problemoj estas frakcioj, tiuj de duagradaj, "transcendaj nombroj" (aŭ eĉ "kompleksaj") esprimablaj per senfina serio de frakcioj. La ekzisto de ia nombro de "nuloj" en "nombro" ne garantias ekzaktecon nek precizecon...!  $PI = 3,1406$  estas fantazia kaj senutila.  $PI = 3,1416$  estas ete ekscesa sed taŭga por mankalkulo.  $PI = 3,141592$  estas kvazaŭ perfekta kaj taŭgas por komputiloj ordinaraj.  $PI = 3,141592653$  uzas kalkuliloj... ktp.

P.M.G.

## AFORISMOJ

(malpli optimistaj ol tiuj de LANTI)

1. E-o similas al arbusto multflora sed kun supersignaj dornegoj.
2. La plej bonaj fruktoj kreskas ĉe arboj taŭge eltranĉitaj kaj greftitaj. E-o bezonas tian flegadon.
3. La aŭtoro de E-o ĉerpis el nenio ne-vivpovajn supersignitajn konsonantojn, kiuj ege malfaciligas tutmondan tajpadon.
4. La senutilaj cirkumfleksoj fontas ne el racio sed el ia subkonscia komplekso.
5. E-o similas al ĉambro, kie objektoj estas bone ordigitaj sed ĉapeloj kuŝas senorde kaj ĝene en la enirejo.
6. Centjara praktikado pruvas, ke E-o ankoraŭ ne taŭgas por ĝenerala uzado pro neebleco tajpi ĝin facile.
7. E-o donas al la homoj la eblon perdi tempon kaj monon, metante supersignojn neutilajn por interkompreniĝo.
8. E-o malfermas fenestrojn al klubetejojn.
9. Por ke la homoj interfratiĝu per interkompreniĝado, necesas, ke E-o estu facile uzebla.
10. Samlingveco ne estas sufiĉa kondiĉo por ke la homoj interfratiĝu, samalfabeteco estas nepre necesa en praktiko.
11. La reciproka situacio de bela skribmaŝino antaŭ E-isto estas tiu de kripla maŝino, al kiu mankas literoj.
12. La plej multaj skribmaŝinoj en la tuta mondo skribas la saman 26-literan alfabeton. E-o devas adopti la kvar mankantajn kaj arkaismigaj la supersignojn !

P.M.G.

## IOM PLI DA METAFIZIKUMADO

Ĉar K-do Valo malfermis la pordon de tiu temo al mi kara, mi volonte sekvas lin sur tiu vojo.

Metafizikumado estas esplormetodo ja propra al nesciencistoj. Per ĝi ĉiu, kiu ĝin deziras, povas per uzado de sia racio kaj per dumviva spertado respondi la tri famajn demandojn : kio estas la Homo ? De kie ĝi venas ? Kien ĝi iras ?

Tiuj, kiuj opinias tiujn demandojn nesolveblaj, estas tiuj, kiuj ne sufiĉe malŝparis tempon kaj penojn pri ilia solvado, kaj ankaŭ ne kapablis rezisti al pli kaj pli amaraj spertadoj, konsekvence al miselektoj kaj mispaŝoj sur la Vojo al Vero, kiu estas Realeco, Vivo, Amo, Morto kaj Renaskiĝo, sen paroli pri ĉiuj neeviteblaj memoferoj "sur la Altaron de la Devo ordonanta" nepre necesaj al ĉia pluprogresiĝo. Ĝi estas la Vojo al memstara konsciĝo, kiun ĉiu povas, ĉu uzi, ĉu ne uzi. Neniu estas devigata. Sed la vivo-cirkonstancoj pli-malpli frue trudas al ĉiu memzorgi kaj respondi la tri ĉi-suprajn demandojn. Kaj, kiam tio okazas, la homoj, anstataŭ memprovi respondi ilin, preferas rifuĝi en la komforton de la tutpretaj konceptoj, ĉu religiaj, ĉu filozofiaj, ĝenerale adoptitaj de siaj kolektivitaroj. Ili ja preferas ŝafumi kaj blinde sin buĉi unu la alian nome de "diaj" asertoj kaj blekante pri la aĉeco de la fatalo, ol provi memstari kaj komuniĝi en samaj spirito kaj celo. Pro tio mi kutime evitas metafizikumi. Temas ja pri pure propra konvinko komprenebla nur de tiuj, kiuj sekvis la saman Vojon kaj spertis la samajn travivaĵojn. Mi ja scias pri tio, sed ĉiam miras, kiam okaze iu demandas min : "Ĉu vi vere kredas, ke eblas renaskiĝi? Ja neniu revenis por aserti pri tio." Al tio eblas respondi nur : "Ni ĉiuj, per nia ekzistado mem, atestas pri tio. De kio ni devenas, se ne de "nenieco", t.e. de morto ? Al kio ni foriros, se ne al "nenieco", t.e. al morto ? La fakto mem, ke ni naskiĝis el morto, pruvas, ke eblas re-naskiĝi el morto. Tio, kion ni nomas Vivo, fakte estas transa stadio inter du mortoj, same kiel taglumo estas transa stadio inter du noktoj. La fakto, ke vi ne memoras pri via transa morta stadio, nenion pruvas. Vi ja certas, ke vi estis iam spermatozoo, ke vi trapasis naŭ monatojn da gravediĝado en la ventro de via patrino, sed ĉu vi memoras pri tiuj stadioj de via vivkomenciĝo ? Kiel do vi kapablus memori pri via antaŭspermatozoa ekeksisto ? Nur la racia uzado de viaj intelektaj kapabloj povas riveli al vi pri tio. Nur necesas direkti ilin al la konvena direkto, t.e. al la vero, kiu ne troviĝas sur la Vojo de riĉec-, de potenc- kaj de monakiro, krom

sub trompaj vestaĵoj, ĉar kiujn li volas pereigi, tiujn Jupitero blindigas.

Vero kaj falso, lumo kaj mallumo, Dio kaj Satano, anarkiismo kaj liberalismo, vivo kaj morto, ktp, ktp, estas du sin-naskantaj statoj de la materio en diversaj kampoj de la evolucio. (Pri tiu temo mi ja sufiĉe klarigis en "Sur la Monto" kaj "Mem". La interesatoj bonvolu relegi ilin.)

Por kompreni la "procezon" de tiu evolucio, necesas nur konsideri la mineralan regnon naskanta la Vegetalan, kiu mem naskas la animalan, kiu mem naskas la homan. Ĉu do la homa regno estas la lasta evolustadio? Ne! ĝi estas nur la transa stadio inter la materia kaj la spirita regnoj: la detrua, kiu per sia propra detruo mem naskas la intelektan, la racian, la animan kaj la spiritan, kiuj mem estas nur la rebriloj en la homa korpo de ties konsistigantaj partoj aŭ elementoj, t.e.: la minerala (ostaro), la vegetala (karno kaj sango), la animala (nervaro).

"Ov' kun sekso, kap' kaj membroj, jen la Homo!"

La fizika homa korpo estas la "kokono", en kiu kreskas la "krizalido" de la spirita korpo konsistanta el memvolo, sentemo kaj konscikapablo. La morto normale okazas pro la disiĝo de la fizika kaj spirita korpoj. La krizalido eliras el la "kokono", samkiel Eva eliris el Adamo, kaj estas la tasko de la "serpento" (magnetismo) rekunigi ilin. (Pri tiu temo oni relegu "Anoncado" en "Kvarfolia Trifolio").

Necesas aldoni nur, ke tiu "serpento" (magnetismo) estas "tiu, kiu devas morti", alidirite: la Vera Mesio aŭ placento eterne mortanta sur la kvar elementoj de la materia kruco, kiujn li naskas en si mem, kaj kies nasko kaŭzas lian morton. Necesas ankaŭ plualdoni, ke se la formiĝo de homa fizika korpo necesigas naŭ monatojn da gravediĝo de la patrina korpo, la formiĝo de la homa spirita korpo necesigas naŭdek jarojn da gravediĝo de la animo. Kompreneble, temas nur pri ABC de la afero. Sed mi opinias ĝin sufiĉa, mi ja ne intencas tro tedi la L!-legantaron per tiuj J.Štrumpfaĵoj. Cetere la temo estas neelĉerpebla, eterna... Ĉiu mem zorgu pri ĝi kaj pri sia propra... krizalido. Ju pli da konsciiĝo, des pli da ŝancoj ne resperti la nuntempan tuthomaran frenezulejon en alia epoko.

En Eymet la 03an/12/1985.

Anonima B.G.D. (Eymet)

P.S. - Restas al mi kelkaj ekzempleroj de la ĉi-supre aluditaj poemoj. La interesatoj bonvolu mendi ilin rekte al: B.G. Delalot, 10 Route de Serres, F 24500 EYMET, Francio.

Nia novelo:

Guy de MAUPASSANT

El la franca: Daniel LUEZ

## LA SERVOSOLDATO

*La tombejo plena de oficiroj aspektis kiel florkampo. La kepoj kaj la ruĝaj pantalonoj, la galonoj kaj orbutonoj, la sabroj, la laĉornamaĵoj de l' stabo, la ŝnurgalonoj de l' ĉasistoj kaj husaroj pasis inter la tomboj, kies krucoj blankaj aŭ nigraj malfermis siajn tristigajn brakojn, siajn brakojn el fero, marmoro aŭ ligno, super la malaperinta popolo de l' mortintoj.*

*Oni ĵus entombigis la edzinon de kolonelo de Limousin. Ŝi dronis antaŭ du tagoj, banante sin.*

*Estis finite, la pastroj estis for, sed la kolonelo, subtenita de du oficiroj, restis staranta antaŭ la truo, en kies fundo li ankoraŭ vidis la lignan kofron, kiu kaŝis la jam putriĝintan korpon de lia juna edzino.*

*Li estis preskaŭ maljunulo, alta maldikulo kun blankaj lipharoj, kiu edzinigis antaŭ tri jaroj la filinon de iu kamarado, orfiniĝintan post la morto de sia patro, kolonelo Sortis.*

*La kapitano kaj la leŭtenanto, sur kiuj apogis sin ilia ĉefo, provis kunpreni lin. Li rezistis, kun la okuloj plenaj de larmoj, kiujn li ne lasis elflui, pro heroeco, kaj, mallaŭte murmurante: "Ne, ne, ankoraŭ iomete", li obstinis resti tie, kun fleksiĝantaj kruroj, ĉe l' rando de tiu truo, kiu ŝajnis al li senfunda abismo, kien falis lia koro kaj lia vivo, ĉio, kio restis al li surtere.*

*Subite alproksimiĝis generalo Ormont, kaptis la kolonelon per la brako, kaj preskaŭ perforte kuntrenante lin: "Nu, nu, mia malnova kamarado, vi devas ne resti ĉi tie." Tiam la kolonelo obeis kaj iris hejmen.*

*Kiam li malfermis la pordon de sia kabineto, li ekvidis leteron sur sia skribotablo. Preninte ĝin, li preskaŭ falis pro surpriziĝo kaj emocio, li estis rekoninta la skribon de sia edzino. Kaj la letero havis la stampon de la tago mem. Li ŝiris la koverton kaj legis:*

*"Patro,*

*"Permesu al mi nomi vin ankoraŭ patro, kiel iam. Kiam vi ricevos ĉi tiun leteron, mi estos mortinta, kaj sub la tero. Tiam vi eble povos pardoni min.*

*"Mi ne volas provi kortuŝi vin, nek malgravigi mian kulpon*

Mi volas nur diri, kun la tuta sincereco de virino, kiu mortigos sin post unu horo, la tutan kaj kompletan veron.

"Kiam vi edzinigis min, pro nobleco, mi donis min al vi pro dankemo kaj mi amis vin el mia tuta knabineta koro. Mi amis vin tiel, kiel mi amis paĉjon, preskaŭ tiom ; kaj iun tagon, kiam mi estis sur viaj genuoj kaj vi kisis min, mi nomis vin "Patro" malgraŭvole. Tio estis krio el la koro, instinkta, spontana. Vere, vi estis por mi patro, nur patro. Vi ridis kaj diris al mi : "Nomu min ĉiam tiel, infano, tio plezurigas min."

"Ni venis en tiun ĉi urbon, kaj - pardonu min, patro - mi enamiĝis. Ho! mi longe rezistis, preskaŭ du jarojn, vi bone legas, preskaŭ du jarojn, kaj poste mi cedis, mi kulpiĝis, mi fariĝis perdita virino.

"Kaj li? - Vi ne divenos kiun. Pri tio mi estas tute trankvila, ĉar ili estis dek-du oficiroj, ĉiam ĉirkaŭ mi kaj kun mi, kiujn vi nomis miaj dek-du stelaroj.

"Patro, ne provu koni lin kaj ne malamu lin. Li ja faris tion, kion kiu ajn estus farinta sur lia loko, kaj mi estas certa, ke ankaŭ li amis min el sia tuta koro.

"Sed, aŭskultu, - iam ni havis rendevuon sur la insulo de la Skolopoj, vi ja scias, la insuleto post la muelejo. Mi devis alboridiĝi tien naĝante, kaj li devis atendi min en la vepro, kaj poste resti tie ĝis la vespero, por ke oni ne vidu lin foriri. Mi ĵus alvenis al li, kiam la branĉoj disiĝis kaj ni ekvidis Filipon, vian servosoldaton, kiu estis surprizinta nin. Mi sentis, ke ni estis perditaj kaj eligis grandan krion ; tiam li diris al mi - li, mia amiko! - "Fornaĝu malrapide, mia kara, kaj lasu min kun tiu ĉi viro."

"Mi fornaĝis, tiel emociita, ke mi preskaŭ dronis, kaj revenis al vi, antaŭvidante ion teruran.

"Unu horon poste, Filipino diris al mi, mallaŭte, en la koridoro de la salono, kie mi renkontis lin : "Mi estas je la ordonoj de la Sinjorino, se ŝi havus iun leteron por doni al mi." Tiam mi komprenis, ke li estis vendinta sin, kaj ke mia amiko aĉetis lin.

"Mi fakte donis al li leterojn - ĉiujn miajn leterojn. Li portis ilin kaj realportis al mi la respondojn.

"Tio daŭris ĉirkaŭ du monatojn. Ni fidis lin, kiel ankaŭ vi fidis lin.

"Nu, patro, jen kio okazis. Iun tagon, sur la sama insulo, kien mi alnaĝis, sed sola nun, mi retrovis vian servosoldaton. Tiu viro atendis min kaj li avertis min, ke li estis denunconta

nin al vi kaj liveronta al vi leterojn konservitajn de li, se mi ne cedos al liaj deziroj.

"Ho! patro, mia patro, mi timis, mi havis timon malkuraĝan, malindan, timon ĉefe pro vi, tiel bona, kaj trompita de mi, ankaŭ timon pro li - vi estus mortiginta lin - eble ankaŭ pro mi, ĉu mi scias ? Mi estis freneza, konfuzegita, mi kredis aĉeti ankoraŭfoje tiun senhontulon, kiu ankaŭ amis min, kia honto!

"Ni, virinoj, estas tiel malfortaj, ke ni perdas la kapon multe pli ol vi. Kaj poste, falinte, oni falas ĉiam pli malsupren, malsupren. Ĉu mi scias, kion mi faris ? Mi nur komprenis, ke unu el vi ambaŭ kaj mi estas tuj mortontaj - kaj mi donis min al tiu brutulo.

"Vi vidas, patro, ke mi ne provas senkulpigi min.

"Nu, kio nun? - nu okazis tio, kion mi estus devinta antaŭvidi - li min prenis kaj reprenis, kiam li volis, terurante min. Ankaŭ li iĝis mia amoranto, kiel la alia, ĉiutage. Ĉu ne abomeninde? Kaj kiun punon, patro?

"Nu, mi diris al mi : necesas morti. Vivanta, mi ne estus povinta konfesi al vi tian krimon. Mortinta, mi ĉion kuraĝas. mi ne plu povis agi alie ol morti, nenio estus lavinta min, mi estis tro multe makulita. Mi ne plu povis ami, nek esti amata; ŝajnis al mi, ke mi malpurigis ĉiujn, eĉ nur donante la manon.

"Baldaŭ, mi iros bani min kaj ne revenos.

"Ĉi tiu letero por vi iros al mia amoranto. Li ricevos ĝin post mia morto, kaj nenion komprenante, li transdonos ĝin al vi, plenumante mian lastan volon. Kaj vi legos ĝin, reveninte de la tombejo.

"Adiaŭ, patro, mi havas nenion plu por diri al vi. Faru, kion vi volos, kaj pardonu min."

La kolonelo viŝis sian ŝvitkovritan frunton. Lia memrego, la memrego de la batalaj tagoj subite revenis al li.

Li sonorigis.

Aperis servisto.

"Sendu al mi Filipon", li diris.

Poste li malfermis la tirkeston de sia tablo.

La viro eniris preskaŭ tuj, altstatura soldato kun ruĝaj lipharoj, ruzaspekta, kun insidema okulo.

La kolonelo rekte rigardis lin.

"Vi tuj diros al mi la nomon de la amanto de mia edzino.

- Sed, kolonelo...

La oficiro prenis sian revolveron el la duone malfermita

tirkesto.

"Ek, rapide, vi scias, ke mi ne ŝercas.

- Nu, kolonelo..., li estas kapitano Saint-Albert."

Li apenaŭ prononcis tiun nomon, flamo bruligis liajn okulojn, kaj li falegis survizaĝe, kun kuglo meze en la frunto.

\*\*\*\*\*

**Lina Gabrielli :**

## LA DILEMO

Mi ne plu memoras, ĉu estis printempo aŭ aŭtuno. Estis vespero.

Mi loĝis tiam kun mia familio en strato Viktoro Emanuelo, ĉe la publikaj ĝardenoj, en la unua etaĝo de nova palaco nomata Vatikano, ĉar tie lokiĝis precipe partianoj de la kristana demokratio.

Ni konsistigis kune grandnombran familion : panjo, mia fratino Nerina kun la edzo kaj la du gefiloj, onklino Flavia reveninta el Ameriko kaj mi, kiu dormis en la sepa etaĝo de la sama konstruaĵo.

Kiam alvenis ŝia fratino, panjo, pro manko de alia ĉambro, proponis la propran. Tial ambaŭ dormis en la geedza litego. Sed panjo ne sentis sin kontenta pro tiu kuneco. Ankaŭ onklino Flavia ne. Mi ege suferis, ĉar mi ne povis helpi malgraŭ mia bona volo. Fakte Nerina ne konsentis loĝigi sian filon Roberto ĉe mi, por tiel disponigi mian iaman ĉambreton, nun de la knabo, al la onklino kaj doni sendependecon al la malkontentulinoj. Kolerigis min, krome, tiu neutila sufero.

Do, dormis kune la du fratinoj, kaj ili estis tre malsimilaj laŭ la karaktero kaj laŭ la fiziko. Panjo, ekzemple, havis malaltan sangopremon, onklino Flavia altan.

En la vespero pri kiu mi rakontas, mi estis ĉe miaj gefamilianoj kaj kiam mi volis foriri, mi troviĝis en embarasa situacio, kiu ankoraŭ vivas en mia memoro : onklino Flavia pro la alta sangopremo kaj pro la kora malsano sentis sufokon. Ŝi bezonis iom da aero por reanimiĝi kaj petis, petegis en la dialekto de sia vilaĝo, ke mi lasu malfermita la fenestro-pordon de la dormo-ĉambro : "Iom, nur iomete".

Male, panjo havis malaltan sangopremon kaj estis malvarmumanta, eĉ frostumanta. Ŝi ne parolis, sed rigardis min intense por komprenigi min, ke mi fermu la fenestro-pordon.

Fronte al tiuj malsimilaj kaj urĝaj bezonoj, mi tenis mian kapon inter la manoj, ne sciante al kiu obei. Ĉu al la pli

grava ? Kiu estis la pli grava ? Fine mi konkludis, ke panjo povus sin ŝirmi kaj varmiĝi per la kovriloj ; ke, male, al la onklino Flavia mankis la spiro. Do, estis pli oportune helpi ĉi tiun lastan. Kun premita koro, mi lasis la aeron eniri libere la ĉambron por ŝin vivigi.

Sed la timo, ke la malsano de panjo iĝos pli malbona, donis al mi malkvieton. Ho, temis pri panjo!... Mi timis ankaŭ, ke ŝi sentos sin forlasita, malpreferita pro mia elekto.

Nerina estis en la banejo. Mi frapis sur la pordon por peti konsilon. Ŝi eĉ ne aŭskultis min. Tio, kio okazas, ne estas ŝia afero. Malagrabla por mi, se mi atentis pri taskoj, kiuj tute ne koncernas min. Mi trankvile povus diri : "Faru laŭ via plaĉo!" kaj eniri la lifton por atingi mian loĝejon. Kiu penigis min ? Sed mi ne scias sekvi la pli facilan vojon. Bonŝance venis al mi la ideo, ke por onklino Flavia temas pli pri psikologia ol vera bezono. Se ŝi estas konvinkita spiro la aeron laŭ sia neceso, ŝi jam estas en ordo. Nenio plu malkvietigas ŝin. Eble ŝi jam dormas.

Por panjo la afero estas alia. Tuso kaj malvarmumo povus akriĝi. Mi devas ne permesi tion. Tiel rememorante, ke la fenestro-pordo de la kuirejo troviĝas en la sama balkono, kie troviĝas la fenestro-pordo de la dormo-ĉambro, el la kuirejo mi iris sur la balkonon. Tie mi kaŭriĝis antaŭ la fenestro-pordo de la dormo-ĉambro kaj penante ne fari eĉ la plej etan bruon, mi fermis de la ekstero tion, kion mi malfermis de la interno.

Mi ploris pro tiu ago diktita de mia amo kaj de mia deziro helpi miajn karulinojn : tiu ago, se malkovrita, povus esti miskomprenata, interpretata kiel moko, nur kiel moko.

\*\*\*\*\*

-nn- :

## LA NATURA EKVILIBRO

Kiel ĉiu, mi havis patron kaj patrino.

Post la morto de mia patro, mi ekloĝis kun mia patrino, daŭrigante mian laboron en oficejo.

Ĉar mi laboris en oficejo kaj mia tre aĝa patrino estis malsana, mi akceptis por du horoj ĉiutage, servistino.

Ĉiun monaton mi pagis ŝin de la mano al la mano.

Kiam estis la vivofino ankaŭ de mia patrino, la servistino ploris kaj min petegis :

- Sinjoro, mi bezonas labori, permesu, ke mi plu laboru en via hejmo, mi alkiutimiĝis,... ktp...

Ĉar mia laborado min tre lacigis, mi akceptis. Ĉiumonate mi ŝin pagis kaj ĉiam, dum kelkaj jaroj, de la mano al la mano.

Iun tagon, mi renkontis virinon, amikiĝis, edziĝis kaj translokiĝis, malproksime de mia antaŭa loĝejo.

Tiam la servistino, min sciante malproksime, iris al advokato, kiu komencis per Tribunalalo postuli por nur kvin jaroj la "salajron", sub la preteksto, ke mi ne pagis.

En Tribunalalo mi demandis la juĝiston, ĉu eblas, ke iu servistino povas labori dum kvin jarojn sen esti pagata ?...

La respondo de la Tribunalalo estis, daŭrigi tiun "aferon" (ĉar mi ne havis kvitancojn) dum kvin jaroj. Fine la Tribunalalo decidis, ke mi pagu nur por tri jaroj... ĉi tio per verdikto.

La verdikto de la Tribunalalo devas esti ĉiam respektata. Kion fari ? Mi pagis...

La edzo de la servistino, ricevante la monbiletojn..."tiom da mono"... fortege ebriiĝis, bastonadis sian edzinon kaj kun la paketo da monbiletoj ekfajrigis ion, kiu bruligis la ĉambreton.

Kiam la fajrobrigado alvenis, la edzino jam mortis kaj la edzon oni forveturigis al hospitalo, el kiu li eliris post pluraj monatoj kun lambastonoj kaj sen hejmo.

\*\*\*\*\*

### ELDONEJO GABRIELLI

Karaj geamikoj

Kiel vi scias, mi edziniĝis en Parizo.

Mia edzo, samideano Maksimilien Trenner, al mi rekomendis reorganizi mian libroservon. Kelkaj eldonaĵoj estas jam elĉerpitaj, sed estas ankaŭ aliaj, kiuj atendas legontojn.

Se vi mendos dum la daŭro de unu monato post lego de ĉi tiu reklamo, vi ne pagos la sendkoston.

Kun mia korega saluto, via

D-rino Lina Trenner Gabrielli, 166 av. Daumesnil, F 75012 PARIS

La 24 Sonetoj (fr/esp) 80 p	12 gld	Libro de la amo (80 p)	12 gld
Frithof-Sagao (sved/esp) 388	35 gld	Vivendo (esp/+ plur.nac.trad)	20
La Ĥimeroj (fr/esp) 80 p.	12 gld	La Amo de Danto Alighieri (116p)	12
WARINGHIEN :		Ni devas vivi (156 p <sup>o</sup> )	12
La Renesanca Periodo 210 p.	20	Karnavalo (78 p)	10
La Klasika „ 252 p.	27	Don Juan Tenorio (ĉ. 400 p)	20
La Romantika „ 322 p.	25	Fenestro kristala (200 p)	25
La Mezepoka „ 183 p.	25	Regulus (340 p)	30
(la 4 libroj kune menditaj)	85	Nuancoj (128 p.)	13

Kompleta teknika vortaro de Michele Mariano (142 p.A4)

1985 (ankoraŭ 100 ekz-roj. Baldaŭ elĉerpita)..... 50 gld.

Paŭlo :

### VOJAĜO TRA ESPERANTUJO DUM 1985

En tiu ne sufiĉe longdaŭra jaro 1985, mi uzis mian libertempon inter informadiko kaj plantrikolto por realigi delonge revitan vojaĝon tra Esperantujo.

Kie estas do tiu lando ? Certe, same kiel Dio, ĝi unue estas en ni ! Sed ekster tio, mi serĉis en revuoj kaj jarlibroj de asocioj. Antaŭ ĉio, mi petis mian registradon en Jarlibro de UEA, kaj samtempe petis la sciigon de horoj de kunvenoj de nia asocio en NIMO. Per tiuj agoj mi provis ekhavi por nia Asocio plian intereson el aliurbaj esperantistoj, plie el alilandanaj esperantistoj.

Due, nia urbo estas ĝemeligita kun kelkaj aliaj urboj tra Eŭropo (kaj eĉ ricevas vizitantojn el multaj landoj tra la Mondo) ; dum 1985, ekzemple, estis planita ĉe ni vojaĝo de grupo de japanaj komercistoj. Ĉu ili venis ĉi tien por vendi aŭ por aĉeti ? Tio ne estis mia problemo. Sed, kun nia tre agema sekretariino GINETTE, ni faris demandon al la organizantoj, ĉu estis inter la partoprenantoj iuj esperantistoj. La respondo forbalais ian esperon. Tamen, kun la ĝemelitaj urboj ni estis certaj trovi samideanojn. Ni do provis krei jarlibron, en kiu ni trovos nomojn kaj adresojn de es-istoj loĝantaj en, kaj ĉe, tiuj urboj. Por tiu afero mi facile ricevis la diversajn nomojn kaj adresojn de tiuj samideanoj. Mi tajpis kaj fotokopii kelkajn ekzemplerojn de malgranda kaj pura J.L., proponante, ke venontjare alia urbo en tiu grupo prenu sian vicon. Tie, mi ankoraŭ ne tute perdis iun esperon : eble dum tiu nova jaro ni denove aŭdos pri tiu botelo tiel ĵetita en maron...

Poste, mi devas konfesi, ke mi pli ofte frekventis miajn amikojn en nia grupo de Nimo. Plie, mi helpis nian samideanon, KARLO, profesoro en kolegio de nia urbo ; li animis de kelka tempo grupon de lernantoj pri foto, uzante nian lingvon por krei plian intereson pri tiu temo. Mi nepre aldonis al tiuj temoj lernon de plantoj kaj unuajn paŝojn en informadiko. Dum la tuta jaro, tiu afero bone funkciis ; ni faris kun-kune kelkajn promenadojn en naturo por lerni nomojn de plantoj kaj preparis herbariojn, vizitis esplorfosojn pri romiaj ruinoj, rivelis la diversajn fotojn... kaj certe parolis ne tro malbone esperantlingve. Tamen, tiun grupon oni nomis "La Krokodilo", ne nur ĉar - mi devas konfesi - ni ofte krokodilis, sed ĉar ni havas krokodilon en la blazono de nia urbo (tio

estas malnova memoraĵo pri la korpuso de la antikva romana armeo, kiu okupis iam Nimon, revenante el Egiptio). Sed la plej bela momento kun tiuj junuloj, estis en monato majo, kiam ni organizis, en Nimo, kongreson de nia regiona federacio. Al la pli-malpli junaj esperantistoj ĉeestontaj tiun kongreson, ni estis tre kontentaj povi malaltigi la mezan aĝon de tiuj partoprenantoj. Niaj junuloj prezentis sian grupeton kaj klarigis siajn agojn kaj progresojn en ĉiuj temoj: foto, plantoj, informadiko, nepre esperanto, kaj eĉ arkeologio. La plej bela pruvo de iliaj progresoj en esperanto estis ilia perfekta elparolado.

La unua "ekskurso", kiun ni faris eksteren, estis la "Esp-a Semajno" en Nico, kiun ni partoprenis kun mia edzino MIĜELA en marto. Dum kelka tempo, antaŭ longe ni iam loĝis en Nico, kaj ĉe du proksimaj urbetoj, kaj ni kredis bone koni tiun regionon. Se, do ni iris nur por praktiki esperanton, estis ĉar ni ankoraŭ ne konis la organizadon de nia samideano LLORENS. Ĉar ni tre bone parolis kaj aŭdis tre interesajn prelegojn, ni ekkonis novajn samideanojn kaj renkontis la malnovan prezidantinon de nia grupo de Nimo, KLARISA (ŝi nuntempe laboras por blinduloj, por kiuj ŝi tajpas brajle tekstojn, nur franclingve), ktp. Sed plie, ni havis promenadojn en diversaj ĉirkaŭaĵoj de Nico, kie ni malkovris multajn interesajn lokojn, kiujn ni ne konis. Certe ni ludis kiel turistoj dum tiu semajno, kaj ni ne bedaŭras tiujn tagojn. La nura malbona flanko estis, ke nia samideana organizanto sciigis al ni, fine de tiu libertempo, ke tiu "semajno", kiu ekzistis de kelkaj jaroj, ne plu estos. Malŝelice!

Poste, estis la regiona kongreso (pri kiu mi jam parolis), kaj malgraŭ niaj timoj ĝi estis plensukcesa: nia regiona Prezidanto proponis al ni organizi eĉ nacian kongreson ĉe ni! Sed ni konsideris tion nur kiel ŝercon...

Dum la monato julio ni akceptis ĉe mi du eksterlandajn samideanojn: germanan ekologiiston kaj nederlandan muzikanton.

Dum aŭgusto, kun Miĝela, ni iris al Grezijono por staĝo pri informadiko, pri kaj per esperanto. Kun du tre kompetentaj instruantoj, HENRIKO kaj DOMINIKO, mi multe lernis pri informadiko kaj laboris sur diversaj aparatoj; mi devas konfesi, ke mi forgesis iomete el tiuj lecionoj, sed ofte mi esploras mian kajeron, sur kiu mi skribe multe konservis pri tiu lernado. Miĝela multe lernis en esperanto kaj ŝi eĉ decidis, ke hejme ni ne plu krokodilu, sed parolu nur esperantlingve... Kion mi devas aldoni pri tiuj tagoj en Grezijono, tio estas, ke

dum tri semajnoj ni vivis en vera kastelo; tiun "kastelan vivon" ni multe ĝuis. Familio BABIN, kiu multe laboras por funkciigi tiun pezan aferon, indas multajn dankojn por tiu laboro. Plie, dum lasta semajno de nia dudektaga restado, ĉeestis en la kastelo grupo de blinduloj, kun kiuj ni lernis plantojn; sen videbleco oni palpas, flaras kaj gustas kaj niaj samideanoj ŝajnis esti multe interesataj pri la interkomuniko, kiu estis inter ni. (Mi memoris la informojn, kiujn Klarisa donis al mi en Nico pri la blinduloj). Tiuj samideanoj eĉ helpis nin en preparado de herbario, kiun ni lasis en la kastelo post nia ĉeesto. Nun en Grezijono oni povas esplori tiun herbarion pri kelkaj kuracaj plantoj kun nomoj de tiuj plantoj franckaj esperant-lingve, latin- kaj brajl-skribitaj. Ni vizitis ankaŭ la ĉirkaŭaĵojn, kiuj estis tre agrablaj, observis la ĉielon kaj profitis de tiu okazo por prelegi pri astronomio kaj kometo de Halley, pri kiu oni ofte parolas nuntempe (ĝi estas revenanta apud teron ĉi-jare post vojaĝo de 76 jaroj).

Forlasinte centron de dolĉa Francio, kie kuŝas Grezijono, ni havis alian rendezuon kun nia amiko KRIBO, la ĉefredaktoro, eldonisto, kontrolisto, tajpisto, ofsetpresisto, ktp, de tre konata "Laŭte". Mi jam aŭdis, ke li estas staciestro, do mi esperis, ke ni facile trovos lin en Laroque-Timbaut, urbeto proksima de Aĝeno. Ni nur devis demandi, kie estas tiu stacidomo, kaj same kiel diablo spruĉanta el sia skatolo, li tre kore salutis nin, diris sian bedaŭron, ke ni estos la nuraj partoprenantoj de liaj "tagoj pri gazet-presado", kaj, kurante, bedaŭris, ke li devas forlasi nin, ĉar trajno estis alvenanta. Laŭ unua okazo, mi tiel vidis stacidomon en ties funkcio: li rapide prenis sian plurstele ornamitan kaskedon, fonis al proksima stacio, el kiu aŭ al kiu (mi ne sciis, sed tio ne estis mia problemo) la trajno ruliĝis. Li movis kelkajn reŝanĝilojn - mi pensis, ke mi neniam povus fari tian laboron, ĉar mi ĉiam timus fari eraron - kaj la trajno fajfante spruĉis el la suda ekstremo de la fervojo; ĝi haltis kelkajn minutojn, kiuj sufiĉis por lasi du aŭ tri vojaĝantojn malsupreniri; unu, maljuna, grimpis malfacile en la trajnon; la kondukisto povis rakonti kelkajn diraĵojn al mia amiko; kaj denove fajfante, la trajno rapide malaperis en proksiman tunelon, en alian finon de fervojo, al iuj aliaj urboj pli norden.

Ĉiam kurante, Kribo rapide fonis al alia stacidomo, poste remetis sian kaskedon sur vesthoko kaj iris ĝis malantaŭa ĉambro, kie lia "maŝino" estis presanta iun presajon. Tiu ofsetpresilo senĉese laboradas por samideanoj tra la mondo, dum trajnoj trapasadas, kaj ni babiladis...

Ni restis nur tri tagojn ĉe Kribo, ĉar ni deziris viziti nian filon, kiu loĝas ne tre malproksime. Sed dum tiuj kelkaj tagoj ni multe lernis pri multaj temoj. Unue, pri presado ni ekkonis JULIA-n, por kiu, precipe, mi venis ĉe Kribo, kun kiu mi lernis por la unua fojo tekstotraktadon. Mi vizitis la bredadon de anasetoj de SOLANĜA, la edzino de Kribo. Mi senĉese vidis funkcii la ofsetpresilon, mi lernis kiel prepari la etiketojn por dissendo de gazetoj, ktp.

Jarĉine ni ankoraŭ ĉeestis en semajnfino de Rodana Kooperativo kaj en Zamenhof-Tago, du okazaĵoj en Avinjono. Tiuj aferoj estas preparitaj precipe de geedzoj GENTE, Andreo kaj Helena, kiuj ĉiujare preparas ilin kun multaj penoj, sed ankaŭ multaj sukcesoj. Oni tamen povas diri, ke ilia laboro estas faciligita per la proksimeco de eminentaj profesoroj pri Esperanto, kiuj igas tiujn tagojn tre interesaj. Sed la kvalito de ilia organizo pravigas la ĉeeston de tiuj profesoroj kaj de multnombraj partoprenantoj, eĉ alilandanoj.

Finĉine, mi devas konkludi pri tiu jaro. Ni devas multe danki la organizantojn de tiuj diversaj restadlokoj kaj kunvenoj; ilia laboro estas tre grava por la estonto de nia lingvo kaj ni devas multe helpi ilin per nia vizitado de iliaj organizoj. Tiel ESPERANTUJO povos esti vera kreskanta lando, por ĉi fine esti riĉa!

\*\*\*\*\*

### SEMAJNFINA ESPERANTO-LINGVOSTAĜO

La federacio Langvedoko-Rusiljono organizas E-lingvostaĝon de la 8a ĝis la 11a de majo 1986. Tiu staĝo okazos en Kastelo "Cassan" apud Roujan, je 20 km de Béziers; facile alirebla per aŭtomobilo; aŭtobuso en Béziers kun haltejo antaŭ la kastelo; stacidomo en Magalas (8 km). Detaloj en venonta bulteno aŭ petu ilin.

Dulitaj ĉambroj, kelkaj unulitaj kun luttukoj. Ebleco kampadi; kunportu tualetkaj manĝotukojn. La prezo por la tuta staĝo - kompleta pensio - estas 360 FF. La estraro petas antaŭpagon de 40 FF por ĉiu partoprenonto. Por alfronti la diversajn elspezojn, ni petas aliĝokotizon de 20 FF. Ni esperas organizi 3 diversnivelajn kursojn - eble 4 - el kiuj 1 por inicado de "veraj komencantoj. Ni alvokas la kapablulojn por gvidi kurson aŭ kontribui al la distraj vesperoj. Sendi aliĝilon (peti ĝin), 60 FF kaj afrankitan koverton al: Cercle Biterrois d' Esperanto, 9 rue Georges Picot, F 34500 BEZIERS. Por informoj vi povas telefoni al 67 31 13 18 aŭ 67 31 13 46 aŭ 67380352 prefere ĉe la manĝohoroj. Ni kalkulas pri via partopreno kaj tiuj de viaj gelernantoj. Aliĝu kiel eble plej baldaŭ. Antaŭdankon!



### INTERNACIA KULTURA KAJ TURISMA SEMAJNO (PAU, Francio, 22 julio/29 julio '86)

La Internacia Kultura kaj Turisma Semajno okazos en urbo PAU (Paŭo), en sudokcidenta Francio de mardo 22a de julio (alventago) ekde la 9a, ĝis mardo 29a de julio 1986 je la 9a (forirtago). Urbo PAU (po) ĝuigos vin, ne nur per siaj riĉaj vidindaĵoj, sed ankaŭ per sia bonega situacio, ne malproksima de la maro, de la montaro, de Hispanio; inter Lourdes kaj Biarritz. Aŭtobusaj ekskursoj gvidos vin sur la Pireneojn, apud la Oceanon, tra la verde bela, nordvaska lando, inter gaspetrolaj ekstraktejoj, maizkulturejoj, vitejoj. Vi gustumos la lokajn manĝojn kaj vinojn. Vi ĉeestos lokajn kaj internaciajn folklorajn spektaklojn. Vi neniam forgesos la varman, amikan etoson, kiun, ekde nun, la paŭaj samideanoj poluras por via ĝojo, je la plej malalta kosto, por tiu riĉoplena I.K.T.-Semajno.

Do, sen prokrasto, montru vian intereson, skribante aŭ al ESPERANTO PAU-ADOUR, La Pépinière, Av. Robert Schuman, F 64000 PAU; aŭ al Office du Tourisme, Place Royale, F 64000 PAU (Tel. 59 27 27 08).

### AKTIVAĴOJ DE F.L.E. en 1986

La Asocio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo FLE en 1986 festos sian 75-jaran ekzistadon. En 1911 en Hago grupoj de hajak kaj amsterdamaj esperantistoj fondis la Federacion de Laboristaj Esperantistoj. Tial je la 3a kaj 4a de Majo 1986 okazos la jubilea, 64a kongreso de FLE en Hago, en la konferencejo Overvoorde. En la sabato okazos festa programo kun kantistoj esperantaj kaj nederlandlingvaj. Speciala glumarko estos eldonata samkiel jubilea numero de "Esperanto-Nieuwsbrief" ("nivsbrif"). Ankaŭ ekspozicion oni aranĝos.

FLE organizos en la unua duono de 1986 denove semajnfinajn kursojn. Inter la datoj jam fiksitaj estas jenaj:

- La 8an kaj 9an de februaro en la naturamika domo "Het Zeehuis" en Bergen aan Zee, do tute apud la maro.

- la 5an kaj 6an de aprilo en la norda parto de Nederlando, en la domo "De Hondsrug", en Noordlaren.

- la 7an kaj 8an de junio en la suda parto, en la domo "Morgenrood" en Oisterwijk.

Speciala kampadkurso okazos de la 7a ĝis la 11a de majo en Eerbeek, en la centra parto de la lando (do longa semajnfino pro ĉielirtago).

Kultura semajnfino okazos de la 7a de marto vespere ĝis la 9a de marto en la naturamika domo "Krikkenhaar" en la orienta parto de la lando (apud Almelo). La temo estos : Tventa kulturo (Tvento estas la regiono, en kiu situas la domo).

La prezo por la semajnfinoj estas 41 guldenoj ; naturamikoj kaj FLE-membroj ĝuos rabaton.

Informojn pri ĉi-supre menciistaj aktivaĵoj vi povos ricevi de :

Ria Hoogeland, Vlasdonk 1, NL 1112 JD DIEMEN (020-909094) aŭ :

Bert de Wit, Postbus 425, NL 2100 AK Heemstede (023-242643, post la 19a h.)

## JUBILEOJ DE TANEF EN 1986

La Esperanto-Fako de la ne-esperantista internacia Turista Asocio "La Naturamikoj" ĉi-jare povas festi kelkajn gravajn jubileojn. Jam komence de la jaro 1926 fondiĝis en Vieno la unua Naturamika fakgrupo Esperanto, do antaŭ 60 jaroj.

La Centra Komitato de la Naturamika Internacio decidis en aŭtuno 1945, eldoni ekde la jaro 1946 la kotizmarkojn por ĉiuj landoj nur en Esperanto kun la surpriso "La Naturamikoj". Do, 40 jarojn jam la membraro, pli ol 320000, ricevas tiun jaran kotizkvitancon en la Lingvo Internacia.

Kvankam Esperanto-fakgrupoj en la Naturamika movado jam ekzistis diversloke kaj diverslande antaŭ la Dua Mondmilito, la jaro 1951 estas konsiderata la fondjaro de **TANEF** (Turista Asocio "La Naturamikoj", Esperanto-Fako). Dum la 36a Universala Kongreso en 1951 en Munkeno estis elektita en fakkunveno de la Naturamikoj komisiono por ordigi la organizajn laborojn ĝis la Kongreso de la Naturamika Internacio 1953 en Innsbruck (Aŭstrio). En 1951 aperis ankaŭ la unua numero de "**La Migranto**". Oni en 1986 do ankaŭ povas festi tiujn du 35-jarajn jubileojn.

Kaj fine **TANEF** havas la 30-jaran jubileon de sia oficiala agnosko pere de la Kongreso de la Naturamika Internacio 1956 en Hamburgo.

Kaŭze de tiuj jubileoj TANEF invitas al Internacia Feriosemajno, okazonta de la **9a / 16a de aŭgusto 1986** en la moderna Naturamika Domo en **Bodman** apud la Lago de Konstanco (F.R.Germanio). Oni preparis interesan kaj tre varian turisman kaj kulturen programon kaj esperas pri multnombra vizito de tiu jubilea aranĝo, kiun kompreneble rajtas partopreni ankaŭ esperantistoj, kiuj ne estas membroj en la Naturamika movado. Detalan prospekton petu de s-ino Margot Hektor, Fuchsmattstr.23, D-7602 Oberkirch.

## ĈU PASPORTA SERVO aŭ "SERVAS" ?

De pluraj jaroj, mi kaj kelkaj esperantistoj pledas por kunlaboro de nia movado (t.e. GEJ - TEJO/Pasporta Servo) kun la neesperantista organizaĵo **SERVAS**. Mi plurfoje atentigis la instancojn de GEA kaj GEJ pri la avantaĝoj subteni **SERVAS**, ĉar, se Pasporta Servo jam bonajn servojn ofertas, **SERVAS** tre avantaĝe obligus la vojaĝeblecojn de niaj moviĝemaj movadanoj kaj ebligus al ili naturajn kontaktojn kun ne ĉiam bone informitaj personoj, sed homoj, kiuj certe pozitive konsiderus Esperanton.

Kiam Rudolf Fisher proponis al mi organizi la kontaktojn inter ni kaj **SERVAS** mi esperis pli bonan kunlaboremon de la Esperantistoj. Bedaŭrinde, nur negativajn respondojn aŭ reagojn mi ricevis - interalie de Sandor Hideg el HEA. Kiel unu el la kelkaj homoj, kiuj diskutis la fondiĝon de Pasporta Servo en 1984, mi rememorigus al ĉiuj, ke jam tiam oni konis **SERVAS** en la E-movado, kaj Pasporta Servo volis iel "kompletigi", ĉar **SERVAS** estas malpermesita en la socialismaj landoj. Do, laŭ la fondintoj, estas ia simlleco inter ambaŭ organizaĵoj kaj laŭ mi tiu devus instigi nin pli intense rilatiĝi kun **SERVAS**, eĉ uzi la servojn de **SERVAS**, utiligi ĝin por niaj celoj !

Mi tre ĝojus interalie, se en ĉiu urbo, kie ne estas "SERVAS-pordo", sed Pasporta-Servanto, tiu ĉi fariĝus ankaŭ servasano ; kaj krome, se ĉiu samideano esperantista uzus survoje la "pordojn" de **SERVAS**, tiom kiom Pasportan Servon.

**Koto**

Bonvolu kontakti min antaŭ la fino de marto : Universitata Esperanto-Klubeto Romanischen Seminar, Nikolausberger Weg 23, D-3400 Göttingen.

Tel : (0550) 39 81 48.

## AMIKA RONDO DE CITREMULOJ

H-1106 Budapeŝto, X. strato Porcelan 4, Kulturdomo S. Moricz

Amika Rondo de Citremuloj formiĝis en la 20a de marto 1983 por kunordigi la laboron de la citristoj, orkestroj, artistoj kaj preparistoj de popolaj muzikiloj kaj kantistoj. La tasko de A.R.C. estas konatigi la junularon kun la arto de popolmuziko, helpi la metodan evoluon de la amatoraj popolmuzikilaj muzikistoj.

Ankaŭ en 1986, ARC organizas sian kutiman Landan-Internacian pluperfektigan Citran Tendaron en vilaĝo Tizsakécske inter 26. julio kaj 16. aŭgusto por unusemajnaj tempodaŭroj. En nia ĉi-jara tendaro unufoje ni provos - paralele kun la muzikinstruada agado - fakultativan instruadon de Esperanto. Ĝuste pro tio la instruado efektiviĝos nur en hungara lingvo. Ni instruos en Esperanto nur tiam, se ni havos taŭge instruitan Esperantan interpretiston. (...) Ni invitas, ni atendas la Esperantistajn citremulojn : lernu la hungaran citron, certe vi trovos en ĝi multajn ĝojojn !

Matiaso Pribojszky

(informo resumita de la red.)



## DU ALVOKOJ KONTRAŬ RASISMO EN FRANCI

En 1789a, reĝo Ludoviko 16a de Francio, ekkonsciante, ke la situacio en la reĝlando estas malbona, kaj kompreneble ne antaŭvidante, kio estos la solvo, kunvokis asembleon de la reprezentantoj de la regatoj. Por prepari tiun kunvenon, ĉiuj francoj estis alvokitaj skribi siajn plendojn kaj petojn en registroj. Jen la 29a artikolo de la registro de vilaĝo CHAMPAGNEY :

"La loĝantoj kaj komunumo de Champagne ne povas pensi pri la malbonaĵoj, kiujn suferas la negroj en la kolonioj, sen ke iliajn korojn eniru la plej viva doloro pro la imago de iliaj samuloj, krome ligitaj al ili per la duobla ligo de la religio, kiuj estas traktataj pli krude, ol estas ŝarĝbestoj. Ili ne povas persvadiĝi, ke oni povus uzi la produktojn el tiuj kolonioj, se oni pripensadus, ke ili estas kovritaj per la sango de iliaj samuloj : ili timas pro racia motivo, ke la estontaj generacioj, pli kleraj kaj pli filozofaj, akuzos la francojn de tiu ĉi jarcento, ke ili estis antropofagoj, kio kontraŭas la nomon "franco", kaj ankoraŭ pli la nomon "kristano". Tial ilia religio instigas ilin tre humile petegi al Lia Reĝa Moŝto, ke li pripensu la rimedojn, por el tiuj sklavoj fari regatojn utilajn al la reĝlando kaj al la patrujo."

En la jaro 1971a, kiam UNESKO dediĉis al la lukto kontraŭ rasismo, René SIMONIN fondis en Champagne la Domon de la Negreco, kun la patronado de L.S. SENGHOR, tiama prezidanto de Senegalio kaj nuna membro de la Franca Akademio. En 1974 kreiĝis la Asocioj de la Amikoj de la Domo de la Negreco kaj de la Homaj Rajtoj. Celoj de tiu asocio estas :

- certigi la konservadon, la disvolvadon, la studadon, la diskonigadon de la deziroj esprimitaj en Champagne la 19an de marto 1789, kaj speciale de tiu favora al la nigruloj
- prizorgi kaj plivigliki la konon de la nigrula mondo
- helpi al la promocio de la nigruloj, al la fratecaj interŝanĝoj inter nigruloj kaj blankuloj, kaj pli ĝenerale, inter personoj de ĉiuj rasoj, ĉiuj opinioj kaj ĉiuj kredoj.

Adreso de la asocio : Maison de la Négritude et des Droits de l'Homme, F 70290 CHAMPAGNEY, Francio. Jara kotizo estas nur 20 FF, kaj rajtigas ricevi bultenon. La biblioteko de la asocio bonvenigas donacitajn librojn, novajn aŭ uzitajn, kiuj rilatas kun ĝia celo (eĉ romanojn).

### II

Mi ne scias, ĉu la francoj de mia generacio estas pli kleraj kaj pli filozofaj, ol la Champagne-anoj de 1789, nek, ĉu ili estas pli bonaj kristanoj, sed diversaj asocioj, kiuj kutime luktas unu kontraŭ la alia, interkonsentis pri jena deklaro :

"La franca socio frontas la problemon pri la akceptado de aliaj popoloj kaj kulturaj kaj religiaj kolektivoj. Diversoriginaj moroj, kulturoj, kredoj, deziras plifirmiĝi kaj konekzisti en la

nacia harmonio, sen perdi sian specifecon.

Parto de la nacia socio reagas per refleksoj de timo kaj maltoleremo sin montrantaj ĉu per forĵeto, ĉu per la postulo de totala asimilado. Tiuj sintenoj generas malkomprenemon, malamon, kaj tro ofte murdeman perforton. La malplifortiĝo de la memoro pri la katastrofoj kaŭzitaj de naciismo, kaj la sociaj kaj ekonomiaj malfacilaĵoj, kiujn trairas nia socio, liberigis paroladon, kiu plivastigis kaj banaligis rasismen.

Ekstremistaj diskriminaciaj ideologioj trovas vazon ĉiutage pli grandan en nia lando.

Jenaj organizacioj kaj homamaj asocioj : Droit de l'Homme et solidarité (homa rajto kaj solidareco), Droit Humain (Homa rajto), Grande loge de France, Grande loge traditionnelle et symbolique, Grand Orient de France, Grande loge féminine de France (\*), Ligue des Droits de l'homme (Ligo de homaj rajtoj, LDH), Ligue internationale contre le rasisme et l'antisémitisme (internacia ligo kontraŭ rasismo kaj antisemitismo, LICRA), Mouvement contre le racisme et pour l'amitié entre les peuples (Movado kontraŭ rasismo kaj por interpopola amikeco, MRAP), kuniĝis por fronti tiun danĝeran evoluon kaj alvokas al la tuta popolo. La konstanta konsilantaro de la episkoparo (\*\*) la konsilantaro de la protestanta federacio, la interepiskopa ortodoksa komitato, la supera rabena konsilantaro, la granda moskeo de Parizo, kiuj jam en marto 1984 faris "komunan deklaron kontraŭ rasismo kaj por la pluraleco de la socio", opiniis, ke estas bone asociiĝi kun tiu alvoko.

Ili opinias, ke kelkaj manifestadoj de maltoleremo en la franca socio estas sufiĉe gravaj, por ke, preter la diferenco de siaj elirpunktoj, ili unufoje unuigu siajn voĉojn kaj siajn klopodojn.

Kune ili deklaras, ke urĝas :

- plifirmiĝi la respekton al la aliulo
- solidariĝi kun la personoj kaj la minoritatoj viktimoj de diskriminacio, agnoski al ili la samajn rajtojn je justeco, libereco kaj egaleco
- kune vivi en la tolero de diferencoj kaj la reciproka pliriĝigo por pli bona socio, el kiu la enmigrintoj ne povas esti ekskluditaj."

(\*) 4 framasonaj asocioj

(\*\*) temas pri la katolikaj episkopoj.

Esperantigis kaj prezentis ambaŭ alvokojn : **Jakelino**

\*\*\*\*\*

## BIBLIOGRAFIO de Esperanto kaj Interlingvistiko

Kunlaboru al la pretigo de kiel eble plej kompleta bibliografio de esperanto per la sendo de specimena ekzemplero de ĉiuj viaj eldonaĵoj : libroj, gazetoj, grup-informiloj, raportoj, kongresaĵoj, reklamiloj, ktp. Adreso : CDELI, Bibliografio de Esperanto, Biblioteko de la Urbo, Poŝtfako 5038, CH-2300 LA CHAUX DE FONDS 5, Svislando.

## ESPERANTISTOJ EL SUDOKCIDENTA PARTO DE FRANCO

jam notu vian

REGIONAN RENKONTIĜON : NOGARO (Gersio)

la 10an kaj 11an de majo 1986 !

(Detalajn informojn vi trovos en "Laŭte!" de marto)

\*\*\*\*\*

**FRANCAJ GEESPERANTISTOJ !** El Ĉeĥoslovakio gesamideanoj deziras korespondi kun vi. Skribu pere de : S. Breton, 15 rue du Vieux Pont, F 56620 PONT SCORFF

Juna esp-isto intencas (planas) biciklan vojaĝadon tra la mondo por diskonigi pacon, puran naturon kaj Esperanton ! Li esperas gastajn helpojn de ĉiuj. Aleksandro Carneiro, rua São Vicente de Paulo S/nº, BR-44150 Santa Barbara Ba, Brazilio.

La Bahaa Komunumo de **LA LINEA**, Hispanio, instruas esperanton kaj ties komencantoj deziras korespondi. Ĝi petas ankaŭ fotojn, artikolojn, poŝtkartojn pri paco, ĉar deziras starigi ekspozicion pri la temo "paco".

Skribi pere de : J. PEREZ, Apdo 280, E-11300 LA LINEA (Cadiz), Hispanio

\*\*\*\*\*

### BILANCO de SAT-BROŝURSERVO por 1985

Vendoj - Provizoj	37854,61	Eldonkostoj	29711,57
Donacoj	687,44	Afranko	5867,90
Diversaĵoj	13,50	Diversaĵoj (konvinkoj)	2640,00
SUME :	38555,55	SUME :	38219,47
La jara saldo estas :	+ 336,08	En ŝparkaso estas :	15000,00
Antaŭa saldo (841231)	23908,42	En poŝtkonto :	8932,08
Nova saldo :	FF 24244,50	Mono :	312,42

Alkalkulante\* la ŝuldatajn fakturojn, sed dekalkulante\* la provizmonon de BS-abonantoj, restas kiel neta posedaĵo de la BS ĉirkaŭ 21600 FF. Notinde, ke sekve de informoj ricevita de pluraj amikoj, parto de la havaĵo estis deponita en ŝparkaso ekde majo 1985.

La abonantoj al la BS estis 105 en 1985 (100 en 1984). Do, pozitiva, sed tre nesufiĉa evoluo. Tiuj, kiujn ne lasas indiferentaj la estonteco de nia broŝurservo, bonvolu legi sur p. 22 la eldonprogramon de 1986 kaj konkrete partopreni, fariĝante abonanto per minimume 100-franka monprovizo. Amen

Kribo

\*ne imitinda absoluta participo!



Dinosaŭreto nuntempa,  
ĉu ci memoras la praon ?  
ĉu cia lando defius  
en la arbaroj arĥeaj  
l'aerskuan blektondradon  
de l'grandaj tiranosaŭroj ?

## DINOSAŬRETO NUNTEMPA

Mi sentas  
malvarmon ĉe  
la vostopinto :  
ĉu febro ? ĉu iu  
klaĉas pri mi ?

Ilin forglutis la Nulo,  
dum vi ankoraŭ multnombras:  
pli ol fortego kruela  
daŭris plumeta ŝirmilo.

ABOMENA  
SKIZO  
DE DINOSAŬRETO  
"STRUTOMIMO"



KLARIGO : Ĉi tiu poemeto, ne bela sed almenaŭ mallonga, estis inspirata al mi de la verko de Adrian Desmond "La Varmeg-sangaj Dinosaŭroj" (The Hot-Blooded Dinosaurs), kiu konvinkis min pri la sekvantaj tezoj :

1) La kvin zoologiaj klasoj de la Vertebruloj devus esti : Fiŝoj, Amfibioj, Reptilioj, Mamuloj kaj... Dinosaŭroj ; la unuaj tri klasoj estas "malvarmsangaj", la lastaj du estas "varmsangaj", t.e. la korpovarmo ne dependas tute de la eksteraj varmfontoj.

2) Same kiel la vespertoj apartenas al la klaso "Mamuloj", tiel la Birdoj apartenus al la klaso "Dinosaŭroj" ; ke la birdoj estas malgrandaj dinosaŭretoj plumokovritaj pruvas la pra-birdo "arĥeoptero" kun karakterizoj de birdo kaj de dinosaŭreto, kaj alia konvinka pruvo estas la formo de la kruoj de la kolosa tiranosaŭro (kaj parencaj bestegoj) : ili tute similas al la kruoj de kortobirdo.

3) La Dinosaŭroj "inventis" la dupiedan iradon ant'ol la mamuloj, kaj ankaŭ la dupiedan kuradon : la dinosaŭreto "strutomimo" similis al struto kun longa vosto rigida, longa kolo, longaj kruoj... sed ĝi havis ankaŭ du brakojn kun manoj por kolekti fruktojn : eble ankaŭ al la nunaj strutoj servus brakoj, sed ili ne plu havas. Kompense, "strutomimo", kiel ĉiuj dinosaŭroj mezgrandaj kaj grandaj, mankumis je ĉia kovraĵo por sia nuda haŭto, eble ornamita per belaj koloroj : sed tiuj ne povis ĝin helpi, kiam venis la malvarmo. Supervivis nur (fino p. 70!)

LIBERECO

Sur lernejoj la kajeroj  
Sur pupitro kaj la arboj  
Sur la sablo sur la neĝo  
Cian nomon skribas mi

Sur ĉiuj legitaj paĝoj  
Kaj sur ĉiuj blankaj paĝoj  
Ŝtono sang' papero cindro  
Cian nomon skribas mi

Sur la orumitaj bildoj  
Sur militaj la armiloj  
Sur la krono de la reĝoj  
Cian nomon skribas mi

Sur ĝangalo kaj dezerto  
Sur la nestoj kaj genistoj  
Sur la eĥo infanaĝa  
Cian nomon skribas mi

Sur la noktaj mirindaĵoj  
Sur de l'tagoj blanka pano  
Sur fianĉaj la sezonoj  
Cian nomon skribas mi

Sur lazuraj la ĉifonoj  
Sur lageto, ŝima suno  
Sur la lago, viva luno  
Cian nomon skribas mi

Sur la kampoj l'horizonto  
Sur flugiloj de la birdoj  
Sur la muelejoj de l'ombroj  
Cian nomon skribas mi

Sur ĉiu blov' de l'aŭroro  
Sur la maro sur la ŝipoj  
Sur freneza la montaro  
Cian nomon skribas mi

Sur la ŝaŭmo de la nuboj  
Sur la ŝvitoj de la ŝtormo  
Sur la pluv' senguste densa  
Cian nomon skribas mi

Sur la trembrilantaj formoj  
Sur koloraj sonoriloj  
Kaj sur la verec' fizika  
Cian nomon skribas mi

Sur la vekigintaj padoj  
Sur etendigintaj vojoj  
Sur la tro homplenaj placoj  
Cian nomon skribas mi

Sur la lumiganta lampo  
Sur estingiganta lampo  
Sur la kuniĝintaj domoj  
Cian nomon skribas mi

Sur dupartigita frukto  
De l'spegul' kaj de la ĉambro  
Sur la lit', malplena konko  
Cian nomon skribas mi

Sur la hund' vorema, milda  
Sur starantaj la oreloj  
Sur mallerta ĝia kruro  
Cian nomon skribas mi

Sur la salttabulo porda  
Sur intimaj la objektoj  
Sur la flu' de l'sankta fajro  
Cian nomon skribas mi

Sur konsenta ĉiu karno  
Sur la frunto de l'amikoj  
Sur la mano etendita  
Cian nomon skribas mi

Sur la vitroj de l'surprizoj  
Sur la atentemaj lipoj  
Multe super la silento  
Cian nomon skribas mi

Sur rifuĝoj detruitaj  
Sur lumturoj disfalintaj  
Sur la muroj de l'enuo  
Cian nomon skribas mi

Sur foresto sen deziroj  
Kaj sur la soleco nuda  
Sur la ŝtupoj de la morto  
Cian nomon skribas mi

Sur reakirita sano  
Sur malaperinta risko  
Sur espero senmemora  
Cian nomon skribas mi

Per potenco de ĉi vorto  
Rekomencas mi la vivon  
Mi naskiĝis por cin koni  
Por cin nomi

Libereco.

El la franca : Daniel LUEZ

la plej malgrandaj dinosaŭretoj, ĉar ili estis kovritaj per varmotenaj plumoj, kaj kompreneble, la musoformaj pramamuloj, kiuj estis kovritaj per sia felo !

4) Krom la Dinosaŭroj, estas nepre studindaj ankaŭ tiuj animaloj nomataj "paleontologoj" ; Desmond citas amuzajn anekdotojn pri ili kaj iliaj malkovroj kaj la malrapida antaŭenirado de la vero, kvazaŭ ĝi marŝus tra densa nebulo : kiam mi vizitadis altlernejon, la dinosaŭroj estis ankoraŭ RAMPULOJ !

Kaj mi senpripense akceptadis la ideon, ke dinosaŭroj estis rampuloj : serpento rampas, lacerto kaj igvano rampas, sed eĉ en la bildoj de mia teksto la dinosaŭroj ne rampis ! Reptilioj rampas, ĉar ili estas malvarmsangaj kaj ne havas sufiĉan energion por daŭre stari, sed dinosaŭroj eĉ kuras rapide... sur du piedoj. Kaj mi ne pridubis la "sanktajn tekstojn"....

**Ĝiz el Lamark**

\*\*\*\*\*  
En Francio :

**ESPERANTO per MINITEL**

Per tiu sistemo oni povas tuĵ anonci kaj scii ĉion, kio okazas en Esperantio. Kiel uzi ĝin ?

Faru la telefonnumeron : 36.15.91.77 kaj tajpu la kodon de la servo "CYAN". Menuo aperas, tajpu tiam la numeron "3" (mesaĝujo). La MINITEL demandas al vi la nomon de la grupo. Tajpu "ESPERANTO". Vi tiam povas legi - aŭ skribi - en la sistemo.

Por eliri, CONNEXION  
FIN

Tiu sistemo estas alvokebla el ĉiu parto de Francio. Tamen atentu, ĝi estas multtekosta, do ne uzu ĝin tro longtempe...

**Ĵanseb.**

\*\*\*\*\*

**SAT-BROŜURSERVO INFORMAS :** Estas denove haveblaj : **Esperanto in 24 pages** (angla) (Mendkodo : EA, prezo : 1 FF)

**Abrégé pratique de la grammaire esperanto** (Lentaigne) GE,7FF

**Pri la esperanta literaturo** (VALO) (PL, 3 FF).

Tiuj tri broŝuroj estas nun tajpitaj per JULIA, do pli belaspektaj.

Atentu la novajn prezojn de GE kaj PL.

\*\*\*\*\*

Nepre rekomendinda : la 3a volumo de "La Kancerkliniko-Krestomatio" :

"KANZONOJ" de JOPEDAN. 32 paĝoj bele ilustritaj. Temas pri kanzonoj kun originalaj aŭ tradukitaj tekstoj, kiuj riĉigas la kulturon de Esperantio, sur kampo ĝis nun tre mizera.

Mendi al : J. LE PUIL, 5 pl. Lavoisier, App.61, F 93380 PIERREFITTE

Prezo indikita : 17 FF.

**KRUCVORTENIGMO de Sfinksido**

(s.f. = sen finaĵo)

SOLVO de n-ro 63

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2			■							
3										
4					■				■	
5				■						
6								■		
7			■							
8						■				
9							■			■
10		■						■		
11										

- Horizontale :**
1. KAFOBABILA. 2. ALEN. BARAN. 3. RIM. KORIZA. 4. TRIPANOZOM. 5. NEĜAMASO 6. DUIL. SES. 7. INSID. UF 8. VITO. AROKO. 9. EKINO. OKAZ. 10. NANOJN. UZO. 11. INOJN. EBLOJ.

- Vertikale :**
1. KARTODIVENI. 2. ALIR. UNIKAN. 3. FEMINISTINO. 4. ON. PELIONQN. 5. KAĜ. OJ. 6. ABONAS. NE. 7. BAROMETRO. 8. IRIZAS. OKUL. 9. LAZOS. UKAZO. 10. ANAMORFOZOJ.

**Horizontale :**

1. Al kio similas esperantisto...laŭ la Japanoj dum la antaŭmilita reĝimo (\*). 2. Uzata por atentigi. Titolo de fama verko fare de I. Lapenna (s.f.). 3. Bruas kiel glavoj kaj armaĵoj. 4. La onklo, por siaj genevoj. Grekdevena scienca vorto signifi-anta : orelo. 5. Organo (s.f.). Starigo de programoj (s.f.) 6. La ŝipestro kaj la pasaĝeroj maltrankviliĝas kiam la ŝipo suferas ĝin. Maljes. 7. Onomatopeo imitanta (supozeble!) la krion de bebo. Gazeton, opiniesprimilon de partio, ligo, ktp. 8. Spegulo estas malofte tia. Ĝi instigas grati sin. 9. Japana religia movado, kies samnoma revuo estas tre konata. Ĝia atomnumero estas 44. 10. Antikva nomo de Irlando (poezia vorto). Interjekcio uzata por alvoki telefonkorespondanton. 11. Naskis, kreis.

- Vertikale :**
1. Refoje, denove. 2. Ĝi estas esperiga por tiuj, kiuj privetis ĝin. 3. Uzata pare, tiu adverbo esprimas la plenan indiferentecon inter du ebloj. Korinklino al iu (s.f.). 4. Flav-eca tero uzata kiel pigmento por farboj. Ĝi subtenas la helikopteron. 5. Unu horon-pli frue ol la G.M.T. Mara rabistino (s.f.). 6. Specialisto pri la kaŭzo de la malsanoj (s.f.). Akvomaso, kiu levigas kaj refalas ĉe la supraĵo de maro. 7. Malproksimaj

(poezia vorto). De malsupre supren : iu afero. 8. Oni desegnas ĝin per rektangulilo. Ne pli ol. 9. Poseda pronomo. Komuniki al iu ian senton, kutimon. 10. Laŭ la kunmiksitaĵoj, ĝi formas akvon aŭ aeron. Verba finaĵo.

\* Vd. "Esperanto en Perspektivo", paĝo 715, antaŭlasta paragrafo...

\*\*\*\*\*

### BILANCO de "Laŭte!" por 1985

Abonoj - Donacoj : 10018,86 Eldonkostoj : 7564,40 Afranko : 2657,94

Jara saldo : - 203,48 Antaŭa saldo (84.12.31) : 8177,36

Nova saldo nun en la poŝtkonto : 7974,88 francaj frankoj.

**Abonoj** : 400 (36,5% ekster Francio). La abonantaro ankoraŭ iomete kreskis, sed restis en - por la prizorganto - elteneblaj limoj. (En 1984 : 383 abonoj, kun 35 % ekster F.)

Ĉar kreskis ankaŭ la amplekso de la jarkolekto, la evoluo estas kontentiga.

Krom la kutimaj kontribuoj, la marta numero entenas multajn paĝojn originale verkitajn de niaj amikoj de SAT-Junulfako. Ĉar ĉiuj ankoraŭ ne abonintaj, junaj SAT-membroj (malpli ol 35-jaraj) ricevos specimene la martan numeron, ni esperu fruktodonan rezulton (novajn abonojn kaj kontribuantojn) el tiu kunlaborado. Kaj eble, en la estonteco, apud la de ĉiuj ŝatataj "Vortoj" de amiko VALO, regule kaj "laŭte" sin esprimos ankaŭ la plej freŝe bakita generacio...

Dume, jen la lasta alvoko, por ke malfruantoj ne forgesu reaboni, se tio estas ja ilia intenco.

*Se vi malkovras krucon en la tamburo, tio signifas, ke, se vi ne reabonus, la krevigita tamburo de "Laŭte!" ne plu povus "plezurigi" viajn orelojn !*

**La venonta numero aperos  
fine de marto**

\*\*\*\*\*

laŭtulo en nebulo...



"Laŭte!" petas vian (re)abonon !  
"SAT-Broŝurservo"... vian monprovizon!